

eLIBRO

*Astrid Lindgren*

# Pipi Ŝtrumpolonga



INKO

Astrid Lindgren

## PIPI ŠTRUMPOLONGA

*El la sveda tradukis*

Sven Alexandersson

eLIBRO

*Aranĝis: Franko Luin*



*La presita eldono de Pipi Štrumpolonga estas havebla pere de la Libro servo de UEA aŭ vialanda libro servo.*

**ISBN 91-7303-058-9**

[inko@tyreso.nu](mailto:inko@tyreso.nu)

<http://www.tyreso.nu/inko>

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

DECEMBRO 2000

## Pipi ekloĝas en Vilao Vilaltao

**Ĉ**e la rando de la eteta urbo situs malnova kaduka ĝardeno. En la ĝardeno estis malnova domo, kaj en la domo loĝis Pipi Ŝtrumpolonga. Ŝi estis naŭjara kaj ŝi loĝis tie tute sola. Nek patrinon nek patron ŝi havis, kaj tio fakte estis agrableta, ĉar tiel estis neniŭ, kiu povis ordoni al ŝi enlitiĝi, kiam estas plej amuze, kaj neniŭ povis devigi ŝin engluti fiŝhepantan oleon, kiam ŝi preferis bombonojn.

Iam antaŭ longe Pipi havis patron, kiun ŝi amegis, jes, ŝi ankaŭ havis patrinon, sed tio estis antaŭ tiel longa tempo, ke ŝi tute ne memoras. La patrino mortis, kiam Pipi estis nur malgranda infaneto, kiu kuŝis en la lulilo kriante tiel terure, ke neniŭ povis esti proksime. Pipi kredis, ke ŝia patrino nun sidas en la ĉielo kaj malsupren rigardas al sia knabino tra trueto, kaj Pipi kutimis mansvingi supren al ŝi kaj diri:

—Ne timu! Mi ĉiam aranĝiĝos!

Sian patron Pipi ne forgesis. Li estis ŝipestro kaj veladis sur la grandaj oceanoj, kaj Pipi estis velinta kun li per lia ŝipo, ĝis kiam la patro en ŝtormo estis forblovita en la maron kaj malaperis. Sed Pipi estis tute certa, ke iun tagon li revenos. Ŝi tute ne kredis, ke li dronis. Ŝi kredis, ke li flosis al la bordo de iu insulo, kie negroj abundas, kaj ke li fariĝis reĝo super ĉiuj negroj kaj tuttage iras kun orkrono sur la kapo.

—Mia patrino estas anĝelo kaj mia patro estas negroreĝo, vere ne ĉiuj infanoj havas tiel noblajn gepatrojn, Pipi kutimis

diri tute kontenta. Kaj kiam paĉjo nur povos konstrui ŝipon, tiam li venos kunpreni min, kaj tiam mi fariĝos negroprincino. Hej hop, kiel amuze estos!

Ŝia patro antaŭ multaj jaroj aĉetis tiun malnovan domon en la ĝardeno. Li intencis loĝi tie kun Pipi, kiam li estos maljuna kaj ne plu havos forton veladi sur la maroj. Sed okazis ja la bedaŭrinda afero, ke li estis blovita en la maron, kaj dum Pipi atendis, ke li revenu, ŝi hejmenvelis la rektan vojon al Vilao Vilaltao. Jen la nomo de la domo. Ĝi staris tie meblita kaj preta kaj atendis ŝin. Iun belan someran vesperon ŝi diris adiaŭ al ĉiuj maristoj sur la ŝipo de sia patro. Ili tre ŝatis Pipin, kaj Pipi tre ŝatis ilin.

—Adiaŭ, knaboj, Pipi diris kaj laŭvice kisis ilin ĉiujn sur la frunto. Ne timu pri mi. Mi ĉiam aranĝiĝos.

Du aferojn ŝi kunprenis el la ŝipo. Malgrandan simion, kiu nomiĝis Sinjoro Nilson — ĝin ŝi iam ricevis de sia patro — kaj grandan valizon plena je oraj moneroj. La maristoj staris ĉe la ŝiprando kaj rigardis post Pipi tiel longe, kiel ili povis ŝin vidi. Ŝi firme iris sen turni sin, kun Sinjoro Nilson sur la ŝultro kaj kun la valizo en la mano.

—Rimarkinda infano, diris unu el la maristoj kaj forviŝis larmon el la okulo, kiam Pipi malaperis en la foro.

Li pravis. Pipi estis tre rimarkinda infano. Plej rimarkinda pri ŝi estis, ke ŝi estis tiel forta. Ŝi estis tiel fortega, ke en la tuta mondo ne ekzistis policisto, kiu estis same forta kiel ŝi. Ŝi povis levi tutan ĉevalon, se ŝi volis. Kaj ŝi volis. Ŝi havis propran ĉevalon, kiun ŝi aĉetis por unu el siaj multaj ormoneroj la saman tagon, kiam ŝi hejmenvenis al Vilao Vilaltao. Ŝi ĉiam deziregis havi propran ĉevalon. Kaj nun ĝi loĝis sur

la verando. Sed kiam Pipi volis trinki sian posttagmezan kafon tie, ŝi sencere monie forlevis ĝin en la ĝardenon.

Apud Vilao Vilaltao situis alia ĝardeno kaj alia domo. En tiu domo loĝis gepatroj kun siaj du bonaj infanetoj, knabo kaj knabino. La knabo nomiĝis Tomi kaj la knabino Anjo. Ili estis tre afablaj, bonkonduktaj kaj obeemaj infanoj. Neniam Tomi mordadis siajn ungojn, ĉiam li faris tion, kion lia patrino petis lin fari. Anjo ne protestis, kiam io ne iris laŭ ŝia volo, kaj ĉiam ŝi estis tre belaspekta en bone gladitaj kotonaj robetoj, kiujn ŝi zorgis ne malpurigi. Tomi kaj Anjo ludis unu kun la alia, sed ofte ili deziris havi ludamikon, kaj en tiu tempo, kiam Pipi ankoraŭ veladis sur la maroj kun sia patro, ili kutimis foje stari apogantaj sin al la barilo, dirante unu al la alia:

—Kiel stulte, ke neniuj povas ekloĝi en tiu domo! Iu devus loĝi tie, iu kun infanoj.

La belan someran vesperon, kiam Pipi unuafoje transiris la sojlon de Vilao Vilaltao, Tomi kaj Anjo ne estis hejme. Ili estis forveturintaj al sia avino por unusemajna vizito. Tial ili tute ne sciis, ke iu ekloĝis en la najbara vilao, kaj kiam ili la unuan tagon post la hejmenveno staris ĉe la barilpordo kaj elrigardis sur la straton, ili ankoraŭ ne sciis, ke fakte troviĝas ludamiko tiel proksime. Kiam ili staris tie cerbumante kion fari, kaj ĉu eble io agrabla okazos tiun tagon aŭ ĉu estos tia malagrabla tago, kiam ne ekzistas io ajn por fari, ĝuste tiam la barilpordo de Vilao Vilaltao malfermiĝis kaj knabineto eltretis. Estis la plej stranga knabino, kiun Tomi kaj Anjo iam vidis, kaj estis Pipi Ŝtrumpolonga, kiu eliris por matena promeno. Jen kiel ŝi aspektis.

Ŝiaj haroj estis samkoloraj kiel karoto kaj estis plektitaj en du malmolaj harligoj, kiuj rekte elstaris. Ŝia nazo havis sam-

an formon kiel tre malgranda terpomo kaj estis lentuge tute punktita. Sub la nazo estis buŝo vere tre larĝa kun sanaj blankaj dentoj. Ŝia robo estis sufiĉe stranga. Pipi mem estis kudrinta ĝin. La intenco estis, ke ĝi fariĝu blua, sed la blua ŝtofo ne sufiĉis kaj Pipi devis alkudri kelkajn pecojn da ruĝa ŝtofo ie kaj alie. Sur ŝiaj longaj maldikaj kruroj estis paro da longaj ŝtrumpoj, unu bruna kaj la alia nigra. Krome ŝi havis paron da nigraj ŝuoj, kiuj estis ekzakte duoble tiel longaj kiel ŝiaj piedoj. Tiujn ŝuojn ŝia patro aĉetis al ŝi en Sudameriko, por ke ŝi povu kreski en ili, kaj Pipi ne volis havi aliajn.

Kio precipe igis Tomin kaj Anjon malfermegi la okulojn, estis la simio, kiu sidis sur la ŝultro de la fremda knabino. Estis malgranda vostsimio, vestita per blua pantalono, flava jako kaj blanka pajloĉapelo.

Pipi marŝis laŭ la strato. Ŝi iris kun unu piedo sur la trotuaro kaj la alia en la strata defluejo. Tomi kaj Anjo postrigardis ŝin tiel longe, kiel ili povis ŝin vidi. Post iom da tempo ŝi revenis. Kaj nun ŝi iris dorsantaŭen. Tio estis, por ke ŝi ne devu turni sin irante hejmen. Kiam ŝi venis ĝuste antaŭ la barilpordon de Tomi kaj Anjo, ŝi haltis. La infanoj silente ŝin rigardis. Fine Tomi diris:

—Kial vi iris dorsantaŭen?

—Kial mi iris dorsantaŭen? Pipi diris. Ĉu mi ne vivas en libera lando, do? Ĉu oni ne rajtas iri, kiel oni deziras? Cetere mi diru al vi, ke en Egiptio ĉiuj homoj iras tiamaniere, kaj neniu opinias, ke tio entute estas stranga.

—Kiel vi tion scias, Tomi demandis. Vi ja ne estis en Egiptio.

—Ĉu mi ne estis en Egiptio? Jes, estu certa, ke mi estis. Mi estis ĉie sur la tuta terglobo kaj vidis multe pli strangajn afe-

rojn ol homojn, kiuj iras dorsantaŭen. Mi scivolas, kion vi dirus, se mi irus per la manoj, kiel homoj faras en Fora Hindio?

—Nun vi fakte mensogas, Tomi diris.

Pipi cerbumis dum momento.

—Jes, vi pravas. Mi mensogas, ŝi malgaje diris.

—Estas malbele mensogi, diris Anjo, kiu nun fine kuraĝis malfermi la buŝon.

—Jes, estas tre malbele mensogi, Pipi diris ankoraŭ pli malgaje. Sed mi kelkfoje forgesas, vi komprenas. Kaj kiel vi povas postuli, ke infaneto, kiu havas patrinon, kiu estas anĝelo kaj patron, kiu estas negroroĝo, kaj kiu mem veladis sur la maroj la tutan vivon, ĉiam povu diri la veron? Kaj cetere, ŝi diris, ekbrilante per sia tuta lentuga vizaĝo, mi diras al vi, ke en Belga Kongo ne estas eĉ unu homo, kiu parolas la veron. Ili mensogas la tutajn tagojn. Ili komencas je la sepa matene kaj daŭrigas ĝis la sunsubiro. Se mi do hazarde mensogas iufoje, vi provu pardoni min kaj memori, ke dependas nur de tio, ke mi estis iom tro longe en Belga Kongo. Ni ja tamen povas esti amikoj, ĉu ne?

—Kompreneble, diris Tomi, kaj subite li sentis, ke ĉi tio certe ne estos unu el la tedaj tagoj.

—Cetere, kial vi ne povu matenmanĝi ĉe mi, Pipi demandis.

—Jes, kiel dirite, Tomi aldonis, kial ni ne povu fari tion. Venu, ni iru!

—Jes, diris Anjo, nun tuj!

—Sed unue mi devas prezenti vin al Sinjoro Nilson, Pipi diris. Kaj la simieto deprenis sian ĉapelon kaj ĝentile salutis.

Ili eniris tra la kaduka ĝardena barilpordo de Vilao Vilal-

tao supren laŭ gruzo irejo, borderita de malnovaj muskokovritaj arboj, laŭvide tre bonaj grimparboj, al la vilao kaj sur la verandon. Tie la ĉevalo staris kaj frandis avenon el supujo.

—Sed kial vi havas ĉevalon sur la verando? Tomi demandis. Ĉiuj ĉevaloj, kiujn li konis, loĝis en stalo.

—Nu, Pipi diris cerbume. En la kuirejo ĝi nur malhelpus. Kaj en la salono li ne sentas sin hejme.

Tomi kaj Anjo karesis la ĉevalon, kaj poste ili daŭrigis en la domon. Kuirejo estis tie, kaj salono kaj dormoĉambro. Sed aspektis kvazaŭ Pipi forgesis la vendredan purigadon ĉi semajne. Tomi kaj Anjo singarde ĉirkaŭrigardis, ĉu iu negroreĝo sidas en iu angulo. Ili neniam vidis negroreĝon en sia tuta vivo. Sed neniu patro aperis, nek patrino, kaj Anjo timeme demandis:

—Ĉu vi loĝas ĉi tie tute sola?

—Tute ne, Pipi diris. Sinjoro Nilson kaj la ĉevalo ja ankaŭ loĝas ĉi tie.

—Sed mi volis diri, ĉu vi ne havas patrino aŭ patron ĉi tie?

—Ne, eĉ ne iomete, Pipi diris gaje.

—Sed kiu do sendas vin en la liton vespere kaj simile, Anjo demandis.

—Tion mi mem faras, Pipi diris. Unue mi ordonas tute afable, kaj se mi tiam ne obeas, mi ankoraŭfoje akre ordonas. Kaj se mi tamen ne volas obei, tiam min atendas bastonado, vi komprenas.

Tute plene Tomi kaj Anjo ne komprenis tion, sed ili opiniis, ke eble estas bona maniero. Nun ili tamen alvenis en la kuirejon, kaj Pipi kriis:

—*Nun ni bakos patkakos*

*nun ni donos patkonos*



*nun ni fritos patkitos.*

Kaj ŝi prenis tri ovojn kaj ĵetis ilin alten en la aeron. Unu el la ovoj refalis sur ŝian kapon kaj frakasiĝis, tiel ke la orflavo fluis ĝis la okuloj. Sed la aliajn ŝi sperte kaptis per kaserolo, en kiu ili frakasiĝis.

—Mi ĉiam aŭdis, ke ovoflavo estas tre utila por la haroj, Pipi diris kaj viŝis siajn okulojn. Vi vidis, ke ili tiel kreskos, ke krakos. En Brazilo, cetere, ĉiuj homoj havas ovojn en la hararo. Ĝuste tial ne ekzistas kalvuloj tie. Nur unufoje estis maljunulo, kiu estis tiel freneza, ke li manĝis siajn ovojn anstataŭ ŝmiri ilin en la harojn. Kaj tute konsekvence li ankaŭ kalviĝis, kaj kiam li aperis sur la stratoj fariĝis tia tumulto, ke oni alvokis policaŭton.

Dum ŝi parolis, Pipi lerte elprenis la ovoŝelojn el la kaserolo per la fingroj. Nun ŝi prenis banbroson, kiu pendis sur la muro, kaj komencis kirli krespan paston, tiel ke ĉirkaŭŝprucis sur la murojn. Fine ŝi verŝis tion, kio restis en krespopaton, kiu staris sur la kuirforno. Kiam la patkuko estis finbakita sur unu flanko, ŝi ĵetis ĝin duone ĝis la plafono, tiel ke ĝi turniĝis en la aero, kaj poste ŝi denove kaptis ĝin per la pato. Kaj kiam ĝi estis preta, ŝi ĵetis ĝin tra la kuirejo rekte sur teron, kiu staris sur la tablo.

—Manĝu, ŝi kriis, manĝu antaŭ ol ĝi malvarmiĝas!

Kaj Tomi kaj Anjo manĝis kaj pensis, ke estas tre bongusta patkuko. Poste Pipi invitis ilin en la salonon. Tie estis nur unu meblo. Estis grandega klapkomodo kun multaj tirkestetoj. Pipi malfermis la tirkestojn kaj montris al Tomi kaj Anjo ĉiujn trezorojn, kiujn ŝi havis tie. Tie estis mirindaj birdovoj kaj strangaj konkoj kaj ŝtonoj, beletaj skatoletoj, belaj arĝentaj speguloj, perlaĵ kolĉenoj kaj multo alia, kion Pipi kaj ŝia

patro aĉetis dum siaj vojaĝoj ĉirkaŭ la terglobo. Pipi donis al siaj novaj ludkamaradoj po unu donaceton je memoro. Tomi ricevis ponardon kun brilanta perlamota tenilo kaj Anjo skatoleton, kies fermlato estis kovrita per rozkoloraj konkoj. En la skatolo kuŝis ringo kun verda juvelŝtono.

—Ĉu vi ne iru hejmen nun, diris Pipi, por ke vi povu reveni morgaŭ. Ĉar se vi ne iros hejmen, vi ja ne povos reveni. Kaj tio estus bedaŭrinda.

## Pipi estas objektoserĉanto kaj ekbatalas

**A**njo vekigis frue la postan matenon. Ŝi rapide saltis el la lito kaj paŝetis al Tomi.

—Vekiĝu, Tomi, ŝi diris kaj ektiris lian brakon, vekigis kaj ni iru al la amuza knabino kun la grandaj ŝuoj!

Tomi tuj fariĝis tute veka.

—Mi sciis, kiam mi kuŝis dormante, ke estos io amuza hodiaŭ, kvankam mi ne memoris, kio estos, li diris kaj eliĝis el la piĵama jako. Poste ili ambaŭ kuris en la banĉambron. Ili lavis sin kaj brosis la dentojn multe pli rapide ol kutime, la vestoj sencere monie surmetiĝis, kaj tutan horon pli frue ol atendite de sia patrino ili venis glitante laŭ la apogrelo el la supra etaĝo kaj surplankiĝis precize ĉe la matenmanĝa tavolo, kie ili eksidis kriante, ke ili volas havi sian ĉokoladon nun tuj.

—Kio do okazos, ilia patrino demandis, kio estas tiel urĝa?

—Ni iros al la nova knabino en la apuda domo, Tomi diris.

—Eble ni restos la tutan tagon, Anjo diris.

Ĝuste tiun matenon Pipi bakadis spickukojn. Ŝi jam faris grandegan paston kaj disrulumis ĝin sur la kuireja planko.

—Ĉar sciu, Pipi diris al sia simieto, kiom sufiĉas baktabulo, se oni bakos minimume kvincent spickukojn!

Kaj tie ŝi nun kuŝis sur la planko farante spickukojn kvaŭzaŭ ŝin ĉasus fajro.

—Ne tretu sur la paston, Sinjoro Nilson, ŝi diris ĝenite, kiam sonoris ĉe la pordo.

Pipi kuris malfermi. Ŝi estis blanka kiel muelisto de la kapo ĝis la piedoj, kaj kiam ŝi kore mansalutis Tomin kaj Anjon, tuta nuboj da faruno envolvis ilin.

—Kiel agrable, ke vi venas, ŝi diris kaj skuis la antaŭtukon, tiel ke estiĝis nova farunnubo. Tomi kaj Anjo ricevis tiom da faruno en la gorĝon, ke ili devis ektusi.

—Kion vi faras? Tomi demandis.

—Jes, se mi dirus, ke mi purigas la fumtubon, vi tamen ne kredus min, tiel ruza kiel vi estas, Pipi diris. Mi fakte bakas. Sed mi estos baldaŭ preta. Vi povas sidi sur la brullignujo dumtempe.

Pipi sciis vere rapide labori! Tomi kaj Anjo sidis sur la lignujo kaj rigardis, kiel ŝi atakis la spickukan paston kaj kiel ŝi ĵetis la kukojn sur la bakplatojn kaj kiel ŝi ĵetis la platojn en la bakfornon. Ili pensis, ke tio estas preskaŭ kiel en kinejo.

—Prete, Pipi fine diris kaj brue ĵetfermis la bakfornan lukon post la lastaj platoj.

—Kion ni faru nun? Tomi scivolis.

—Mi ne scias, kion vi intencas fari, Pipi diris. Sed mem mi ne rajtas maldiligentadi. Mi estas nome objektoserĉanto, kaj tiaj ne havas liberan momenton.

—Kion vi diris, ke vi estas? Anjo demandis.

—Objektoserĉanto.

—Kio estas tio? Tomi demandis.

—Ja estas iu, kiu serĉas objektojn! Kio alia povus esti, Pipi diris, dum ŝi kunbalais ĉiun farunon en amaseton sur la planko. La tuta mondo estas plena je objektoj, kaj vere necesas, ke iu trovu ilin. Kaj ĝuste tion faras objektoserĉanto.

—Kiajn objektojn? Anjo demandis.

—Ho, ĉion ajn, Pipi diris, orbulojn, strutplumojn, mortintajn ratojn kaj krakbombojn kaj et-etajn ŝraŭbingojn kaj simile.

Tomi kaj Anjo pensis, ke tio sonas sufiĉe amuza, kaj ankaŭ ili volis fariĝi objektoserĉantoj, sed Tomi diris, ke li esperas, ke li trovos orbulojn kaj ne et-etan ŝraŭbingon.

—Ni ja vidos, kio povas esti, Pipi diris. Ĉiam oni trovas ion. Sed nun ni devas rapidi, por ke ne venu aliaj objektoserĉantoj, kiuj forprenos ĉiujn orbulojn troveblaj en la regiono.

Ĉiuj tri objektoserĉantoj eliris. Ili opiniis, ke estas plej bone komenci serĉi ĉirkaŭ la proksimaj vilaoj, ĉar Pipi diris, ke eĉ se povus okazi, ke oni trovas ŝraŭbingeton fore en la arbaro, tamen la plej bonajn objektojn oni preskaŭ ĉiam trovas tie, kie loĝas homoj en la proksimeco.

—Sed ĉiukaze, ŝi diris. Mi vidis ekzemplojn ankaŭ pri la kontraŭo. Mi memoras pri okazo, kiam mi serĉadis objektojn en la ĝangalo de Borneo. Ekzakte meze de la praarbaro, kie neniu homo iam metis sian piedon, imagu, kion mi trovis tie? Jes, vere bonaspektan lignan kruron. Mi donacis ĝin al unukrura maljunulo, kaj li diris, ke tian kruron oni ne povas aĉeti per mono.

Tomi kaj Anjo rigardis Pipin por konstati, kiel objektoserĉanto devas procedi. Kaj Pipi kuris de unu vojrandoj al la alia, ŝirmis permane la okulojn kaj serĉadis. Kelkfoje ŝi rampis surgenue kaj enŝovis la manon inter la latojn de barilo kaj diris senrevigite:

—Strange, mi tutcerte imagis, ke mi vidas orbulon.

—Ĉu oni vere rajtas preni ĉion, kion oni trovas? Anjo demandis.

—Jes, ĉion, kio kuŝas sur la tero, Pipi diris.

Iom pli for maljuna viro kuŝis dormanta en la herbaro ekster sia vilao.

—Tiu kuŝas sur la tero, Pipi diris, kaj ni trovis lin. Ni prenu lin!

Tomi kaj Anjo tute konsterniĝis.

—Ne, ne, Pipi, ni ne povas preni viron, tio ne eblas, Tomi diris. Kiel ni cetere uzu lin?

—Kiel ni uzu lin? Lin ni povus uzi en multaj manieroj. Ni povus havi lin en kunikla kaĝeto anstataŭ kuniklo kaj lin nutri per leontodaj folioj. Sed se vi ne volas, mi rezignas pri tio. Sed ĉagrenas min, ke eble venos alia objektoserĉanto kaj ŝtelos lin.

Ili pluiris. Subite Pipi eligis veran kriegon.

—Ne, vere mi ne vidis ion similan, ŝi kriis kaj kaptis malnovan rustan ladskatolon el la herboj. Kia kapto, kia kapto! Oni neniam havas tro multe da skatoloj.

Tomi heziteme rigardis la skatolon kaj diris:

—Kiel oni povas utiligi ĝin?

—Ho, ĝin oni povas uzi por multo. Unu maniero estas meti kukojn en ĝin. Tiam ĝi fariĝas tia agrabla Skatolo Kun Kukoj. Alia maniero estas ne meti kukojn en ĝin. Tiam ĝi fariĝas Skatolo Sen Kukoj kaj certe tio ne estas same agrabla, sed ankaŭ tio taŭgas.

Ŝi esploris la skatolon, kiu vere estis tre rusta kaj krome havis truon en la fundo.

—Ĉi tiu skatolo preskaŭ aspektas kiel Skatolo Sen Kukoj, ŝi diris pripenseme. Sed oni povas ankaŭ ŝovi ĝin sur la kapon kaj ludi, ke estas meze de la nokto.

Kaj tion ŝi faris. Kun la skatolo sur la kapo ŝi antaŭen mar-

ŝis tra la vilaokvartalo kiel malgranda lada turo, kaj ŝi ne haltis antaŭ ol ŝi falis sur la ventron trans ŝtaldrata barilo. Krakis terure, kiam la ladskatolo frapis la teron.

—Jen vi vidas, diris Pipi kaj forprenis la skatolon. Se mi ne estus havinta ĝin sur la kapo, mi estus falinta sur la vizaĝon kaj kriple frapinta min.

—Jes, Anjo diris. Sed se vi ne estus havinta la skatolon sur vi, vi neniam stumblus sur la ŝtaldrata barilo.

Sed antaŭ ol ŝi finparolis, venis nova krio de Pipi, kiu triumfe levis malplenan fadenbobenon.

—Ŝajnas esti mia feliĉa tago hodiaŭ, ŝi diris. Kia eta dolĉa bobeno, per kiu blovi sapvezikojn, aŭ kiun oni povas pendigi sur ŝnuro ĉirkaŭ la kolon kiel kolĉenon! Mi volas iri hejmen kaj tuj fari tion.

Ĝuste tiam malfermiĝis barilpordo de proksima vilao kaj knabo venis elkurante. Li aspektis timigita, kaj tio ne estis stranga, ĉar tuj post li venis kvin knaboj. Ili baldaŭ atingis lin kaj premis lin kontraŭ barilon, kie ili ĉiuj atakis lin. Ĉiuj kvin samtempe komencis pugnobati lin. Li ploris kaj levis la brakojn antaŭ la vizaĝon por ŝirmi sin.

—Donu al li, buboj, kriis la plej granda kaj forta el la knaboj, tiel ke li neniam plu kuraĝos montri sin sur ĉi tiu strato!

—Ho, Anjo diris, ili batas Vilĉjon. Kiel ili povas esti tiel mallicaj!

—Estas tiu abomena Bengt. Li devas ĉiam batali, Tomi diris. Kaj kvin kontraŭ unu, kiaj malkuraĝuloj!

Pipi paŝis al la knaboj kaj frapetis la dorson de Bengt per la montrofigro.

—Nu, vi, ŝi diris. Ĉu la intenco estas tuj fari kaĉon el eta Vilĉjo, ĉar vi atakas lin ĉiuj kvin samtempe?

Bengt turnis sin kaj ekvidis knabinon, kiun li neniam antaŭe renkontis. Tute fremda knabino, kiu kuraĝis tuŝi lin. Unue li nur gapis dum momento pro pura surprizo, kaj poste larĝa ridaĉo aperis sur lia vizaĝo.

—Buboj, li diris, buboj! Lasu Vilĉjon kaj ĵetu rigardon al ĉi tiu knabino. Eksterordinara knabino!

Li frapis siajn genuojn kaj ridis. Kaj post momento ili ĉiuj kolektiĝis ĉirkaŭ Pipi, ĉiuj krom Vilĉjo, kiu viŝis siajn larmojn kaj singarde stariĝis apud Tomi.

—Ĉu vi vidis, kian hararon ŝi havas? Vera fajro! Kaj kiajn ŝuojn, Bengt daŭrigis. Ĉu mi rajtas prunti unu el ili? Mi tiel ŝatus fari remveturon, sed ne havas boaton.

Jen li kaptis unu harplektaĵon de Pipi, sed rapide lasis ĝin dirante:

—Aj, mi brulvundis min!

Kaj poste ĉiuj kvin knaboj faris ringon ĉirkaŭ Pipi saltante kaj kriante:

—Ruĝoĉapulino, Ruĝoĉapulino!

Pipi staris meze de la ringo afable ridetante. Bengt esperis, ke ŝi koleriĝos aŭ komencos plori, almenaŭ ŝi devus aspekti timigita. Kiam nenio helpis, li ekpuŝis ŝin.

—Ne ŝajnas al mi, ke vi uzas ĝentilajn manierojn rilate al sinjorinoj, Pipi diris. Kaj ŝi levis lin per siaj fortaj brakoj alten en la aeron, portis lin al betulo, kiu kreskis tie, kaj pendigis lin trans branĉon. Poste ŝi prenis alian knabon kaj pendigi lin sur alian branĉon. La trian ŝi sidigis sur barilpordan foston antaŭ la vilao kaj la sekvantan ŝi ĵetis trans barilon tiel, ke li sidiĝis sur florbedon en la apuda ĝardeno. Kaj la lastan el la batalemuloj ŝi metis sur ludĉareton, kiu staris sur la vojo. Poste Pipi kaj Anjo kaj Tomi kaj Vilĉjo staris rigardante la knabojn kel-



kan tempon, kaj la knaboj estis tute mutaj pro surprizo. Kaj Pipi diris:

—Vi estas malkuraĝaj! Vi atakas solan knabon kvinope. Tio estas malkuraĝa. Kaj poste vi eĉ komencas puŝi sendefendan knabinon. Fi, kiel malbele!

—Venu nun, ni iru hejmen, ŝi diris al Tomi kaj Anjo. Kaj al Vilĉjo ŝi diris:

—Se ili provos bati vin ankoraŭ foje, vi povas sciigi min.

Kaj al Bengt, kiu sidis sur la arbo kaj ne kuraĝis movi sin, ŝi diris:

—Se estas ankoraŭ io, kion vi havas por diri pri miaj haroj aŭ miaj ŝuoj, estas plej bone kapti la okazon nun, antaŭ ol mi iras hejmen.

Sed Bengt ne havis ion plian por diri pri la ŝuoj de Pipi, nek pri ŝiaj haroj. Tiam Pipi prenis sian ladskatolon per unu mano kaj la fadenbobenon per la alia kaj foriris sekvata de Tomi kaj Anjo.

Kiam ili venis hejmen en la ĝardenon de Pipi, ŝi diris:

—Kara mia, kiel ĉagrene! Jen mi trovis du valorajn objektojn, kaj vi ne ricevis ion. Vi devas serĉi iom pli. Tomi, kial vi ne rigardas en tiun malnovan arbon? Maljunaj arboj ofte estas la plej bonaj lokoj por objektoserĉantoj.

Tomi diris, ke li tute ne kredas, ke Anjo kaj li trovos ion, sed por fari laŭ la volo de Pipi, li ŝovis la manon en truon en la arbotrunko.

—Sed kio, li diris tute surprizita kaj elteris la manon. Per la fingropintoj li tenis belegan notlibron kun leda kovrilo. En speciala ingo troviĝis arĝenta krajoneto.

—Tio ja estas stranga, Tomi diris.

—Jen vi vidas, Pipi diris. Ne estas io pli bona ol esti objek-

toserĉanto. Kaj estas vere strange, ke ne pli multaj ekokupas sin pri tiu laboro. Ĉarpentisto kaj ŝuisto kaj kamentubisto kaj simile, tion ili povas fariĝi, sed objektoserĉanto, ne ne, tio ne taŭgas por ili.

Kaj al Anjo ŝi diris:

—Kial vi ne komencas serĉi en tiu arbostumpo? Oni preskaŭ ĉiam trovas objektojn en malnovaj arbostumpoj.

Anjo enŝovis la manon kaj preskaŭ tuj kaptis koralan kolĉenon. Kaj Tomi kaj ŝi longe staris nur gapante, tiel surprizitaj ili estis. Kaj ili pensis, ke ek de nun ili estos objektoserĉantoj ĉiun tagon.

Pipi maldormis la duonan nokton pilkludante kaj nun ŝi subite sentis sin dormema.

—Mi pensas, ke mi devas iri iom dormi, ŝi diris. Ĉu vi ne povas veni kun mi por bone kovri min?

Kiam Pipi sidis sur la litorando kaj demetis la ŝuojn, ŝi penseme rigardis ilin kaj diris:

—Li volis remi, li diris, tiu Bengt. Haha! Ŝi spirblovis malestime. Mi ja instruos al li remi. Alian fojon!

—Diru, Pipi, Tomi diris estime, kial vi havas tiel grandajn ŝuojn?

—Por povi movi la piedfingrojn, kompreneble, ŝi respondis. Poste ŝi kuŝiĝis por dormi. Ŝi ĉiam dormis kun la piedoj sur la kapkuseno kaj la kapo profunde sub la litkovrilo.

—Tiel oni dormas en Gvatemalo, ŝi asertis. Kaj tio estas la sola ĝusta maniero por dormi. Kaj tiel mi povas movi la piedfingrojn ankaŭ kiam mi dormas.

—Ĉu vi povas ekdormi sen lulkanto, ŝi daŭrigis. Mi devas ĉiam iomete kanti por mi, aliel mi eĉ ne dormetas.

Tomi kaj Anjo aŭdis, ke zumas sub la kovrilo. Estis Pipi, kiu

kante endormigis sin. Silente kaj singarde ili eltretis por ne ĝeni ŝin. Ĉe la pordo ili turnis sin kaj ĵetis lastan rigardon al la lito. Ili nenion alian vidis ol la piedojn de Pipi, kiuj ripozis sur la kuseno. Tie ŝi kuŝis energie movante la piedfingrojn.

Tomi kaj Anjo saltetis hejmen. Anjo forte premis sian koralan kolĉenon en la mano.

—Kiel strange tamen, ŝi diris. Tomi, vi ja ne kredas — ĉu vi kredas, ke Pipi kaŝis ĉi tiujn objektojn jam anticipe?

—Oni ne scias, Tomi diris. Oni vere nenion scias, kiam temas pri Pipi.

## Pipi kaptoludas kun policistoj

**E**n la urbeto baldaŭ esti publike konate, ke naŭjara bubino vivas sola en Vilao Vilaltao. La gesinjoroj de la urbo opiniis, ke tio tute ne decas. Ĉiuj infanoj ja devas havi iun, kiu admonas ilin, kaj ĉiuj infanoj devas viziti lernejon kaj lerni la multiplikan tabelon. Kaj tial ĉiuj gesinjoroj decidis, ke la knabineton en Vilao Vilaltao oni devas tuj loĝigi en infanhejmo.

Iun belan posttagmezon Pipi estis invitinta Tomin kaj Anjon al si je kafo kaj spickukoj. Ŝi aranĝis la kaftrinkadon sur la veranda ŝtuparo. Tie estis sune kaj agrable, kaj ĉiuj floroj en la ĝardeno de Pipi bonodoris. Sinjoro Nilson grimpis supren kaj malsupren sur la veranda barilo. De tempo al tempo la ĉevalo antaŭenigis la nazon por esti regalata per spickuko.

—Kiel mirinde tamen estas vivi, Pipi diris kaj etendis la krurojn plejeble longen.

Ĝuste tiam venis du policistoj en plena uniformo tra la barilpordo.

—Oj, diris Pipi. Mi ŝajnas havi feliĉan tagon ankaŭ hodiaŭ. Policistojn mi plej ŝatas. Post rabarba kompoto.

Kaj ŝi iris al la policistoj kun vizaĝo brilanta pro ravo.

—Ĉu ĉi tio estas tiu knabino, kiu ekloĝis en Vilao Vilaltao? unu el la policistoj demandis.

—Kontraŭe, Pipi diris. Ĉi tio estas tre malgranda onklino, kiu loĝas en la dua etaĝo je la alia flanko de la urbo.

Ŝi diris tion nur por iomete ŝerci kun la policistoj. Sed ili

tute ne opiniis, ke estas amuze. Ili diris, ke ŝi ne provu esti sprita. Kaj ili rakontis, ke bonaj homoj en la urbo aranĝis tiel, ke ŝi povu havi lokon en infanhejmo.

—Mi jam havas lokon en infanhejmo, Pipi diris.

—Kion vi diras, ĉu jam estas aranĝite, unu el la policistoj demandis. Kie situas tiu infanhejmo?

—Ĉi tie, Pipi fiere diris. Mi estas infano, kaj ĉi tio estas mia hejmo. Do ĝi estas infanhejmo. Kaj lokon mi havas ĉi tie. Multe da loko.

—Kara infano, la policisto diris ridetante, tion vi ne komprenas. Vi devas veni al vera infanhejmo kaj ricevi iun, kiu prizorgos vin.

—Ĉu oni rajtas kunpreni ĉevalon en vian infanhejmon? Pipi demandis.

—Ne, kompreneble ne, la policisto diris.

—Mi povas imagi tion, Pipi malgaje diris. Nu, sed simiojn?

—Certe ne, tion vi ja komprenas.

—Jees, Pipi diris, vi do havigu idojn por via infanhejmo aliloke. Mi ne intencas ekloĝi tie.

—Jes, sed ĉu vi ne komprenas, ke vi devas vizitadi lernejon, la policisto diris.

—Kial oni devas vizitadi lernejon?

—Por lerni aferojn, kompreneble.

—Kiajn aferojn? Pipi demandis.

—Ĉion ajn, la policisto diris, amason da utilaj aferoj, ekzemple la multiplikan tabelon.

—Mi bone travivis naŭ jarojn sen ia plutifika tabelo, Pipi diris. Kaj tial mi certe sukcesos ankaŭ estonte.

—Jes, sed imagu, kiel tede estos por vi esti tiel neklera. Imagu, kiam vi iam estos plenkreska kaj eble iu venos deman-

di vin, kiel nomiĝas la ĉefurbo de Portugalio, kaj vi tiam ne povos respondi.

—Certe mi povos respondi, Pipi diris. Mi povos respondi jene: "Se vi tiel nepre devas scii, kiel nomiĝas la ĉefurbo de Portugalio, skribu do rekte al Portugalio kaj demandu!"

—Jes, sed ĉu vi ne kredas, ke vi bedaŭros, ke vi ne mem scias tion?

—Povas esti, Pipi diris. Mi eble kuŝos sendorma kelkfoje dum la vesperoj cerbumante: "Kiel nomiĝas tiu benita ĉefurbo de Portugalio?" Sed oni ja ne rajtas ĉiam amuziĝi, Pipi diris kaj stariĝis sur la manojn dum iom da tempo. Cetere mi estis en Lisbono kun mia patro, ŝi daŭrigis starante renversita, ĉar ŝi povis paroli ankaŭ tiel.

Sed tiam unu el la policistoj diris, ke Pipi ja ne imagu, ke ŝi rajtas fari, kiel ŝi volas. Ŝi devos kuniri al la infanhejmo kaj tion tuj. Li alpaŝis ŝin kaj kaptis ŝian brakon. Sed Pipi rapide liberigis sin, frapetis lin kaj diris: "Via vico!" Kaj antaŭ ol li povis palpebrumi, ŝi saltis sur la verandan barilon. Per kelkaj movoj ŝi estis sur la balkono, kiu estis super la verando. La policistoj ne emis grimpi post ŝi la saman vojon. Tial ili rapidis en la domon kaj supren en la unuan etaĝon. Sed kiam ili venis sur la balkonon, Pipi jam estis duonvoje sur la tegmenton. Ŝi grimpis sur la tegoloj kvazaŭ ŝi mem estus simio. Post momento ŝi staris sur la firsto kaj facile saltis sur la fumtubon. Sube sur la balkono la du policistoj staris gratante siajn harojn, kaj sur la herbejo staris Tomi kaj Anjo rigardantaj Pipin.

—Kiel amuze estas kaptoludi, Pipi kriis. Kaj kiel ĝentile de vi veni ĉi tien. Estas mia feliĉotago ankaŭ hodiaŭ, tion mi klare sentas.

Kiam la policistoj estis cerbumintaj dum momento, ili iris

preni ŝtupetaron, kiun ili starigis kontraŭ unu el la domgabloj, kaj ili suprengrimpis, unu unue, la alia poste, por subenporti Pipin. Sed ili ja aspektis iom timemaj, kiam ili ektretis sur la firston kaj komencis ekvilibrumi en la direkto al Pipi.

—Ne timu, Pipi kriis. Ne estas danĝere. Nur amuze.

Kiam la policistoj venis je distanco de du paŝoj de Pipi, ŝi rapide saltis de la fumtubo, kaj kriante kaj ridante ŝi kuris laŭ la firsto ĝis la alia gablo. Iajn du metroj for de la domo staris arbo.

—Nun mi plonĝas, Pipi kriis, kaj ŝi subensaltis en la verdan kronon de la arbo, kaptis branĉon, pendolis dum momento tien reen kaj poste faligis sin al la tero. Kaj poste ŝi kurĵetis sin al la alia gablo kaj forprenis la ŝtupetaron.

La policistoj aspektis iom konfuzitaj, kiam Pipi saltis, sed eĉ pli konfuzitaj ili fariĝis, kiam ili ekvilibrumis reen laŭ la firsto por malsuprengrimpi laŭ la ŝtupetaro. Unue ili terure koleriĝis kaj kriis al Pipi, kiu staris sube rigardante ilin, ke ŝi tuj remetis la ŝtupetaron, aŭ ŝi spertos ion tute alian.

—Kial vi estas tiel koleraj, Pipi riproĉe diris. Ni ja nur kaptuludas kaj tiam oni ja estu amikoj!

La policistoj cerbumis dum momento, kaj fine unu el ili diris per embarasita voĉo:

—Hej vi, ĉu vi povas esti bonvola kaj remeti la ŝtupetaron por ke ni povu veni malsupren?

—Kompreneble mi volas, Pipi diris kaj tuj remetis la ŝtupetaron. Kaj poste ni ja povas trinki kafon kaj kune amuziĝi.

Sed la policistoj estis vere perfidaj, ĉar ree sur la grundo, ili tuj alkuris Pipin kaj kriis:

—Nun vi ricevos, vi abomena ido!

Sed tiam Pipi diris:

—Ne, nun mi ne plu havas tempon por ludi. Sed estis amuze, tion mi devas agnoski.

Kaj ŝi firme prenis la zonojn de ambaŭ policistoj kaj portis ilin laŭ la ĝardena irejo tra la barilpordo kaj sur la vojon. Tie ŝi demetis ilin kaj daŭris longe, antaŭ ol ili kapablis decidiĝi ekmovi sin.

—Atendu momenton, Pipi kriis, kaj ŝi kuris en la kuirejon. Ŝi alvenis kun paro da spickukaj koroj.

—Ĉu vi volas gustumi, ŝi diris. Certe ne gravas, ke ili estas iom bruligitaj.

Poste ŝi iris al Tomi kaj Anjo, kiuj staris kun la okuloj larĝe malfermitaj kaj nur miris. La policistoj rapidis reen al la urbo kaj diris al ĉiuj geonkloj tie, ke Pipi ne tute taŭgas por infanhejmo. Ili ne rakontis, ke ili estis sur la tegmento. Kaj la geonkloj opiniis, ke estas plej bone lasi Pipin daŭre loĝi en Vilao Vilaltao. Kaj se estas tiel, ke ŝi volos vizitadi la lernejon, ŝi devos mem aranĝi la aferon.

Sed Pipi kaj Tomi kaj Anjo havis vere agrablan posttagmezon. Ili daŭrigis la interrompitan kafofeston. Pipi enbuŝigis dek kvar spickukojn, kaj poste diris:

—Tio, laŭ mia opinio, ne estis la ĝusta speco de policistoj. Ne, ne! Tro multe da babilado pri infanhejmo kaj plutifiko kaj Lisbono.

Poste ŝi ellevis la ĉevalon, kaj ili ĉiuj tri rajdis sur ĝi. Anjo unue timis kaj ne volis, sed kiam ŝi vidis kiel Tomi kaj Pipi amuziĝas, Pipi rajtis levi ankaŭ ŝin sur la ĉevaldorson. Kaj la ĉevalo trotadis ronde ronde en la ĝardeno kaj Tomi kantis:

”Jen venas la svedoj kun bruoj kaj muĝ!”

Kiam Tomi kaj Anjo jam estis en la lito tiun vesperon, Tomi diris:



—Anjo, ĉu vi ne pensas, ke estas bone, ke Pipi transloĝiĝis ĉi tien?

—Kompreneble mi pensas tion, Anjo diris.

—Mi eĉ ne memoras, kion ni ludis antaŭe, antaŭ ol ŝi venis ĉi tien, ĉu vi?

—Je-es, ni ludis kroketon kaj ion tian, Anjo diris. Sed estas ja pli amuze kun Pipi, mi opinias. Kaj kun ĉevaloj kaj simile!

## Pipi komencas la lernejon

**T**omi kaj Anjo kompreneble vizitadis la lernejon. Ĉiun matenon je la oka ili paŝadis man-en-mane kun la lernolibroj subbrake. Je tiu tempo Pipi plej ofte striglis sian ĉevalon aŭ vestis Sinjoron Nilson per lia kostumeto. Aŭ ŝi faris sian matenan gimnastikon, kiu okazis tiel, ke ŝi staris rekta kiel bastono sur la planko kaj faris kvardek tri transkapigajn saltojn unu post la alia. Poste ŝi kutimis sidiĝi sur la kuireja tablo por trinki grandan tason da kafo kun fromaĝa buterpano en plena trankvilo.

Tomi kaj Anjo ĉiam rigardis sopire al Vilao Vilaltao, kiam ili sin trenis al la lernejo. Multe pli volonte ili irus ludi kun Pipi. Se almenaŭ Pipi ankaŭ vizitadus la lernejon, tiam ĉio estus sufiĉe bona.

—Imagu, kian amuzon ni povus havi kune survoje hejmen el la lernejo, Tomi diris.

—Jes, ankaŭ survoje tien, Anjo aldonis.

Ju pli ili pripensis tion, des pli teda estis al ili la fakto, ke Pipi ne vizitadas la lernejon, kaj fine ili decidis, ke ili provu persvadi ŝin komenci.

—Vi ne imagas, kiel afablan instruistaron ni havas, Tomi ruze diris al Pipi iun posttagmezon, kiam li kaj Anjo faris viziton al Vilao Vilaltao, post kiam ili zorge faris siajn hejmtaskojn.

—Se vi scius, kiel amuze estas en la lernejo, Anjo asertis. Mi freneziĝus, se mi ne rajtus vizitadi ĝin.

Pipi sidis sur skabelo kaj lavis siajn piedojn en kuvo. Ŝi diris nenion, nur movis la piedfingrojn, tiel ke la akvo ĉirkaŭŝprucis.

—Oni ne devas esti tie tiel terure longe, Tomi daŭrigis. Nur ĝis la dua horo.

—Jes, kaj ni plue havas feriojn kristnaske, paske kaj some-re, Anjo diris.

Pipi penseme mordis sian dikan piedfingron, sed daŭre sidis silenta. Subite ŝi decide elverŝis ĉiun akvon sur la kuirejan plankon, tiel ke la pantalono de Sinjoro Nilson, kiu sidis iom fore ludanta per spegulo, fariĝis tute malseka.

—Estas maljuste, Pipi severe diris, ignorante la malesperon de Sinjoro Nilson pro la malseka pantalono. Estas absolute maljuste! Mi ne intencas toleri tion!

—Kion, Tomi scivolis.

—Post kvar monatoj estos kristnasko kaj tiam vi havos kristnaskajn feriojn. Sed mi, kion mi havos? La voĉo de Pipi sonis malĝoja. Neniajn kristnaskajn feriojn, eĉ ne la plej etan kristnaskan ferieton, ŝi diris plende. Devas okazi ŝanĝo. Morgaŭ mi komencos la lernejon.

Tomi kaj Anjo frapis la manojn pro ravo.

—Hurao! Ni do atendos vin ekster nia pordo je la oka.

—Ne, ne, Pipi diris, tiel frue mi ne povas komenci. Kaj cetero mi verŝajne rajdos al la lernejo.

Kaj tion ŝi faris. Ekzakte je la deka la postan tagon ŝi levis sian ĉevalon de la verando, kaj iom poste ĉiuj homoj en la urbeto urĝis kuri al la fenestroj por vidi, kiu ĉevalo senbridiĝis. Tio estas, ili kredis, ke ĝi senbridiĝis. Sed tion ĝi ne faris.

Nur estis Pipi, kiu urĝis veni al la lernejo. Per plej sovaĝa galopo ŝi enrajdis la lernejan korton, saltis de la ĉevalo en plena rapido, ligis ĝin ĉe arbo kaj ŝirmalfermis la pordon de la lernoĉambro kun tia bruo, ke Tomi kaj Anjo kaj iliaj afablaj klaskamaradoj eksaltis ĉe siaj pupitroj.

—Ho hej, Pipi kriis kaj svingis sian grandan ĉapelon. Ĉu mi venas ĝustatempe por la plutifiko?

Tomi kaj Anjo jam rakontis al sia instruistino, ke venos nova knabino, kiu nomiĝas Pipi Ŝtrumpolonga. La instruistino mem ankaŭ jam aŭdis pri Pipi en la urbeto. Kaj ĉar ŝi estis tre bona kaj afabla instruistino, ŝi jam decidis, ke ŝi faros ĉion por ke Pipi sentu sin hejme en la lernejo.

Pipi ĵetis sin sur liberan seĝon sen ies admono. Sed la instruistino ne atentis la senzorgan manieron de Pipi. Ŝi nur afable diris:

—Bonvenon al la lernejo, eta Pipi. Mi esperas, ke vi sentos vin hejme kaj ke vi lernos multon.

—Jes, kaj mi esperas, ke mi havos kristnaskajn feriojn, Pipi diris. Tial mi venis ĉi tien. Justeco antaŭ ĉio!

—Ĉu vi unue povas diri al ni vian plenan nomon, la instruistino diris, por ke mi enskribu vin en la lernejo?

—Mia nomo estas Pipilota Viktualia Rulkurtena Krispmenta Efraimidino Ŝtrumpolonga, filino de kapitano Efraimo Ŝtrumpolonga, iam la teroro de la maroj, nuntempe negroreĝo. Pipi fakte estas nur mia karesnomo, ĉar paĉjo opiniis, ke estas tro longe diri Pipilota.

—Ĉu tiel, la instruistino diris, ja, do ni ankaŭ nomu vin Pipi. Sed ĉu ni nun iom provu viajn sciojn, ŝi daŭrigis. Vi ja estas granda knabino kaj certe jam scias multon. Eble ni kom-

encu per kalkulado. Nu, Pipi, ĉu vi povas diri al mi, kiom fariĝas sep kaj kvin kune?

Pipi rigardis ŝin mirigita kaj malkontenta. Kaj ŝi diris:

—Nu, se ci ne scias tion mem, ne kredu, ke mi rakontos tion al ci!

Ĉiuj infanoj fiksrigardis Pipin terurigitaj. Kaj la instruistino klarigis al ŝi, ke tiel oni ne rajtas respondi en la lernejo. Oni ne nomu la instruistinon "ci", sed oni nomu ŝin "vi".

—Pardonu min, Pipi diris penteme. Tion mi ne sciis. Mi neniam plu diros tiel.

—Ne, tion mi esperas, la instruistino diris. Kaj mi rakontos al vi, ke sep kaj kvin fariĝas dek du.

—Jen, Pipi diris. Ci ja mem sciis, kial do ci demandas? Ho, mi stultulino, nun mi denove diris "ci" al ci. Pardonon, ŝi diris kaj forte pinĉis sian orelon.

La instruistino decidis ŝajnigi, ke ŝi ne aŭdis. Ŝi daŭrigis la ekzamenadon.

—Nu, Pipi, kiom vi kredas, ke estas ok kaj kvar?

—Proksimume sesdek sep, Pipi kredis.

—Tute ne, la instruistino diris. Ok kaj kvar estas dek du.

—Ne, kara mia, nun ci troigas, Pipi diris. Ci mem ĵus diris, ke estas sep kaj kvin, kiuj faras dek du. Ia ordo devas esti ankaŭ en la lernejo. Cetere, se ci tiel infanece ŝatas tiujn stultajojn, kial ci ne sidiĝas sola en angulon kalkulante, kaj lasas nin en paco, tiel ke ni povu kaptoludi?

—Sed ve, nun mi denove diris "ci", ŝi kriis terurigite. Ĉu ci povas pardoni min ĉi tiun lastan fojon ankaŭ, kaj mi provos memori iom pli bone estonte?

La instruistino diris, ke ŝi tion faros. Sed ŝi ne kredis, ke

havas sencon provi instrui al Pipi pli da kalkulado. Ŝi komencis anstataŭe demandi la aliajn infanojn.

—Ĉu Tomi povas respondi al mi pri ĉi tio? ŝi diris. ”Se Liza havas sep pomojn kaj Aksel havas naŭ pomojn, kiom da pomoj ili havas kune?”

—Ja, diru tion, Tomi, Pipi aldonis. Kaj samtempe vi povas respondi al mi pri tio: ”Se Liza ekhavas doloron en la ventro kaj Aksel ankoraŭ pli, kies estas la kulpo kaj kie ili ŝtelis la pomojn?”

La instruistino ŝajnis, ke ŝi nenion aŭdis kaj turnis sin al Anjo.

—Nun, Anjo, vi ricevos ekzemplon: ”Gustavo faris kun siaj kamaradoj lernejan ekskurson. Li havis unu kronon, kiam li ekveturis, kaj sep oerojn kiam li hejmenvenis. Kiom li foruzis?”

—Jes, jes, Pipi diris, kaj mi volas ankaŭ scii, kial li estis tiel malavara, kaj ĉu tio, kion li aĉetis, estis limonado, kaj ĉu li zorge lavis siajn orelojn, antaŭ ol li ekveturis de hejme.

La instruistino decidis tute lasi la kalkuladon. Ŝi pensis, ke Pipi eble preferus lerni legi. Tial ŝi elprenis bildotabulon kun erinaco. Antaŭ la nazo de la erinaco estis la litero ”e”.

—Nun, Pipi, vi vidos ion amuzan, ŝi vigle diris. Jen vi vidas eeeeerinacon. Kaj ĉi tiu litero antaŭ la eeeeerinacon nomiĝas ”e”.

—Ho, tion mi ne povas kredi, Pipi diris. Al mi ŝajnas, ke tio aspektas kiel eta larvo. Sed mi tre volonte sciis, kion komunan erinaco havas kun larvo.

La instruistino elprenis alian bildotabulon kun serpento kaj klarigis al Pipi, ke la litero antaŭ ĝi nomiĝas ”s”.

—Parolante pri serpentoj, jes ja, Pipi diris, mi certe neniam



—Vi kantu, mi dume ripozos, ŝi diris. Tro da scio povas rompi la plej sanan homon.

Sed nun la pacienco de la instruistino absolute elĉerpiĝis. Ŝi ordonis, ke ĉiuj infanoj iru sur la la lernejan korton, ĉar ŝi volis private paroli kun Pipi.

Kiam la instruistino kaj Pipi restis solaj, Pipi ekstaris kaj aliris la katedron.

—Ĉu ci scias, ŝi diris, mi volas diri, ĉu ci scias, fraŭlino, estis ege amuze veni ĉi tien kaj vidi, kiel estas ĉe vi. Sed mi ne kredas, ke mi emas plu viziti la lernejon. Estu kiel ajn kun la kristnaskaj ferioj. Estas tro multe da pomoj kaj erinacoj kaj serpentoj kaj simile. Mi sentas veran kapturniĝon. Mi esperas, ke ci, fraŭlino, ne malĝojos pro tio.

Sed tiam la instruistino diris, ke ŝi certe malĝojos, pleje ĉar Pipi ne volis kondukti bone, kaj ke neniu knabino, kiu kondukas kiel Pipi, rajtas vizitadi la lernejon, kiom ajn ŝi tion deziregu.

—Ĉu mi kondukis malbone, Pipi diris tre surprizita. Sed tion mi ne mem sciis, ŝi diris kaj aspektis tre malgaja. Neniu povis aspekti tiel malgaja kiel Pipi, kiam ŝi estis malĝoja. Ŝi staris silenta dum momento kaj poste ŝi diris kun tremanta voĉo:

—Ci komprenas, fraŭlino, ke kiam oni havas patrinon, kiu estas anĝelo, kaj patron, kiu estas negroroĝo, kaj oni mem veliris sur la maroj dum la tuta vivo, tiam oni ne bone scias, kiel kondukti en la lernejo inter ĉiuj pomoj kaj erinacoj.

Tiam la instruistino diris, ke ŝi komprenas tion, kaj ke ŝi ne plu estis ĉagrenita je Pipi kaj ke Pipi eble povos reveni al la lernejo, kiam ŝi estos iom pli aĝa. Kaj tiam Pipi diris, brileganta pro ĝojo:



—Mi pensas, ke ci estas tre afabla, fraŭlino. Kaj jen por vi, fraŭlino!

El la poŝo Pipi prenis belan oran horloĝeton, kiun ŝi metis sur la katedron. La instruistino diris, ke ŝi ne povas akcepti tiel multekostan objekton de Pipi, sed tiam Pipi diris:

—Ci devas! Aliel mi revenos ĉi tien morgaŭ, kaj tio estus ja bela spektaklo.

Poste Pipi elkuris sur la lernejan korton kaj saltis sur la ĉevalon. Ĉiuj infanoj amasiĝis ĉirkaŭ ŝi por karesi la ĉevalon kaj rigardi ŝian foriron.

—Ne, mi vere preferas la lernejojn en Argentino, Pipi diris superece kaj malsupren rigardis al la infanoj. Ilin vi vizitadu. Tie la paskaj ferioj komenciĝas tri tagojn post la fino de la kristnaskaj ferioj, kaj kiam la paskaj ferioj finiĝis, pasas tri tagoj ĝis la someraj ferioj. La someraj ferioj finiĝas la unuan de novembro kaj poste oni havas penigan periodon ĝis la komenciĝo de la kristnaskaj ferioj la dekanon de novembro. Sed tion oni devas akcepti, ĉar ĉiukaze oni havas neniajn hejmtaskojn. Estas severe malpermesite fari hejmtaskojn en Argentino. Okazas foje, ke iu aŭ alia argentina ido kaŝiras en vestejon kaj sidas tie sekrete farante hejmtaskojn, sed indulgu lin, se lia panjo rimarkas tion. Kalkuladon ili tute ne havas en la tieaj lernejoj, kaj se estas iu ido, kiu scias, kiom estas sep kaj kvin, li devas stari en la hontangulo la tutan tagon, se li estas tiel stulta, ke li tion rakontas al la instruistino. Legadon ili havas nur vendrede, kaj tion nur se ekzistas iaj libroj por legi. Sed ne ekzistas.

—Sed kion ili faras en la lernejo, bubeto mirdemandis.

—Manĝas bombonojn, Pipi decide diris. Longa tubo kondukas el proksima bombonfabriko en la klasĉambron kaj tie

eltorentas bombonoj la tutan tagon, kaj la infanoj estas ple-  
ne okupitaj per manĝado.

—Sed kion faras tie la instruistino, knabino demandis.

—Forprenas al la infanoj la paperon de la bombonoj, vi stultulino, Pipi diris. Vi ja ne kredas, ke ili tion faras mem? Maloftege! Ili eĉ ne vizitadas la lernejon mem. Ili sendas sian fraton.

Pipi svingis sian grandan ĉapelon.

—Ĉaŭ, idoj, ŝi gaje kriis. Nun vi ne vidos min dum kelka tempo. Sed ĉiam memoru, kiom da pomoj Aksel havis, aŭ vi estos malfeliĉaj. Hahaha!

Kun tintanta rido Pipi elrajdis tra la pordego, tiel ke la ŝtonetoj ŝprucis de la ĉevalhufoj kaj la fenestrovitroj de la lernejo tintis.

## Pipi sidas sur barilpordo kaj grimpas sur arbo

**E**kster Vilao Vilaltao sidis Pipi, Tomi kaj Anjo. Pipi sidis sur unu fosto de la barilpordo, Anjo sur la alia kaj Tomi sidis sur la barilpordo. Estis varma kaj bela tago fine de aŭgusto. Pirarbo, kiu kreskis tute apud la barilpordo, etendis siajn branĉojn tiel longe malsupren, ke la infanoj povis sidante pluki la plej bongustajn flavruĝajn aŭgustajn pirojn sen granda peno. Ili maĉis kaj manĝis kaj elkraĉis la pirorestaĵojn sur la vojon.

Vilao Vilaltao situis ĝuste tie, kie finiĝas la urbeto kaj komenciĝas la kamparo kaj kie la strato fariĝas kampara vojo. La enloĝantoj de la urbeto tre ŝatis promeni en la direkton de Vilaltao, ĉar tie estis la plej belaj ĉirkaŭaĵoj de la urbo.

Ĝuste kiam la infanoj sidis tie manĝante pirojn, knabino venis irante sur la strato el la urbo. Kiam ŝi ekvidis la infanojn, ŝi haltis kaj demandis:

- Ĉu vi vidis mian patron preterpasi ĉi tie?
- Nja, Pipi diris. Kiel li aspektas, ĉu li havas blujajn okulojn?
- Jes, diris la knabino.
- Ĉu meze granda, nek tro alta nek tro malalta?
- Jes, diris la knabino.
- Ĉu kun nigra ĉapelo kaj nigraj ŝuoj?
- Jes, ĝuste tiel, la knabino fervore diris.
- Ne, lin ni ne vidis, Pipi decide diris.

La knabino aspektis elreviĝinta kaj senvorte foriris.

—Atendu iomete, Pipi kriis post ŝi. Ĉu li estas kalva?

—Ne, li certe ne estas, la knabino kolere diris.

—Bonŝance por li, Pipi diris kaj elkraĉis pirorestaĵon.

La knabino forrapidis, sed tiam Pipi kriis:

—Ĉu li havas nenature grandajn orelojn, kiuj pendas ĝis la ŝultroj?

—Ne, la knabino diris kaj surprizita turnis sin. Ĉu vi volas diri, ke vi vidis preterpasi viron je tiel grandaj oreloj?

—Mi neniam vidis iun, kiu iras je la oreloj, Pipi diris. Ĉiuj, kiujn mi konas, iras per la piedoj.

—Ba, kiel stulta vi estas, mi volis demandi, ĉu vi vere vidis viron kun tiel grandaj oreloj?

—Ne, Pipi diris. Ne ekzistas homo kun tiel grandaj oreloj. Tio estus absurda. Kiel tio aspektus? Oni ne povas havi tiel grandaj orelojn.

—Almenaŭ ne en ĉi tiu lando, ŝi aldonis post pensoplena paŭzo. En Ĉinio ja estas iom aliel. Mi iufoje vidis en Ŝanhajo ĉinon. Liaj oreloj estis tiel grandaj, ke li povis uzi ilin kiel pelerinon. Kiam pluvis, li nur rampis sub la orelojn kaj plene bonfartis. Sed la oreloj ja tute ne bonfartis. Se estis speciale malbona vetero, li kutimis inviti siajn amikojn kaj konatojn bivaki sub siaj oreloj. Tie ili sidis kantante siajn melankoliajn kantojn dum la malbona vetero preterpasis. Ili tre ŝatis lin pro liaj oreloj. Haj Ŝan li nomiĝis. Vi devus vidi, kiam Haj Ŝan kuris al sia laborejo matene! Li ĉiam venis kurante en la lasta minuto, ĉar li tre ŝatis dormi longe en la matenoj, kaj imagu, kiel belete aspektis, kiam li venis rapidante kun la oreloj kiel du grandaj, flavaj veloj post si.

La knabino haltis kaj nun gapante aŭskultis Pipin. Kaj To-

mi kaj Anjo forgesis manĝi pli da piroj. Ankaŭ ili estis plene okupitaj per aŭskultado.

—Li havis pli da infanoj ol li povis kalkuli, kaj la plej malgranda nomiĝis Petro, Pipi diris.

—Sed ĉina infano ne povas nomiĝi Petro, Tomi kontraŭdiris.

—Ĝuste tion lia edzino diris al li. ”Ĉina infano ja ne povas nomiĝi Petro”, ŝi diris. Sed Haj Ŝan estis tiel obstinega, ke li diris, ke aŭ la bubo nomiĝu Petro aŭ nenio ajn. Kaj li sidiĝis en angulo kaj tiris la orelojn super la kapon kaj obstinis. Kaj tiam lia kompatinda edzino kompreneble devis cedi, kaj la bubo rajtis nomiĝi Petro.

—Ĉu tiel, Anjo diris.

—Li estis la plej malica bubo, kiu troviĝis en tuta Ŝanhajo, Pipi daŭrigis. Tiel postulema kun la manĝo, ke la patrino estis vere malfeliĉa. Vi ja scias, ke oni manĝas hirundajn nestojn en Ĉinio? Kaj tie la patrino sidis kun tuta telero plena je hirundaj nestoj kaj volis manĝigi lin. ”Jen Petreto, nun ni prenunu hirundan neston por paĉjo!” Sed Petro nur tenis la buŝon fermita kaj skuis la kapon. Fine Haj Ŝan tiel ekkoleris, ke li diris, ke oni ne pretigu ian novan manĝaĵon al Petro, antaŭ ol li manĝis unu hirundoneston por paĉjo. Kaj kiam Haj Ŝan estis ion dirinta, tiel fariĝis. La sama hirundonesto eniris kaj eliris la kuirejon de majo ĝis oktobro. La dekkvaran de julio lia patrino petegis, ke ŝi rajtu doni al Petro kelkajn viandbulojn, sed Haj Ŝan rifuzis.

—Stultaĵoj, diris la knabino sur la strato.

—Jes, guste tion Haj Ŝan diris, Pipi daŭrigis. ”Stultaĵoj”, li diris. ”Kompreneble la bubo povas manĝi la hirundoneston,

se li nur ĉesas obstinadi”. Sed Petro nur tenis la buŝon fermita la tutan tempon de majo ĝis oktobro.

—Jes, sed kiel li do povis vivi, Tomi diris surprizite.

—Li ja ne povis vivi, Pipi diris. Li mortis. Pro nura obstineco. La dekokan de oktobro. Kaj estis enterigita la deknaŭan. Kaj la dudekan hirundo enflugis tra la fenestro kaj demetis ovon en la hirundoneston, kiu staris sur la tablo. Tiel ĝi tamen fariĝis utila. Nenia malutilo okazis, Pipi diris gaje. Poste ŝi penseme rigardis la knabinon, kiu staris sur la strato kun sufiĉe konsternita aspekto.

—Kiel stranga vi aspektas, Pipi diris. Pri kio temas? Ĉu vi kredas, ke mi sidas ĉi tie kaj mensogas? Ĉu tiel? Tiakaze vi nur protestu, Pipi diris minace kaj suprenfaldis la manikojn.

—Ne, tute ne, la knabino diris terurigita. Mi ja ne volas diri, ke vi mensogas, sed ...

—Ĉu ne, Pipi diris. Sed ĝuste tion mi faras. Mi mensogas tiel, ke mia lango nigriĝas, ĉu vi ne aŭdas tion? Ĉu vi vere kredas, ke infano povas vivi sen manĝo de majo ĝis oktobro? Ne gravas, kompreneble mi scias, ke ili povas bone travivi sen manĝo dum tri, kvar monatoj, sed de majo ĝis oktobro, tio estas ja tute stulta. Vi ja komprenas, ke estas mensogo. Ne permesu, ke homoj kredigu al vi kion ajn!

Tiam la knabino foriris kaj ne plu turnis sin.

—Kiel kredemaj homoj povas esti, Pipi diris al Tomi kaj Anjo. De majo ĝis oktobro, estas ja tro stulte!

Kaj ŝi kriis post la knabino:

—Ne, ni ne vidis vian patron! Ni ne vidis iun kalvulon dum la tuta tago. Sed hieraŭ dek sep preteriris. Brak-en-brake!

La ĝardeno de Pipi estis vere ĉarma. Ĝi ne estis bone flegata,

tute ne, sed estis tie tre plaĉaj herbotapiŝoj, kiujn ŝi neniam tondis, kaj malnovaj rozuoj, kiuj estis plenaj je blankaj kaj flavaj kaj rozkoloraj rozoj, certe ne tre altkvalitaj, sed ili dolĉe bonodoris. Relative multaj fruktarboj ankaŭ kreskis tie kaj — plej bone el ĉio — kelkaj maljunaj kverkoj kaj ulmoj, sur kiuj oni povis bone grimpi.

En la ĝardeno de Tomi kaj Anjo la grimparboj ne abundis kaj ilia patrino ĉiam timis, ke la infanoj falos kaj frapvundos sin. Tial ili apenaŭ multe grimpis dum sia vivo. Sed nun Pipi diris:

—Ĉu ni grimpu sur tiun kverkon?

Tomi tuj saltis de la barilpordo, feliĉa pro la propono. Anjo estis iom pli hezitema, sed kiam ŝi vidis, ke estas grandaj tuberoj sur la arbotrunko, sur kiuj oni povas treti, ankaŭ ŝi pensis, ke estus amuze provi.

Iajn du metrojn super la tero la kverko disiĝis en du trunkojn, kaj kie ĝi disiĝis estis kvazaŭ ĉambreto. Ne pasis longa tempo ĝis ĉiuj tri infanoj sidis tie. Super iliaj kapoj la kverko etendis sian foliaron kiel grandan, verdan plafonon.

—Ĉi tie ni povus trinki kafon, Pipi diris. Mi enkuros por kuiru kelkajn gutojn.

Tomi kaj Anjo aplaŭdis kaj kriis ”bone!”.

Ne daŭris longe, antaŭ ol Pipi havis la kafon preta. Kaj bulkojn ŝi estis bakinta la antaŭan tagon. Ŝi stariĝis sub la kverko kaj komencis suprenĵeti kafotasojn. Tomi kaj Anjo kaptis ilin. Foje la kverko kaptis, tiel ke du kaftasoj rompiĝis. Sed Pipi enkuris por novaj. Poste estis la vico de la bulkoj, kaj dum kelka tempo kirliĝis bulkoj en la aero. Ili almenaŭ ne rompiĝis. Fine Pipi suprengrimis kun la kafokruĉo en unu mano.

Kremon ŝi havis en botelo en la poŝo kaj sukeron en skatoleto.

Tomi kaj Anjo opiniis, ke kafo neniam antaŭe gustis tiel bone. Dum ordinaraj tagoj ili ne rajtis trinki kafon, nur kiam ili estis gastoj. Kaj nun ili ja estis gastoj. Anjo disverŝis iom da kafo sur la genuojn. Unue estis varme kaj malseke, poste fariĝis malvarme kaj malseke, sed tio ne gravas, Anjo diris.

Kiam ili estis pretaj, Pipi ĵetis la tasojn malsupren sur la herbotapiŝon.

—Mi volas vidi kiel fortikan porcelanon oni faras nuntempe, ŝi diris. Unu taso kaj ĉiuj tri teleretoj eltenis, rimarkinde. Kaj al la kafokruĉo nur la beko rompiĝis.

Subite Pipi komencis grimpi iom pli alten sur la arbo.

—Ho, kia surprizo, ŝi subite kriis. La arbo estas kava!

Rekte en la trunkon kondukis granda truo, kiun la foliaro vidkaŝis al la infanoj.

—Ho, ĉu ankaŭ mi rajtas suprengrimpi por rigardi, Tomi diris. Sed li ne ricevis respondon. Pipi, kie vi estas, li kriis maltrankvile.

Tiam ili aŭdis la voĉon de Pipi, ne de supre, sed de longe sube. Sonis kvazaŭ ĝi venus el la subtero.

—Mi estas en la arbo. Ĝi estas kava ĝis la tero. Se mi rigardas tra fendeto, mi povas vidi la kafokruĉon sur la herbo ekstere.

—Ho, kiel vi suprenvenos, Anjo kriis.

—Mi neniam suprenvenos, Pipi diris. Mi restos ĉi tie ĝis mi ricevos pension. Kaj vi devos doni manĝon al mi tra la truo tie supre. Kvin aŭ sesfoje ĉiutage.

Anjo ekploris.

—Kial funebri, kial plendi? Pipi diris. Anstataŭe malsup-



renvenu ankaŭ vi ĉi tien kaj ni povos ludi, ke ni mortmalsatas en prizona kavo.

—Neniam vivanta, Anjo diris. Por esti sekura ŝi tutsimple degrimpis de la arbo.

—Anjo, mi vidas vin tra la fendo, Pipi kriis. Ne tretu sur la kafokruĉon! Estas malnova afabla kafkruĉo, kiu neniam ĝenis iun homon. Kaj ĝi ja tute ne kulpas, ke ĝi ne plu havas bekon.

Anjo aliris la arbotrunkon kaj tra la fendeto ŝi vidis la ekstreman pinton de la montrofigro de Pipi, sed ŝi daŭre estis maltrankvila.

—Pipi, ĉu vi vere ne povas suprenveni, ŝi demandis.

La montrofigro de Pipi malaperis kaj ne daŭris eĉ minuton antaŭ ol ŝia vizaĝo etendiĝis tra la truo supre sur la arbo.

—Eble mi povos, se mi vere klopodas, ŝi diris kaj forŝovis la foliaron per la manoj.

—Se estas tiel facile suprengrimpigi, diris Tomi, kiu daŭre restis supre sur la arbo, tiam ankaŭ mi volas veni malsupren por iomete mortmalsati.

—Nja, Pipi diris, mi pensas, ke ni alportu ŝtupetaron.

Ŝi elrampis el la truo kaj rapide glitis sur la teron. Poste ŝi kuris por alporti ŝtupetaron, pene trenis ĝin sur la arbon kaj enŝovis ĝin tra la truo.

Tomi deziregis malsupreniri. Estis iom penige grimpi ĝis la truo, ĉar ĝi sidis alte, sed Tomi estis kuraĝa. Li ankaŭ ne timis eniri la malhelan kavon de la arbotrunko. Anjo vidis lin malaperi kaj ŝi tre miris, ĉu ŝi iam revidos lin. Ŝi provis rigardi tra la fendo.

—Anjo, ŝi aŭdis la voĉon de Tomi. Vi ne povas imagi, kiel mirinde estas ĉi tie. Ankaŭ vi devas enveni. Tute ne estas dan-

ĝere, kiam vi havas ŝtupetaron, sur kiu grimpi. Se vi faras tion nur unufoje, vi poste ne volas fari ion alian.

—Ĉu estas certe, Anjo demandis.

—Absolute, Tomi respondis.

Tiam Anjo kun tremantaj kruroj denove grimpis sur la arbon, kaj Pipi helpis ŝin pri la lasta malfacila parto. Ŝi iom retiriĝis, kiam ŝi vidis, kiel mallume estas en la trunko. Sed Pipi tenis ŝian manon kaj kuraĝigis ŝin.

—Ne timu, Anjo, ŝi aŭdis Tomin de malsupre. Nun mi vidas viajn krurojn, kaj mi certe kaptos vin, se vi falos.

Anjo tamen ne falis, sed feliĉe venis al Tomi. Post momento Pipi venis.

—Ĉu ne estas amuze ĉi tie, Tomi diris.

Kaj Anjo devis konsenti, ke tiel estas. Tute ne estis tiel mallume, kiel ŝi antaŭe kredis, ĉar lumo enfalis tra la fendo. Anjo iris tien por kontroli, ke ankaŭ ŝi povas vidi la kafokruĉon sur la herbejo ekstere.

—Ĉi tion ni uzos kiel nian kaŝejon, Tomi diris. Neniu povos scii, ke ni troviĝas ĉi tie. Kaj se ili iros serĉante nin ĉi ekstere, ni povos vidi ilin tra la fendo. Kaj tiam ni ridos.

—Ni povos havi branĉeton kaj elmeti ĝin tra la fendo kaj tikli ilin iomete, Pipi diris. Tiel ili kredos, ke fantomas.

Je tiu penso la infanoj tiel ekĝojis, ke ĉiuj tri ĉirkaŭbrakis unu la alian. Tiam ili aŭdis la gongon, kiu vokis al vespermanĝo hejme ĉe Tomi kaj Anjo.

—Kiel stulte, Tomi diris. Nun ni devas iri hejmen. Sed ni revenos ĉi tien morgaŭ, tuj kiam ni venos hejmen de la lernejo.

—Faru tion, Pipi diris.

Kaj ili suprengrimis laŭ la ŝtupetaro, unue Pipi, poste Anjo kaj laste Tomi. Kaj ili grimpis de sur la arbo, unue Pipi, poste Anjo kaj laste Tomi.

## Pipi aranĝas ekskurson

**H**odiaŭ ni ne iros al lernejo, Tomi diris al Pipi, ĉar ni havas feriojn pro purigado.

—Ha, Pipi kriis. Denove maljustaĵo! Mi ja ne ricevas ferion pro purigado, kvankam mi ĝin vere bezonus. Nur vidu, kiel aspektas la kuireja planko! Sed cetere, ŝi aldonis, kiam mi ĝuste pripensas la aferon, mi tamen povas purigi sen ferio. Kaj tion mi intencas fari nun, ferio aŭ ne. Mi volus vidi tiun, kiu povas malhelpi min! Sidiĝu sur la kuireja tablo por ke vi ne malhelpu.

Tomi kaj Anjo obeeme rampis sur la tablon, kaj tien saltis ankaŭ Sinjoro Nilson, kiu kuŝiĝis sur la genuojn de Anjo por dormi.

Pipi varmigis grandan kaldronon kun akvo, kiun ŝi poste senhezite elverŝis sur la kuirejan plankon. Poste ŝi deprenis siajn grandaj ŝuojn kaj ordeme metis ilin sur la panpladon. Ŝi fiksis du lavbrosojn sur siajn nudajn piedojn, kaj glitis sur la tuta planko, tiel ke plaŭdis, kiam ŝi plugis tra la akvo.

—Mi ja devus esti glitkura princino, ŝi diris kaj levis unu piedon rekte supren en la aeron, tiel ke la lavbroso sur ŝia maldekstra piedo frakasis parton de la plafona lampo.

—Gracon kaj ĉarmon mi almenaŭ havas, ŝi daŭrigis kaj faris viglan salton trans seĝon, kiu baris ŝian vojon.

—Jen ja, nun certe estas pure, ŝi fine diris kaj deprenis la brosojn.

—Ĉu vi ne sekigos la plankon, Anjo scivolis.

—Ne, ĝi povas aersekiĝi, Pipi diris. Mi ne kredas, ke ĝi malvarmumiĝos, se ĝi nur moviĝadas.

Tomi kaj Anjo rampis de la tablo kaj transtretis la plankon tre singarde por ne malsekiĝi.

Ekstere la suno brilis el klarblua ĉielo. Estis tia brila septembra tago, dum kiu oni ekemas promeni en la arbaro. Pipi ekhavis ideon.

—Pripensu, ĉu ni prenu Sinjoron Nilson kun ni kaj ekiru ekskursi?

—Ho jes, Tomi kaj Anjo kriis entuziasme.

—Kuru hejmen kaj demandu vian panjon, Pipi diris, kaj dume mi preparos la provianton.

Tomi kaj Anjo opiniis, ke tio estas bona propono. Ili kuregis hejmen kaj ne daŭris longe ĝis kiam ili revenis. Tiam Pipi jam staris ekster la barilpordo kun Sinjoro Nilson sur la ŝultro, migrobastono en unu mano kaj granda korbo en la alia.

La infanoj unue mallonge sekvis la kamparan vojon, sed deturnis poste en arbareton, kie agrabla padeto serpentumis inter betuloj kaj aroj da aveluoj. Baldaŭ ili venis al barilpordo, kaj malantaŭ ĝi situis ankoraŭ pli bela arbareto. Sed ĝuste antaŭ la barilpordo staris bovino, kiu ne ŝajnis voli movi sin. Anjo kriis al ĝi, kaj Tomi kuraĝe aliris kaj provis forpeli ĝin, sed ĝi ne movis sin el la loko, nur rigardaĉis la infanojn per siaj grandaj bovinokuloj. Por finigi ĉi tion, Pipi demetis la korbon, aliris kaj flankenportis la bovinon, kiu konsternita fortrotis inter la aveluojn.

—Imagu, ke bovinoj povas esti tiel obstinaj, Pipi diris kaj pied-ĉe—piede transsaltis la barilpordon. Kaj kio estas la re-

zulto? Ke la virbovoj fariĝas obstaj, kompreneble! Estas ja sufiĉe terure pensi pri tio.

—Kia belega arbareto, Anjo ravite kriis kaj surgrimpis ĉiun ŝtonon, kiun ŝi vidis. Tomi kunportis la ponardon, kiun li ricevis de Pipi, kaj li tranĉis migrobastonojn kaj al si kaj al Anjo. Li ankaŭ tranĉetis sian dikfingron, sed tio ne gravis.

—Eble oni eĉ devus kolekti iom da fungoj, Pipi diris, kaj rompis belan ruĝan muŝagarikon. Mi scivolas, ĉu ĝi estas manĝebla, ŝi daŭrigis. Ĉiukaze, ĝi ne estas trinkebla, tiom mi scias, kaj restas do apenaŭ io alia ol manĝi ĝin. Eble oni povas!

Ŝi demordis grandan pecon de la fungo kaj englutis ĝin.

—Eblis, ŝi konstatis kun ĝojo. Jes ja, ĉi tiun ni stufos alian fojon, ŝi diris kaj ĵetis la fungon alten super la arbopintojn.

—Kion vi havas en la korbo, Pipi? Anjo demandis. Ĉu estas io bongusta?

—Tion mi ne diras por mil kronoj, Pipi asertis. Unue ni trovu taŭgan lokon, kie ni povas aranĝi la manĝon.

La infanoj komencis fervore serĉi tian lokon. Anjo trovis grandan platan ŝtonon, kiun ŝi opiniis konvena, sed tie rampis amaso da ruĝaj formikoj kaj "ĉe ili mi ne volas sidi, ĉar mi ne konas ilin", Pipi diris.

—Jes, kaj ili mordas, Tomi diris.

—Ĉu vere, Pipi diris. Do remordu!

Tiam Tomi ekvidis etan maldensejon inter kelkaj abeluloj kaj li volis, ke ili eksidu tie.

—Ne-he, tie ne estas sufiĉe sune, por ke miaj lentugoj bonfartu, Pipi diris. Kaj mi opinias, ke lentugoj estas tre belaj.

Iom fore kuŝis roko, kiun ili povis facile kaj komforte sur-

grimpi. Kaj sur la roko estis malgranda suna plataĵo, precize kiel balkono. Tie ili sidiĝis.

—Nun vi fermu la okulojn, dum mi preparas la manĝon, Pipi diris. Tomi kaj Anjo plejeble forte kunpremis la okulojn kaj ili aŭdis, kiel Pipi malfermis la korbon kaj kraketigis paperon.

—Unu, du, dek naŭ, nun vi rajtas rigardi, Pipi fine diris. Tiam ili rigardis kaj ili kriis pro raviĝo, kiam ili vidis ĉiujn bongustaĵojn, kiujn Pipi estis metinta sur la platan rokon. Kuŝis tie bongustaj buterpanetoj kun viandbuloj kaj ŝinko, tuta stako da patkukoj kun sukero, pluraj brunaj kolbasetoj kaj tri pudingoj el ananaso. Ĉar sciu, ke Pipi lernis kuiri de la kuiristo sur la ŝipo de sia patro.

—Ho, kiel agrabla estas purigada ferio, Tomi diris kun la buŝo plena je patkuko. Oni devus havi ĝin ĉiutage.

—Ne, mi diros al vi, ke tiom mi ne ŝatas purigadon, Pipi diris. Estas amuze, certe estas, sed ne ĉiun tagon, estus tro lacige.

Fine la infanoj estis tiel sataj, ke ili apenaŭ povis movi sin, kaj ili sidis trankvile en la sunbrilo kaj nur ĝuis.

—Mi scivolas, ĉu estas malfacile flugi, Pipi diris kaj reveme rigardis trans la randon de la plataĵo. La roko krute deklivis sub ili kaj estis alte ĝis la grundo.

—Oni povus certe lerni flugi malsupren, ŝi daŭrigis. Sed estas certe pli malfacile flugi supren. Oni povus ja komenci per la facila maniero. Mi pensas, ke mi provos!

—Ne, Pipi, Tomi kaj Anjo kriis, ho, kara Pipi, ne faru!

Sed Pipi jam staris ĉe la rando de la krutaĵo.

—Flugu, fia fringo, flugu, kaj la fia fringo flugis, ŝi diris, kaj ĝuste kiam ŝi diris "flugis", ŝi levis la brakojn kaj paŝis rekte

en la aeron. Post duona sekundo aŭdiĝis falbruo. Estis Pipi, kiu frapis la teron. Tomi kaj Anjo kuŝis surventre kaj rigardis terurigitaj suben al ŝi. Pipi levis sin kaj viŝis la genuojn.

—Mi forgesis flugilumi, ŝi gaje diris. Kaj verŝajne havas tro multe da patkukoj en la ventro.

Ĝuste en tiu momento la infanoj rimarkis, ke Sinjoro Nilson estis malaperinta. Ĝi verŝajne ekiris al tute propra ekskurseto. Ili memoris, ke ili vidis ĝin sidi tute kontenta dismaĉanta la proviantan korbon, sed dum la flugprovo de Pipi ili forgesis pri ĝi. Nun ĝi estis for.

Pipi tiel ekkoleris, ke ŝi ĵetis unu el siaj ŝuoj en profundan flakegon.

—Oni neniam kunportu simiojn, kiam oni iras ien, ŝi diris. Ĝi devus resti hejme kaj senpuligi la ĉevalon. Tio estus justa, ŝi daŭrigis kaj paŝis en la flakon por kapti la ŝuon. La akvo atingis ĝis la talio.

—Mi devus fakte kapti la okazon por lavi ankaŭ la hararon, Pipi diris kaj trempis la tutan kapon en la akvo tiel longe, ke la akvo komencis vezikumi.

—Nu, jen mi ne devas viziti frizistinon, ŝi kontente daŭrigis, kiam ŝi reaperis. Ŝi eliris el la flako kaj surmetis la ŝuon. Kaj ili ekiris por serĉi Sinjoron Nilson.

—Ĉu vi aŭdas, kiel ŝmacas, kiam mi iras, Pipi ridis. Sonas "ŝmac, ŝmac" de la robo kaj "plaŭ, plaŭ" de la ŝuoj. Estas vere amuze. Mi pensas, ke ankaŭ vi devus provi tion, ŝi diris al Anjo, kiu iris tie tute neta kun silkaj blondaj harbukloj, rozkolora robo kaj blankaj ledŝuetoj.

—Alian fojon, diris la prudenta Anjo.

Ili pluiris.

—Oni povas fariĝi vere kolera al Sinjoro Nilson, Pipi diris.

Tiel ĝi ĉiam faras. Ĝi ankaŭ forkuris de mi iun fojon en Surabajo kaj dungigis kiel domservisto ĉe maljuna vidvino. Ĉi lasta kompreneble estis mensogo, ŝi aldonis post paŭzo.

Tomi proponis, ke ili iru ĉiu en propran direkton por serĉi. Anjo iom timis komence kaj ne volis, sed Tomi diris:

—Vi ja ne estas malkuraĝa, ĉu?

Kaj tian akuzon Anjo kompreneble ne povis toleri. Tiam la infanoj iris ĉiu en malsaman direkton.

Tomi iris tra herbejo. Ian Sinjoron Nilson li ne trovis, sed li trovis ion alian. Virbovon! Aŭ pli ĝuste dirite, la virbovo trovis Tomin kaj la virbovo ne ŝatis lin, ĉar ĝi estis kolera virbovo, kiu tute ne ŝatis infanojn. Ĝi alkuregis kun mallevita kapo kaj terura blekado, kaj Tomi eligis timkriegon, kiu aŭdiĝis en la tuta arbaro. Pipi kaj Anjo ankaŭ aŭdis ĝin kaj alkuris por vidi, kion Tomi volas per sia kriego. Tiam la virbovo jam kaptis Tomin per la kornoj kaj ĵetis lin alten en la aeron.

—Kia malprudenta virbovo, Pipi diris al Anjo, kiu ploris tute senespere. Tiel oni ja ne rajtas fari. Ĝi ja malpurigas la blankan maristan veston de Tomi. Mi devas iri prudentigi la bovstultulon.

Kaj tion ŝi faris. Ŝi alkuris kaj tiris ĝian voston.

—Pardonu, ke mi interrompas, ŝi diris, kaj ĉar ŝi forte ek-tiris, la virbovo turnis sin kaj ekvidis novan infanon, kiun ĝi ankaŭ volis kapti per la kornoj.

—Kiel dirite, pardonu, ke mi interrompas, Pipi ripetis. Kaj pardonu, ke mi derompas, ŝi aldonis kaj rompis unu kornon de la virbovo. Ĉijare ne estas moderne havi du kornojn, ŝi diris. Ĉijare ĉiuj bonaj virbovoj havas nur unu kornon, se eĉ unu, ŝi diris kaj derompis ankaŭ la duan.

Ĉar virbovoj ne havas senton en la kornoj, ĝi ne sciis, ke la



kornoj mankas. Ĝi vigle daŭrigis kornobati, kaj se estus iu alia ol Pipi, certe fariĝus nur kaĉo el tiu ido.

—Haha, ne tiklu min, Pipi kriis. Vi ne povas imagi, kiel tikligema mi estas. Haha, ĉesu, ĉesu, mi ridas ĝismorte!

Sed la virbovo ne ĉesis, kaj fine Pipi saltis sur ĝian dorson por ricevi momenton da trankvilo. Tre trankvile ja ne fariĝis, ĉar la virbovo ne ŝatis havi Pipin sur la dorso. Ĝi faris teruregajn kapriolojn por forigi ŝin, sed ŝi nur kunpremis la gambojn kaj restis sidanta. La virbovo kuregis tien kaj reen sur la herbejo kaj muĝis, tiel ke fumis el ĝiaj naztruoj. Pipi ridis kaj kriis kaj mansvingis al Tomi kaj Anjo, kiuj staris iom fore tremante kiel tremolaj folioj. La virbovo turniĝis provante deĵeti Pipin.

—Jen mi dancas kun amiketo mia, Pipi kantetis kaj restis sidanta. Fine la virbovo tiel laciĝis, ke ĝi kuŝiĝis sur la tero, dezirante ke ne ekzistu infanoj en la mondo. Cetere ĝi neniam opiniis, ke infanoj estas speciale necesaj.

—Ĉu vi intencas siesti nun? Pipi demandis ĝentile. En tia kazo mi ne volas ĝeni.

Ŝi deiris de ĝia dorso kaj foriris al Tomi kaj Anjo. Tomi estis iom plorinta. Li havis vundon sur brako, sed Anjo jam ĉirkaŭvindis sian poŝtukon kaj ne plu doloris.

—Ho, Pipi, Anjo ekscite kriis, kiam Pipi venis.

—Ŝŝŝ, Pipi flustris. Ne veku la virbovon! Ĝi dormas kaj se ni vekas ĝin, ĝi nur estos kverelema.

—Sinjoro Nilson, Sinjoro Nilson, kie vi estas, ŝi kriis la postan minuton per laŭta voĉo, senkonsidere al la siesto de la virbovo. Ni devas iri hejmen!

Kaj fakte, tie Sinjoro Nilson sidis, grimpinta sur pinon. Ĝi suĉis la voston kaj aspektis malĝoja. Ne estis amuze por tia

malgranda simio esti lasita sola en la arbaro. Nun ĝi desaltis de la pino kaj sur la ŝultron de Pipi, svingante la pajloĉapelon kiel ĉiam, kiam ĝi ĝojis.

—Nu, do, vi ne fariĝis domservisto ĉi tiun fojon, Pipi diris kaj karesis ĝian dorson. Ba, tio ja estis mensogo, ŝi aldonis. Nu, tamen, se estus vero, ne povus esti mensogo, ŝi daŭrigis sian pensadon. Vi vidis, se oni bone pripensas, ke ĝi eble tamen estis domservisto en Surabajo! En tia kazo mi scias, kiu faru la viandbulojn estonte!

Kaj jen ili promenis hejmen, Pipi kun daŭre ŝmacanta robo kaj plaŭdantaj ŝuoj. Tomi kaj Anjo pensis, ke ili havis mirindan tagon, malgraŭ la virbovo, kaj ili kantis kanton, kiun ili lernis en la lernejo. Ĝi estis en la vero somerkanto, kaj nun ja baldaŭ estos aŭtuno, sed ili opiniis, ke ĝi tamen konvenas:

*Dum somer' en la suna kamparo  
iras ni tra la verda arbaro,  
ho, for estas nia zorgaro,  
kun ĝojo kantu do: Haló! Haló!  
Ekiru nun  
al rava sun',  
ne sidu hejme ĝis aŭtun'!  
Ni marŝas for  
kun gaja kor'  
kaj ĝuas de la florodor'.  
Dum somer' en la suna kamparo  
kun ĝojo kantu do: Haló! Haló!*

Pipi ankaŭ kantis, sed ŝi ne havis tute samajn vortojn, ŝi kantis tiel:

*Dum somer' en la suna kamparo*

*iras mi tra la verda arbaro,  
akurate laŭplaĉa mia faro,  
ŝmacante marŝu do! Haló! Haló!  
En mia ŝu'  
jam estas tru'  
alterne sonas ĉip kaj ĉu.  
Malseka mov',  
la stulta bov',  
rizkaĉon manĝas mi laŭ pov'.  
Dum somer' en la suna kamparo  
ŝmacante marŝu do! Haló! Haló!*

## Pipi vizitas cirkon

Venis cirko al la urbeto kaj ĉiuj infanoj kuris al siaj gepatroj kaj petegis, ke ili rajtu iri tien. Tion ankaŭ Tomi kaj Anjo faris, kaj ilia bonkora patro tuj elprenis kelkajn belajn arĝentajn kronojn kaj donis al ili.

Kun la mono firme premita en la mano ili rapidis al Pipi. Ŝi estis sur la verando ĉe la ĉevalo. Ŝi estis plektanta ĝian voston je malgrandaj plektaĵoj, kiujn ŝi ornamis per ruĝaj bantoj.

—Estas ĝia naskiĝtago hodiaŭ, mi kredas, ŝi diris. Kaj tial ĝi devas aspekti bela.

—Pipi, Tomi diris spiregante, ĉar li tiel rapide kuris. Pipi, ĉu vi volas kuniri al cirko?

—Mi povas kuniri al kio ajn, sed ĉu mi povas kuniri al sirko, mi ne scias, ĉar mi ne scias, kio sirko estas. Ĉu ĝi doloras?

—Kiel komika vi estas, Tomi diris. Tio ja ne doloras! Estas ja amuza! Ĉevaloj kaj klaŭnoj kaj belaj damoj, kiuj iras sur ŝnurego!

—Sed kostas, Anjo diris kaj malfermis sian maneton por kontroli, ke tie ankoraŭ kuŝas granda brila dukrono kaj du kvindek-oeraj moneroj.

—Mi estas riĉa kiel Krezo, Pipi diris, kaj tial mi ja certe povas aĉeti sirkon. Sed restos malmulte da loko, se mi havos pli da ĉevaloj. La klaŭnojn kaj la belajn damojn mi ja povas stapli en la kalandrejon, sed tio kun la ĉevaloj estos pli malfacila.

—Stultulino, Tomi diris. Vi ne aĉetu la cirkon. Kostas iri tien por rigardi, vi komprenu.

—Nekredeble, Pipi kriis kaj kunpremis la okulojn. Ĉu kostas rigardi?! Kaj ĉi tie mi iras rigardaĉante la tutajn tagojn! Kiu scias, por kiom da mono mi jam rigardaĉis!

Iom post iom ŝi singarde malfermis unu okulon, kaj turniĝis al ŝi en la kapo.

—Kostu kiom ajn, nun mi devas ekrigardi!

Fine Tomi kaj Anjo tamen sukcesis klarigi al Pipi, kio estas cirko, kaj tiam Pipi iris preni kelkajn ormonerojn el sia valizo. Poste ŝi surmetis sian ĉapelon, kiu estis granda kiel mulila rado, kaj ili marŝis al la cirko.

Multege da homoj interpretiĝis ekster la cirka tendego, kaj antaŭ la biletgiĉeto estis longa atendovico. Post ioma tempo estis la vico de Pipi. Ŝi enŝovis la kapon en la giĉeton, rigardegis firme la maljunan sinjorinon, kiu sidis tie, kaj diris:

—Nu, kiom kostas rigardi vin?

Sed la maljunulino estis el eksterlando kaj ŝi ne komprenis, kion Pipi volas diri, sed respondis:

—Knabineto, koŝtaŝ kfin kronoj ŝur unua lokko kaj tri kronoj ŝur tua lokko kaj unu krono ŝur ŝtarlokko.

—Ĉu tiom, Pipi diris, sed tiam vi devas promesi, ke vi ankaŭ iros sur ŝnurego.

Nun Tomi intervenis dirante, ke Pipi havu dualokan biletton. Pipi etendis la manon kaj donis oran moneron, kaj la maljunulino dubeme rigardis ĝin. Ŝi ankaŭ mordis ĝin por vidi, ĉu ĝi estas falsa. Fine ŝi estis konvinkita, ke ĝi vere estas el oro kaj Pipi ricevis sian biletton. Krome ŝi rericevis amason da arĝentaj moneroj kiel ŝanĝmonon.

—Kial mi havu tiujn malplaĉajn blankajn monerojn, Pipi

diris malbonhumore. Retenu ilin, mi ja povas rigardi vin dufoje. Ŝur ŝtarlokko.

Ĉar Pipi absolute ne volis rericevi ian monon, la virino interŝanĝe donis unualokan bileton al ŝi kaj ankaŭ donis unualokajn biletojn al Tomi kaj Anjo, sen ke ili entute bezonu doni sian monon.

Tiel Pipi, Tomi kaj Anjo povis sidi sur belegaj ruĝaj seĝoj tute apud la areno. Tomi kaj Anjo plurfoje turnis sin por manŝigni al siaj lernejoj gekamaradoj, kiuj sidis multe pli longe for.

—Estas stranga lapontendo ĉi tio, Pipi diris kaj mire ĉirkaŭrigardis. Sed mi vidas, ke oni disperdis seĝojn sur la plankon. Mi ja ne estas tre pedanta pri tio, sed aspektas senzorge, laŭ mia opinio.

Tomi klarigis al Pipi, ke sur la plankoj de ĉiuj cirkoj oni havas seĝojn, sur kiu la ĉevaloj povas kuri.

Sur estrado sidis la orkestro de la cirko, kiu subite ekludis tondran marŝon. Pipi forte frapis la manojn kaj saltis supren suben sur la seĝo pro raviĝo.

—Ĉu ankaŭ kostas aŭskulti, aŭ oni rajtas fari tion senpage, ŝi demandis.

Ĝuste tiam iu flankentiris la kurtenon antaŭ la artista enirejo kaj la direktoro de la cirko, en nigra frako kaj kun vipo en la mano, enkuris kaj kun li dek blankaj ĉevaloj kun ruĝaj plumoj sur la kapoj.

La direktoro de la cirko klakigis la vipon kaj la ĉevaloj ekkuris ĉirkaŭ la areno. Denove la direktoro klakigis la vipon kaj tiam ĉiuj ĉevaloj starigis siajn antaŭajn krurojn sur la barilon, kiu ĉirkaŭis la arenon. Unu el la ĉevaloj haltis ĝuste antaŭ la loko de la infanoj. Anjo ne ŝatis havi ĉevalon tiel proksime al

si, tial ŝi rampis malantaŭen sur la seĝon, kiom ŝi povis. Sed Pipi sin klinis antaŭen, levis la antaŭkruron de la ĉevalo kaj diris:

—Saluton al vi! Mi povas multe saluti de mia ĉevalo. Ankaŭ ĝi havas naskiĝtagon hodiaŭ, sed ĝi havas banton sur la vosto anstataŭ sur la kapo.

Pipi bonŝance lasis la piedon de la ĉevalo antaŭ ol la direktoro de la cirko reklakigis la vipon, ĉar tiam ĉiuj ĉevaloj desaltis de la barilo kaj reekkuris.

Kiam la programero finiĝis, la direktoro ĝentile klinis sin kaj la ĉevaloj elkuris. Momenton poste la kurteno denove malfermiĝis por karbonigra ĉevalo kaj sur ĝia dorso staris bela damo vestita per verda silkotrikotaĵo. Ŝia nomo estis Fraŭlino Karmencita, laŭ la programfolio.

La ĉevalo ĉirkaŭtrojis sur la seĝaĵo kaj Fraŭlino Karmencita staris sur ĝi trankvila kaj ridetanta. Sed tiam io okazis. Ĝuste kiam la ĉevalo preterpasis la lokon de Pipi, io venis sibilante tra la aero, kaj estis neniu alia ol Pipi mem. Kaj tie ŝi staris sur la dorso de la ĉevalo malantaŭ Fraŭlino Karmencita. Fraŭlino Karmencita unue tiel surpriziĝis, ke ŝi preskaŭ falis de la ĉevalo. Poste ŝi koleriĝis. Ŝi komencis frapi malantaŭ si per la manoj por igi Pipin desalti. Sed tio ne sukcesis.

—Trankviliĝu kelkajn hektogramojn, Pipi diris. Ne nur vi amuziĝu. Mi ja ankaŭ pagis, ĉu?

Tiam Fraŭlino Karmencita volis mem desalti, sed ankaŭ tio ne sukcesis, ĉar Pipi forte tenis ŝin ĉirkaŭ la talio. Kaj tiam ĉiuj homoj en la cirko ja devis ridi. Aspektas tiel freneze, ili opiniis, kun la bela Fraŭlino Karmencita firme tenata de ruĝhara infano, kiu staris tie sur la ĉevaldorso kun siaj grandaj ŝuoj kaj aspektis kvazaŭ ŝi neniam faris ion alian ol aperadi en cirko.

Sed la direktoro de la cirko ne ridis. Li signis al siaj ruĝe vestitaj servistoj, ke ili alkuru por haltigi la ĉevalon.

—Ĉu la programero jam finiĝis, Pipi diris disrevigita. Ĝuste nun, kiam estas tiel amuze.

—Fija pupinaĉo, la direktoro de la cirko siblis inter la dentoj, foriru!

Pipi malgaje rigardis lin.

—Kio nun, ŝi diris, kial vi koleras al mi. Mi kredis, ke la intenco estas, ke ni amuziĝu.

Ŝi saltis de la ĉevalo kaj sidiĝis sur sian lokon. Sed tiam venis du grandaj servistoj por elĵeti ŝin.

Ili ne sukcesis. Pipi sidis tute senmova kaj ne ekzistis ebleco movi ŝin de ŝia loko, kvankam ili klopodis per ĉiuj siaj fortoj. Tiam ili levis siajn ŝultrojn kaj foriris.

Dume komenciĝis la posta programero. Estis Fraŭlino Elvira irona sur ŝnurego. Ŝi havis rozkoloran tulan jupeton kaj rozkoloran ombrelon en la mano. Per elegantaj paŝetoj ŝi elkuris sur la ŝnuregon. Ŝi svingis la gambojn kaj faris ĉiaspecajn artifaĵojn. Aspektis tiel ĉarme. Ŝi ankaŭ montris, ke ŝi scias iri dorsantaŭen sur la maldika ŝnurego. Sed kiam ŝi revenis al la malgranda platformo je la fino de la ŝnurego kaj sin turnis, Pipi staris tie!

—Kion vi diras nun, Pipi diris gaje, kiam ŝi vidis la surprizitan mienon de Fraŭlino Elvira.

Fraŭlino Elvira tute ne diris ion, sed saltis de la ŝnurego kaj ĵetis sin al la kolo de la direktoro de la cirko, kiu estis ŝia patro. Kaj la direktoro de la cirko denove sendis siajn servistojn por elĵeti Pipin. Ĉifoje li sendis kvin. Sed tiam ĉiuj homoj en la cirko kriis:

—Lasu ŝin! Ni volas vidi la ruĝharan knabineton!



Kaj ili piedfrapis la plankon kaj aplaŭdis.

Pipi elkuris sur la ŝnuregon. La artifaĵoj de Fraŭlino Elvira estis nenio kompare kun tio, kion Pipi sciis fari. Kiam ŝi atingis la mezon de la ŝnurego, ŝi etendis unu kruron rekte en la aeron kaj ŝia granda ŝuo etendiĝis kiel plafono super ŝia kapo. Ŝi iom fleksis la piedon, tiel ke ŝi povis grati sin malantaŭ la orelo per ĝi.

La direktoro de la cirko tute ne estis kontenta pri tio, ke Pipi aperis en lia cirko. Li volis forigi ŝin. Tial li ŝteliris al la mekanismo, kiu tenis la ŝnuregon streĉita kaj malfiksis ĝin, kaj li certe kredis, ke Pipi falos.

Sed Pipi ne falis. Anstataŭe ŝi eksvingis la ŝnuregon. Tien reen la ŝnurego svingiĝis. Pipi svingis ĝin pli kaj pli rapide kaj — subite — ŝi faris salton en la aeron kaj falis rekte sur la direktoron de la cirko. Li tiel ektimis, ke li komencis kuri.

—Vi estas amuza ĉevalo, Pipi diris. Sed kial vi ne havas tufojn en la hararo?

Nun Pipi opiniis, ke estas tempo reiri al Tomi kaj Anjo. Ŝi saltis de la direktoro kaj eksidis, kaj tiam la venonta programero povis komenciĝi. Daŭris iom, ĉar la direktoro de la cirko unue devis eliri por trinki glason da akvo kaj kombi siajn harojn. Sed poste li envenis, klinis sin al la publiko kaj diris:

—Keŝinjoj! Poŝt momento fi pofos rikarti la plej kranta miraklo de ĉiuj tempoj, la plej forta firo te la monto, Forta Atolfo, kiu ankoraŭ neniu fenkis. Ponfolu, keŝinjoj, jen fenas Forta Atolfo!

Kaj sur la arenon entretis grandega viro. Li estis vestita per haŭtkoloraj trikotaĵoj kaj havis leopardan felon ĉirkaŭ la talio. Kaj li klinis sin al la publiko kaj aspektis tre kontenta.

—Nur rikartu kiaj muŝkoloj, la direktoro de la cirko diris,

kaj premis la brakon de Forta Adolfo, kie la muskoloj ŝvelis kiel globoj sub la haŭto.

—Kaj nun, keŝinjoroj, nun mi faras al fi fere pona propono! Kiu el fi kuraĉas eklukti kun Forta Atolfo, kiu kuraĉas profi fenki la plej forta firo te la monto? Ĉent kronoj mi pakos al tiu, kiu povas fenki Forta Atolfo, ĉent kronoj, pripenŝu tio, keŝinjoroj! Ponfolu aperi! Kiu folas profi?

Neniu aperis.

—Kion li diris? Pipi demandis. Kaj kial li parolas la araban?

—Li diris, ke tiu, kiu povas venki tiun grandan viron, ricevos cent kronojn, Tomi diris.

—Mi povas, Pipi diris. Sed mi pensas, ke estas domaĝe venki lin, ĉar li aspektas tiel afabla.

—Ne, sed tion vi ja ne povas, Anjo diris. Li estas ja la plej forta viro de la mondo.

—Viro, ja, Pipi diris. Sed mi estas la plej forta knabino de la mondo, pripensu tion!

Dume Forta Adolfo okupiĝis per levado de grandaj fergloboj kaj fleksado de dikaj ferstangoj je la mezo, por montri, kiel forta li estas.

—Nu, keŝinjoroj, la direktoro de la cirko kriis, ĉu fere estas neniu, kiu tesiras kajni ĉent kronoj, ĉu mi fere tefos reteni ilin mem, li diris kaj svingis la centkronan monbileton.

—Ne, tion mi fere ne opinias, Pipi diris, transtretis la barilon kaj suriris la arenon.

La direktoro de al cirko tute furioziĝis, kiam li ekvidis ŝin.

—Foriru, malaperu, mi ne folas fidi fi, li siblis.

—Kial vi ĉiam devas esti tiel malafabla, Pipi diris riproĉe. Mi ja nur volas lukti kun Forta Adolfo.

—Ĉi tio ne eŝtas loko por ŝerĉoj, la direktoro de la cirko diris. Foriru, antaŭ ol Forta Adolfo pofas aŭdi fiaj arokaŝoj!

Sed Pipi altretis Fortan Adolfon, preterirante la direktoron de la cirko. Ŝi kaptis lian grandan manon kaj kore skuis ĝin.

—Nu, ĉu ni luktu iomete, vi kaj mi? ŝi diris.

Forta Adolfo rigardis ŝin, nenion komprenante.

—Post minuto mi komencos, Pipi diris.

Kaj ŝi tion faris. Ŝi forte ĉirkaŭkaptis lin kaj antaŭ ol iu sciis, kiel okazis, ŝi kuŝigis lin sur la tapiŝon. Forta Adolfo ekstaris kun tute ruĝa vizaĝo.

—Brave, Pipi, kriis Tomi kaj Anjo. Tion aŭdis ĉiuj homoj en la cirko kaj tiam ankaŭ ili kriis 'Brave, Pipi!'. La direktoro de la cirko sidis sur la barilo kaj tordis siajn manojn. Li furiozis. Sed Forta Adolfo ankoraŭ pli furiozis. Neniam en sia tuta vivo li spertis ion tiel teruran. Kaj nun li vere montros al tiu ruĝhara knabino, kia viro Forta Adolfo fakte estas. Alkurante li kaptis ŝin, sed Pipi staris firma kiel roko.

—Pli bone vi povas, ŝi kriis por kuraĝigi lin. Sed jen ŝi eltoridis sin el liaj manoj, kaj post momento Forta Adolfo denove kuŝis sur la tapiŝo. Pipi staris apude atendante. Longe ŝi ne devis atendi. Kun kriego li leviĝis kaj denove ŝtorme alkuris ŝin.

—Tidelipom kaj pidelidej, Pipi diris.

Ĉiuj homoj en la cirko piedfrapis kaj ĵetis siajn ĉapojn en la aeron kriante: Brave, Pipi!

Kiam Forta Adolfo alkuris la trian fojon, Pipi levis lin alten en la aeron kaj portis lin per rektaj brakoj ĉirkaŭ la areno. Poste ŝi kuŝigis lin sur la tapiŝon kaj firme tenis lin tie.

—Nun, vireto, mi pensas, ke ni ne okupu nin plu pri ĉi tio, ŝi diris. Pli amuze ol tiel tamen ne estos.

—Pipi venkis, Pipi venkis, ĉiuj homoj en la cirko kriis. Forta Adolfo plejeble rapide ŝteliris eksteren. Kaj la direktoro de la cirko devis aliri kaj doni al Pipi la centkronan monbileton, kvankam li aspektis, kiel se li preferus formanĝi ŝin.

—Ponfolu, fraŭlino, ponfolu, jen la ĉent kronoj.

—Kion, ŝi diris, kion mi faru per ĉi tiu slipo? En ĝi vi povas friti haringon, se vi volas!

Kaj ŝi reiris al sia loko.

—Estis longdaŭra cirko ĉi tio, ŝi diris al Tomi kaj Anjo. Dormeto certe ne malutilus. Sed veku min, se estos io alia, en kio mi povos kunhelpi.

Kaj ŝi klinis sin malantaŭen sur la seĝo kaj tuj ekdormis. Tie ŝi kuŝis ronkante, dum klaŭnoj kaj glavoglutantoj kaj serpenthomoj montris siajn artifikaĵojn al Tomi kaj Anjo kaj ĉiuj aliaj homoj en la cirko.

—Sed mi tamen opinias, ke Pipi estis plej bona, Tomi flustris al Anjo.

## Pipi ricevas viziton de ŝtelistoj

Post la apero de Pipi en la cirko neniu en la urbeto ignoris, kiel fortega ŝi estas. Oni eĉ skribis pri ŝi en la gazeto. Sed homoj loĝantaj en aliaj lokoj kompreneble ne sciis, kiu Pipi estas.

En malhela aŭtuna vespero du vagabondoj venis migrante sur la vojo preter Vilao Vilaltao. La vagabondoj estis du malagrablaj ŝtelistoj, kiuj ekmigris tra la lando por vidi, ĉu ili povas trovi ion ŝtelindan. Ili vidis, ke lumas tra la fenestroj de Vilao Vilaltao, kaj ili decidis eniri por peti buterpanon.

Tiun vesperon Pipi elverŝis ĉiujn siajn ormonerojn sur la kuirejan plankon kaj sidis kalkulante ilin. Ŝi ja ne povis kalkuli tre bone, sed ŝi tamen faris tion kelkfoje. Por ke estu laŭordo.

—... sepdek kvin, sepdek ses, sepdek sep, sepdek ok, sepdek naŭ, sepdek dek sepdek dek unu, sepdek dek du, sepdek dek tri, sepdek dek sep ... ve, kiel sepa mia gorĝo fariĝas! Devus ja ekzisti iuj aliaj ciferoj en la ciferararo, jes ja, nun mi memoras, cent kvar, mil, nu jes, estas vere multe da mono, Pipi diris.

Ĝuste tiam iu frapis je la pordo.

—Eniru aŭ restu, kiel plaĉas al vi, Pipi kriis. Mi trudas al neni!

La pordo malfermiĝis kaj la du vagabondoj eniris. Imagu,

kiajn grandaj okulojn ili faris, kiam ili vidis ruĝharan knabineton sidi sur planko tute sola kalkulante monon.

—Ĉu vi estas sola hejme, ili ruze demandis.

—Tute ne, Pipi diris. Sinjoro Nilson ankaŭ estas hejme.

La ŝtelistoj ja ne povis scii, ke Sinjoro Nilson estas simieto, kiu ĝuste tiam kuŝis en sia verde pentrita lito kun pupa kovrilo ĉirkaŭ la talio. Ili kredis, ke la mastro de la domo nomiĝas Nilson, kaj ili signifoplene palpebrumis unu al la alia.

Ni povas reveni iom pli poste, signifis ilia palpebrumado, sed al Pipi ili diris:

—Ni ja nur eniris por demandi, kia hor-horloĝo estas.

Ili estis tiel fervoraj, ke ili tute konfuziĝis.

—Grandaj, fortaj viroj, kiuj ne scias, kia estas horloĝo, Pipi diris. Kian edukon vi ricevis? Horloĝo estas malgranda kaj ronda, ĝi diradas tik tak kaj iradas, sed neniam venas al la pordo. Se vi konas pli da enigmoj, bonvolu diri ilin, Pipi diris instige.

La vagabondoj kredis, ke Pipi estas tro malgranda por koni la horloĝon, turnis sin kaj senvorte eliris.

—Mi ne postulas, ke vi diru "dankon", Pipi kriis post ili, sed vi povus almenaŭ diri "dinkon". Vi eĉ ne havas ordinaran hormoron! Sed ne gravas, iru en paco, Pipi diris kaj revenis al sia mono.

Ekstere la vagabondoj frotis siajn manoj pro eksciteco.

—Ĉu vi vidis, kiom da mono! Gracaj dioj! unu el ili diris.

—Jes, foje ni havas bonŝancon, la alia diris. Ni nur bezonas atendi, ke la knabino kaj tiu Nilson endormiĝu. Poste ni ŝteliros endomen kaj prenos ĉion.

Ili sidiĝis sub kverko en la ĝardeno por atendi. Pluvetadis

kaj ili estis tre malsataj, kaj estis vere malagrabla, sed la penso pri la multa mono tenis ilin bonhumoraj.

En ĉiuj aliaj vilaoj la lumoj estingiĝis iom post iom, nur en Vilao Vilaltao daŭre lumis. Pipi lernis danci tanton kaj ŝi ne volis enlitiĝi antaŭ ol ŝi estis certa, ke ŝi vere povas. Fine tamen mallumiĝis ankaŭ en la fenestroj de Vilao Vilaltao.

La vagabondoj atendis ankoraŭ longan tempon por esti certaj, ke Sinjoro Nilson endormiĝis. Fine ili ŝteliris al la kuirrejo kaj preparis sin por provi malfermi ĝin per siaj ŝtelrompiloj. Unu el ili — kies nomo cetere estis Blom — pro nura hazardo provis la pordon. Kaj ĝi ne estis ŝlosita.

—Vidu, kiel malprudentaj la homoj estas, li flustris al sia kamarado. La pordo ja estas neŝlosita!

—Des pli bone por ni, respondis la kamarado, kiu estis nomata Tondro-Karlson de ĉiuj, kiuj konis lin.

Tondro-Karlson lumigis sian poŝlampon kaj ili ŝteleniris la kuirrejon. Neniu estis tie. En la apuda ĉambro Pipi havis sian dormlokon kaj tie staris ankaŭ la puplito de Sinjoro Nilson.

Tondro-Karlson malfermis la pordon kaj rigardis singarde. Ĉio estis kvieta kaj silenta, kaj li igis la lumon de sia poŝlampon rondiri tra la ĉambro. Kiam la lumradio trafis la liton de Pipi, la du vagabondoj je sia miro vidis nenion ol paron da piedoj ripozantaj sur la kapkuseno. Pipi havis laŭ kutimo sian kapon sub la kovrilo ĉe la piedfino de la lito.

—Tio estas certe la knabino, Tondro-Karlson flustris al Blom. Kaj ŝi certe bonorde dormas. Sed kie estas tiu Nilson, laŭ vi?

—Sinjoro Nilson, mi petas, oni aŭdis trankvilan voĉon de Pipi sub la kovrilo. Sinjoro Nilson kuŝas en la verda puplito.

La vagabondoj tiel teruriĝis, ke ili preskaŭ ekelkuris. Sed ili pripensis, kion Pipi diris. Ke Sinjoro Nilson kuŝas en puplito. En lumo de la poŝlampo ili ankaŭ ekvidis la pupliton kaj la simieton, kiu kuŝis en ĝi. Tondro-Karlson ne povis ne ridi.

—Blom, li diris. Sinjoro Nilson estas simio, hahaha!

—Jes, kion vi kredis, ke li estas, ili aŭdis la trankvilan voĉon de Pipi sub la kovrilo. Ĉu herbtranĉilo?

—Ĉu viaj gepatroj ne estas hejme, Blom demandis.

—Ne, Pipi diris. Ili estas for! Tute for!

Tondro-Karlson kaj Blom fariĝis tiel feliĉaj, ke ili ridaĉis.

—Nu, knabineto mia, Tondro-Karlson diris. Elvenu, por ke ni povu paroli kun vi!

—Ne, mi dormas, Pipi diris. Ĉu denove temas pri enigmoj? Se jes, tiam vi divenu la jenan: "Kiu horloĝo iradas kaj iradas kaj neniam venas al la pordo?"

Sed nun Blom decide forlevis la kovrilon de Pipi.

—Ĉu vi povas danci tangon, Pipi demandis kaj serioze rigardis en liajn okulojn. Mi povas!

—Vi demandadas tro multe, Tondro-Karlson diris. Ĉu ne ni rajtu demandi iom? Ekzemple, kie vi havas la monon, kiun vi ĵus havis sur la planko?

—En la valizo tie sur la ŝranko, Pipi respondis sincere.

Tondro-Karlson kaj Blom ridaĉis.

—Mi esperas, ke vi ne kontraŭas, ke ni prenu ĝin, amikino, Tondro-Karlson diris.

—Ne, bonvolu, Pipi diris. Tute ne!

Kaj Blom iris kaj malsuprenlevis la valizon.

—Mi esperas, ke vi ne kontraŭas, ke mi reprenu ĝin, amiketo, Pipi diris, eliris la liton kaj aliris Blom.



Blom ne sciis ekzakte, kiel okazis, sed la valizo strange rapide estis en la manoj de Pipi.

—Ne ŝercu, Tondro-Karlson kolere diris. Ĉi tien kun la valizo!

Li forte premis la brakon de Pipi kaj provis deŝiri de ŝi la sopiratan kaptaĵon.

—Ŝercu tien aŭ ŝercu reen, Pipi diris kaj levis Tondro-Karlson sur la ŝrankon. Minuton pli poste ankaŭ Blom sidis tie. Tiam la du vagabondoj ektimis. Ili komprenis, ke Pipi ne estas ordinara knabino. Sed la valizo logis ilin kaj ili forgesis sian timon.

—Samtempe, Blom, Tondro-Karlson ekkriis kaj eksaltis de la ŝranko kaj ĵetis sin sur Pipin, kiu tenis la valizon en la mano. Sed Pipi puŝis ilin per la montrofigro, tiel ke ili eksidis ĉiu en propra angulo. Antaŭ ol ili havis tempon leviĝi, Pipi elprenis ŝnuregon kaj fulmrapide firme ligis la brakojn kaj gambojn de ambaŭ ŝtelistoj. Nun aŭdiĝis alia muziko.

—Kara, bona fraŭlino, Tondro-Karlson petis. Pardonu nin, ni nur ŝercis! Ne punu nin, ni estas nur du kompatindaj malriĉaj vagabondoj, kiuj eniris por peti iom da manĝo.

Blom eĉ ekploris kelkajn larmojn.

Pipi zorge remetis la valizon sur la ŝrankon. Poste ŝi turnis sin al siaj kaptitoj.

—Ĉu iu el vi scias danci tangon?

—Nu, ja, Tondro-Karlson diris, tion ni ambaŭ povas, mi kredas.

—Ho, kiel amuze, Pipi diris, kaj kunfrapis la manojn. Ĉu ni ne dancu iomete? Mi ĵus lernis, vi sciu.

—Jes, kial ne, Tondro-Karlson diris iom konfuzita.

Tiam Pipi prenis grandan tondilon kaj distondis la ŝnurojn, kiuj ligis ŝiajn gastojn.

—Sed ni ne havas muzikon, Pipi diris malgaje. Sed ŝi ekhavis ideon.

—Ĉu vi ne povas ludi per kombilo, ŝi diris al Blom, kaj mi dancos kun tiulo. Ŝi montris al Tondro-Karlson.

Nu jes, Blom povis ludi per kombilo. Kaj tion li faris, tiel ke estis aŭdeble en la tuta domo. Sinjoro Nilson eksidis subite vekita en la lito por vidi Pipin turnsvingi kun Tondro-Karlson. Ŝi estis seriozega kaj ŝi dancis kun energio, kiel se temus pri la vivo.

Fine Blom ne plu volis ludi kombilon, ĉar li asertis, ke jukis senkompate je la buŝo. Kaj Tondro-Karlson, kiu vagis la tutan tagon sur la vojoj, eklaciĝis je la kruroj.

—Karuloj, nur momenteton plu, Pipi petis kaj pludancis. Kaj Blom kaj Tondro-Karlson estis devigataj daŭrigi.

Kiam estis la tria horo nokte, Pipi diris:

—Ho, mi povus daŭrigi ĝis jaŭdo! Sed vi eble estas lacaj kaj malsataj?

Kaj tion ili estis, kvankam ili apenaŭ kuraĝis diri tion. Sed Pipi elprenis el la provizejo panon kaj buteron kaj ŝinkon kaj malvarman rostitan viandon kaj lakton, kaj ili eksidis ĉe la kuireja tablo, Blom, Tondro-Karlson kaj Pipi, kaj manĝis, ĝis kiam ili estis preskaŭ kvarangulaj. Pipi verŝis iom da lakto en sian orelon.

—Estas bone kontraŭ oreldoloro, ŝi diris.

—Kompatinda vi, ĉu vi ricevis oreldoloron, Blom diris.

—Ne, Pipi diris, sed eble mi havos!

Fine la du vagabondoj leviĝis, kore dankis por la manĝo kaj volis adiaŭi.

—Estis tiel amuze, ke vi venis! Ĉu vi vere devas jam foriri, Pipi diris kun bedaŭro.

—Mi neniam vidis iun, kiu povas danci tangon kiel vi, dolĉulo, ŝi diris al Tondro-Karlson.

—Ekzercu diligente ludon per kombilo, ŝi diris al Blom, kaj vi ne sentos la jukon.

Kiam ili jam staris ĉe la pordo, Pipi venis kurante kaj donis al ili po unu ormoneron.

—Ĉi tion vi honeste perlaboris, ŝi diris.

## Pipi festas naskiĝtagon

**I**un tagon Tomi kaj Anjo trovis leteron en sia leterkesto. "AL TOMJ K ANJO" estis skribite sur ĝi. Kaj kiam ili malfermis ĝin, ili trovis karton, kaj sur ĝi ili povis legi:

"TOMJ K ANJO VENU AL PJPJ POR NASKJFESTO MORGA POSTAGM. VESTO LAV PLACE."

Tomi kaj Anjo tiel ekĝojis, ke ili komencis salti kaj danci. Ili tre bone komprenis, kio estis skribita sur la karto, kvankam estis iom strange literumite. Pipi havis teruran penon skribante ĝin. Ŝi ne volis rekoni la literon "e" tiun fojon en la lernejo, sed ŝi fakte povis skribi iomete. Kiam ŝi veliris sur la maro, unu el la maristoj sur la ŝipo de ŝia patro kutimis sidi kun ŝi sur la malantaŭa ferdeko kelkfoje dum la vesperoj kaj provis instrui al ŝi skribi. Bedaŭrinde Pipi ne estis persista lernantino. Subite ŝi povis diri:

—Ne, Fridolfo (li nomiĝis Fridolfo, tiu maristo), ne Fridolfo, nun ni lasu ĉi tion, nun mi grimpos supren al la mastopinto por kontroli, kian veteron ni havos morgaŭ.

Tial ne estas strange, ke la skribado malglate funkciis. La tutan nokton ŝi sidis laborante diligente per tiu invitkarto kaj je mateniĝo, ĝuste kiam la steloj komencis paliĝi super la tegmento de Vilao Vilaltao, ŝi kaŝiris al la vilao de Tomi kaj Anjo kaj metis la leteron en ilian keston.

Tuj kiam Tomi kaj Anjo revenis hejmen el la lernejo, ili komencis pretigi sin por la invito. Anjo petis sian patrinon, ke

ŝi bukligu ŝiajn harojn. Tion la patrino faris, kaj ŝi nodis grandan rozkoloran rubandon en ŝiajn harojn. Tomi kombis sin per akvo, por ke la haroj kuŝu vere glate. Li tute ne volis havi bukajn harojn. Poste Anjo volis surpreni sian plej belan robon, sed tiam la patrino diris, ke tio ne estis necesa, ĉar Anjo malofte revenis pura kaj neta, kiam ŝi estis ĉe Pipi. Tial Anjo devis kontentiĝi per la dua plej bela robo. Tomi ne multe cerbumis pri tio, kiun veston li havu, nur ke ĝi estu iom beleta.

Ili kompreneble aĉetis donacon por Pipi. La monon ili prenis el siaj propraj ŝparujoj, kaj hejmenire de la lernejo ili kuris en la ludilbutikon sur Ĉefstrato kaj aĉetis tre belan ... sed kio estis restu sekreto ĝis plue. Nun la donaco kuŝis envolvita en verda papero kun multe da ŝnuro ĉirkaŭe, kaj kiam Tomi kaj Anjo estis pretaj, Tomi prenis la pakaĵon kaj ili ekiris, sekvataj de la energiaj admonoj de la patrino, ke ili zorgu pri siaj vestoj. Anjo ankaŭ rajtos porti la pakaĵon iomete, kaj kiam ili transdonos ĝin, ili ambaŭ tenos ĝin, tion ili interkonsentis.

Estis nun novembro kaj la krepusko venis frue. Kiam Tomi kaj Anjo iris tra la barilpordo de Vilao Vilaltao, ili firme tenis la manojn, ĉar estis relative mallume en la ĝardeno de Pipi, kaj la malnovaj arboj, kiuj estis perdantaj la lastajn foliojn, susuris malgaje. "Aŭtunece", Tomi diris. Kiel pli agrable estis vidi la lumigitajn fenestrojn de Vilao Vilaltao kaj scii, ke ili survojas tien al naskiĝtaga festeno.

Ordinare Tomi kaj Anjo kutimis enkuri la kuirejan vojon, sed hodiaŭ ili eniris tra la ĉefenirejo. La ĉevalo ne estis videbla sur la verando. Tomi bonedukite frapis la pordon. El la interno ili aŭdis obtuzan voĉon:

*Kiu venas en malhela nokto  
tien ĉi al mia domo,*

*ĉu malgranda povra muso  
aŭ timiga noktfantomo?*

—Ne, Pipi, estas ni, Anjo kriis, malfermu!

Tiam Pipi malfermis.

—Ho, Pipi, kial vi diris tion pri fantomo, mi tiel teruriĝis, Anjo diris kaj tute forgesis gratuli al Pipi.

Pipi ridis elkore kaj malfermis la pordon al la kuirejo. Ho, kiel agrable estis enveni en lumon kaj varmon! La naskiĝtaga festeno estu en la kuirejo, ĉar tie estas plej agrable. Estis nur du ĉambroj en la teretaĝo. Unu estis la salono, kaj tie estis ja nur unu meblo, kaj la alia estis la dormoĉambro de Pipi. Sed la kuirejo estis granda kaj spaca, kaj Pipi purigis kaj ordigis ĝin. Sur la plankon ŝi estis metinta tapiŝojn kaj sur la tablo kuŝis nova tuko, kiun Pipi estis kudrinta. La floroj, kiujn ŝi brodis, aspektis ja iom strangaj, sed Pipi asertis, ke tiaj floroj kreskas en Fora Hindio, do ĉio estas tia, kia devas esti. La kurtenoj estis fermtiritaj kaj en kuirforno brulis tiel, ke krakis. Sinjoro Nilson sidis sur la lignujo kaj kunfrapadis du potkovrilojn, kaj plej malantaŭe en la angulo staris la ĉevalo. Kompreneble ankaŭ ĝi estis invitita al la festeno.

Nur nun Tomi kaj Anjo memoris, ke ili gratulu al Pipi. Tomi klinis sin kaj Anjo genufleksis, kaj ili transdonis la verdan pakaĵon kaj diris "havas la honoron gratuli". Pipi dankis kaj fervore ŝirmalfermis la pakaĵon. Kaj tie kuŝis muzikskatolo! Pipi tute freneziĝis pro raviteco. Ŝi karesis Tomin kaj ŝi karesis Anjon kaj ŝi karesis la muzikskatolon kaj ŝi karesis la pakpaperon. Poste ŝi turnis la krandon de la muzikskatolo kaj kun multe da peno elvenis melodio, kiu volis esti "Ho, vi kara Aŭgustin' "".

Pipi turnis kaj turnadis kaj ŝajnis esti forgesinta ĉion alian. Sed subite ŝi memoris ion.

—Kara mia, ankaŭ vi devas havi viajn naskiĝtagajn donacojn, ŝi diris.

—Sed ja ne estas nia naskiĝtago, Tomi kaj Anjo diris.

Pipi surprizite rigardis ilin.

—Ne, sed mi ja havas naskiĝtagon, tial ankaŭ mi povas doni naskiĝtagajn donacojn al vi, ĉu? Aŭ ĉu estas skribite en viaj lernolibroj, ke oni ne rajtas? Ĉu estas io pri la plutifikado, kio kaŭzas, ke ne eblas?

—Ne, kompreneble eblas, Tomi diris. Sed oni ne kutimas. Sed mi mem volonte havus donacon.

—Mi ankaŭ, Anjo diris.

Tiam Pipi kuris en la salonon kaj prenis du pakaĵojn, kiuj kuŝis sur la klapkomodo. Kiam Tomi malfermis sian skatolon, li trovis eburan fluteton, kaj en la pakaĵo de Anjo kuŝis bela broĉo en formo de papilio. La flugiloj de la papilio estis ornamitaj per ruĝaj, bluaj kaj verdaj ŝtonetoj.

Nun, kiam ĉiuj ricevis siajn naskiĝtagajn donacojn, estis tempo altabligi. Amaso da kukoj kaj bulkoj estis servitaj sur la tablo. La kukoj havis iom strangajn formojn, sed Pipi asertis, ke oni havas tiajn kukojn en Ĉinio.

Pipi verŝis ĉokoladon kun kirlita kremo en la tasojn kaj estis la intenco, ke ili sidiĝu. Sed tiam Tomi diris:

—Kiam panjo kaj paĉjo invitas al tagmanĝo, la sinjoroj ĉiam ricevas karton, sur kiu estas skribite, kiun sinjorinon ili konduku al la tablo. Mi opinias, ke ankaŭ ni havu tion.

—Akceptite, Pipi diris.

—Sed estas pli malfacile por ni, ĉar nur mi estas sinjoro, Tomi diris. hezitante.

—Sensencaĵo, Pipi diris. Ĉu vi eble kredas, ke Sinjoro Nilson estas fraŭlino?

—Vi pravas, mi ja forgesis Sinjoron Nilson, Tomi diris. Li sidiĝis sur la lignujon kaj skribis sur karto:

”Sinjoro Settergren bv. konduki fraŭlinon Pipi”. Sinjoro Settergren, tio estas mi, li diris kontente kaj montris la karton al Pipi. Sur posta karto li skribis:

”Sinjoro Nilson bv. konduki fraŭlinon Settergren”.

—Jes, sed ankaŭ la ĉevalo devas havi karton, Pipi diris firme. Eĉ se ĝi ne rajtas kunsidi ĉe la tablo.

Kaj Tomi skribis laŭ dikto de Pipi sur alia karto:

”La ĉevalo bv. resti en la angulo kaj ĝi ricevos kukojn kaj sukeron”.

Pipi tenis la karton sub la nazo de la ĉevalo kaj diris:

—Legu ĉi tie kaj diru, kion vi opinias!

Kaj ĉar la ĉevalo ne havis kontraŭstarojn, Tomi oferis sian brakon al Pipi kaj iris al la tablo. Sinjoro Nilson ne klopodis inviti Anjon, tial Anjo decide levis ĝin al la tablo. Sed li rifuzis sidi sur seĝo, li sidiĝis rekte sur la tablon. Nek li volis havi ĉokoladon kun kirlita kremo, sed kiam Pipi verŝis akvon en lian tason, li kaptis ĝin per ambaŭ manoj kaj trinkis.

Anjo kaj Tomi kaj Pipi maĉis kaj manĝis, kaj Anjo diris, ke ŝi ekloĝos en Ĉinio, kiam ŝi estos granda, se oni havas tiajn kukojn tie.

Kiam Sinjoro Nilson malplenigis sian tason, li renversis ĝin kaj metis ĝin sur la kapon. Kiam Pipi vidis tion, ŝi faris same, sed ĉar ŝi ne estis eltrinkinta ĉion de la ĉokolado, flueto aperis sur ŝia frunto kaj daŭrigis sur la nazon. Sed poste Pipi eltenis sian langon kaj haltigis ĝin.

—Nenio rajtas perdiĝi, ŝi diris.



Tomi kaj Anjo unue zorge ellekis siajn tasojn, antaŭ ol ili metis ilin sur la kapon.

Kiam ĉiuj estis sataj kaj kontentaj kaj la ĉevalo ricevis tion, kion ĝi havu, Pipi rapide kaptis la kvar pintojn de la tablotuko kaj levis ilin, tiel ke la tasoj kaj teleroj kunfalas kiel en sakon. La tutan kunvolvaĵon ŝi metis en la lignujon.

—Mi ĉiam volas ordigi iom, tuj kiam mi finmanĝis, ŝi diris.

Poste oni ludu. Pipi proponis, ke ili ludu ludon kun la nomo "ne tuŝu la plankon". Ĝi estis tre simpla. La sola fendaĵo estis rampado ĉirkaŭ la tuta kuirejo, sed eĉ ne unu fojon oni rajtas meti piedon sur la plankon. Pipi ĉirkaŭsaltis post momenteto. Sed ankaŭ Tomi kaj Anjo bone sukcesis. Ili komencis ĉe la lavbenko kaj se ili sufiĉe disigis la krurojn, ili povis veni al la forno, kaj de la forno al la lignujo, de la lignujo trans la ĉapelbreto kaj malsupren sur la tablon kaj de tie per du seĝoj al la angulŝranko. Inter la angulŝranko kaj la lavbenko estis distanco de pluraj metroj, sed feliĉe tie staris la ĉevalo, kaj se oni surgrimpis ĝin ĉe la vostoparto kaj malsuprengritis ĉe la kapoparto, kaj en la ĝusta momento eksaltetis, tiam oni venis rekte sur la lavbenkon.

Kiam ili jam ludis dum iom da tempo kaj la robo de Anjo ne plu estis ŝia dua plej bela, sed nur ŝia kvara aŭ kvina plej bela, kaj Tomi estis nigra kiel kamenpurigisto, ili decidis eltrovi ion alian.

—Ĉu ni iru en la subtegmentejon saluti la fantomojn, Pipi proponis.

Anjo ekspiregis.

—Ĉu ... ĉu ... ĉu estas fantomoj en la subtegmentejo, ŝi diris.

—Ĉu estas? Amasoj, Pipi diris. Svarmas diversspecaj fantomoj tie supre. Oni tutsimple stumblas sur ili. Ĉu ni iru tien?

—Ve, Anjo diris kaj riproĉe rigardis Pipin.

—Panjo diris, ke ne ekzistas fantomoj, Tomi diris kuraĝe.

—Kompreneble, Pipi diris. Nenie alie ol ĉi tie, ĉar ĉiuj, kiuj ekzistas, loĝas en mia subtegmentejo. Kaj ne indas peti ilin transloĝiĝi. Sed ili ne estas danĝeraj. Ili nur pinĉas viajn brakojn, tiel ke aperas bluaĵoj, kaj ili hurlas. Kaj kegloludas per siaj kapoj.

—Ke ... ke ... kegloludas per siaj kapoj, Anjo flustris.

—Ĝuste tion ili faras, Pipi diris. Venu, ni supreniru por paroli kun ili. Mi spertas pri kegloludado.

Tomi ne volis montri, ke li timas, kaj li iel ŝatus vidi fantomon. Tio estus io rakontinda al la knaboj en al lernejo. Li krome kuraĝigis sin per tio, ke la fantomoj certe ne kuraĝus ataki Pipin. Li decidis kuniri. La kompatinda Anjo ne volis laŭ ajnaj kondiĉoj, sed ŝi ekpensis, ke fantometo povus malsuprenveni al ŝi, kiam ŝi sidos sola en la kuirejo. Kaj tio decidis al aferon! Pli volonte kune kun Pipi kaj Tomi inter mil fantomoj ol sola kun la plej malgranda fantomido en la kuirejo!

Pipi iris unua. Ŝi malfermis la pordon al la subtegmenteja ŝtuparo. Tie estis fulge nigre. Tomi firme tenis Pipin kaj Anjo ankoraŭ pli firme tenis Tomin. Ili supreniris la ŝtuparon. Bruis kaj knaris je ĉiu farita paŝo. Tomi komencis cerbumi, ĉu ne estus pli bone lasi tion, kaj Anjo ne bezonis cerbumi. Ŝi estis tute certa pri tio.

Fine la ŝtuparo finiĝis kaj ili staris en la subtegmentejo. Tie estis tute malhele, escepte de eta lunluma strio, kiu falis sur la plankon. En ĉiuj anguloj ĝemis kaj pepis, kiam la vento blovis tra la fendoj.

—Hu, ĉiuj fantomoj, Pipi kriis.

Eĉ se estis fantomo tie, ĝi almenaŭ ne respondis.

—Estas tiel, kiel mi supozis, Pipi diris. Ili iris al estrarkunveno en la Fantoma Asocio.

Ekĝemo pro malstreĉiĝo venis de Anjo, kiu esperis, ke la kunveno daŭros tre longe. Sed ĝuste tiam aŭdiĝis terura bleko el angulo de la subtegmentejo.

—Kleŭit, sonis, kaj momenton poste Tomi vidis ion, kio sible venis kontraŭ lin en la malhelo. Li sentis bloveton kontraŭ la frunto kaj li vidis ion nigran malaperi tra malfermita fenestreto. Li ekkriis plenvoĉe:

—Fantomo, fantomo!

Kaj Anjo kunkriis.

—Tiu kompatindulo venos tro malfrue al la kunveno, Pipi diris. Se entute estis fantomo! Kaj ne strigo! Cetere, fantomoj ne ekzistas, ŝi daŭrigis post momento, kaj ju pli mi pensas pri tio, des pli ĝi estis strigo. Kaj al tiu, kiu asertas, ke ekzistas fantomoj, mi tordos la nazon.

—Sed vi ja mem diris tion, Anjo diris.

—Ho, ĉu mi faris tion, Pipi diris. Do mi absolute devas tordi mian nazon.

Kaj ŝi firme prenis sian nazon kaj tordis ĝin.

Post tio Tomi kaj Anjo sentis sin pli trankvilaj. Ili estis eĉ tiel kuraĝaj, ke ili kuraĝis iri al la fenestro por rigardi la ĝardenon de supre. Grandaj malhelaj nuboj preteris sur la ĉielo kaj faris sian plejblon por ŝirmi la lunon. Kaj la arboj susuris.

Tomi kaj Anjo turnis sin. Sed tiam — ho, terure — ili vidis blankan figuron, kiu venis kontraŭ ilin.

—Fantomo, Tomi kriis sovaĝe.

Anjo tiel timiĝis, ke ŝi eĉ ne povis krei. La figuro venis pli kaj pli proksimen, kaj Tomi kaj Anjo ĉirkaŭpremis unu la alian kaj fermis la okulojn. Sed tiam ili aŭdis la fantomon diri:

—Vidu, kion mi trovis! La noktoĉemizo de paĉjo kuŝis en malnova marista kesto tie for. Se mi faldas ĝin sube, mi povas fakte uzi ĝin.

Pipi proksimiĝis al ili kun la noktoĉemizo flirtanta ĉirkaŭ la kruroj.

—Ho, Pipi, mi povus morti pro teruriĝo, Anjo diris.

—Sed noktaj ĉemizoj ne estas danĝeraj, Pipi asertis. Ili mordas nur pro memdefendo.

Pipi decidis nun zorge traserĉi la maristan keston. Ŝi levis ĝin al la fenestro kaj malfermis la ŝloson, tiel ke la malmulta lunlumo falis sur la enhavon. Tie kuŝis multaj malnovaj vestaĵoj, kiujn ŝi elĵetis sur la plankon de la subtegmentejo. Plue kuŝis tie lorno, kelkaj malnovaj libroj, tri pistoloj, spado kaj saketo da oraj moneroj.

—Tidelipom kaj pidelidej, Pipi kontente diris.

—Kiel streĉe, Tomi diris.

Pipi kolektis ĉion en la nokta ĉemizo kaj ili malsupreniris en la kuirejon. Anjo estis tre kontenta, ke ŝi foriris el la subtegmentejo.

—Neniam permesu, ke infanoj uzu armilojn, ŝi diris kaj prenis po unu pistolon en ĉiun manon. Aliel povas okazi akcidento, ŝi diris kaj malŝargis ambaŭ pistolojn samtempe. Tio bone krakis, ŝi konstatis kaj rigardis supren al la plafono. Du truoj estis videblaj, kie la kugloj eniris.

—Kiu scias, ŝi diris esperplene, eble la kugloj trairis la plafonon kaj trafis la krurojn de iu fantomo. Tio estu leciono al ili, ke ili pripensu iom antaŭ ol ili venontfoje ektimigos sen-

kulpajn infanetojn. Ĉar ankaŭ se ili ne ekzistas, ili ne rajtas pro tio frenezigi homojn, mi opinias. Ĉu vi cetere volas havi po unu pistolon, ŝi demandis.

Tomi raviĝis kaj Anjo ankaŭ volis havi pistolon, nur se ĝi ne estas ŝargita.

—Nun ni povas fondi rabistan bandon, se ni volas, Pipi diris kaj metis la lornon antaŭ la okulojn. Per ĉi tiu mi povas preskaŭ vidi la pulojn en Sudameriko, mi kredas, ŝi daŭrigis. Ĝi utilos ankaŭ, se ni fondos rabistan bandon.

Ĝuste tiam iu frapis la pordon. Estis la patro de Tomi kaj Anjo, kiu venis por hejmenigi siajn infanojn. Estis enlitiĝa tempo antaŭ longe, li asertis. Tomi kaj Anjo urĝis danki kaj adiaŭi kaj kolekti siajn posedaĵojn, la fluton kaj la broĉon kaj la pistolojn.

Pipi akompanis siajn gastojn sur la verandon kaj vidis ilin malaperi sur la ĝardena irejo. Ili turnis sin kaj mansvingis al Pipi. La lumo de interne falis sur ŝin. Ŝi staris tie kun siaj rigidaj ruĝaj harplektaĵoj kaj kun la nokta ĉemizo de sia patro, kiu flirtis ĉirkaŭ ŝiaj piedoj. En unu mano ŝi tenis la pistolon kaj en la alia la spadon. Ŝi salutis per ili.

Kiam Tomi kaj Anjo kaj ilia patro venis al la barilpordo, ili aŭdis, ke ŝi kriis ion post ili. Ili haltis kaj aŭskultis. La arboj susuris, tiel ke ili apenaŭ povis aŭdi ŝin. Sed ili tamen aŭdis.

—Mi fariĝos pirato, kiam mi estos granda. Ĉu vi?

## Pipi iras butikumi

**B**elan printempan tagon, kiam la suno brilis kaj la birdoj trilis kaj estis akvo en ĉiuj fosaĵoj, Tomi kaj Anjo alvenis kurante al Pipi. Tomi kunportis kelkajn sukerpecojn por la ĉevalo de Pipi, kaj kaj Anjo kaj li haltis dum momento sur la verando kaj karesis la ĉevalon, antaŭ ol ili daŭrigis al Pipi. Pipi kuŝis dormanta, kiam ili envenis. Kiel kutime ŝi havis la piedojn sur la kapkuseno kaj la kapon profunde sub la kovrilo. Anjo pinĉis ŝian pieddikfingron kaj diris:

—Vekiĝu!

Sinjoro Nilson jam estis veka kaj saltis sur la plafonlampon kaj sidiĝis sur ĝin. Iom post iom io ekmoviĝis sub la kovrilo kaj subite ruĝa kapo ekaperis. Pipi malfermis siajn klarajn okulojn kaj large ekridetis.

—Ho, ĉu estas vi, kiu pinĉas miajn piedfingrojn! Mi sonĝis, ke estas mia paĉjo, la negroreĝo, kiu volis kontroli, ĉu mi havas kalojn.

Ŝi sidiĝis sur la litorandon kaj surtiris siajn ŝtrumpojn, unu brunan kaj unu nigran.

—Vere ne, kalojn mi ne ricevos, tiom longe kiom oni havos ĉi tiujn, ŝi diris kaj metis la piedojn en siajn grandajn nigrajn ŝuojn, kiuj estis precize duoble tiel longaj kiel ŝiaj piedoj.

—Pipi, Tomi diris, kion ni faru hodiaŭ? Ni estas liberaj de la lernejo, Anjo kaj mi!

—Nu, tion oni povas pripensi, Pipi diris. Danci ĉirkaŭ la

kristnaska arbo, tion ni ne povas fari, ĉar ĝin ni elŝovis antaŭ tri monatoj. Aliel ni povus kuri sur la glacio la tutan antaŭtagmezon. Fosi kaj serĉi oron estus amuzige, sed ankaŭ tio ne eblas, ĉar ni ne scias, kie la oro kuŝas. Plejmulto de la oro kuŝas cetere en Alasko, kaj tie oni ne povas antaŭeniri pro ĉiuj orfosistoj. Ne, ni devos eltrovi ion alian.

—Jes, ion amuzan, Anjo diris.

Pipi plektis sian hararon en du rigidajn plektaĵojn, kiuj rekte elstaris.

—Kiel estus, se ni irus en la urbon butikumi, ŝi fine diris.

—Sed ni ne havas monon, Tomi diris.

—Mi havas, Pipi diris. Kaj por pruvi tion, ŝi tuj iris malfermi sian valizon, kiu estis tute plena je oraj moneroj. Ŝi prenis taŭgan manplenon kaj metis la monerojn en la antaŭtukan poŝon meze sur la ventro.

—Kaj se mi nun havus mian ĉapelon, mi estus preta por foriro, ŝi diris. La ĉapelo estis nenie videbla. Pipi unue rigardis en la lignujon, sed tie ĝi, tute strange, ne estis. Poste ŝi rigardis en la panujon en la provizejo, sed tie estis nur ŝtrumprubando kaj difektita vekhorloĝo kaj biskviteto. Fine ŝi rigardis eĉ sur la ĉapelbreton, sed tie estis nenio ol fritpato kaj ŝraŭbingo kaj peco da fromaĝo.

—Estas neniu ordo en ĉio kaj oni ne trovas neniujn aĵojn, Pipi diris malkontente. Sed la fromaĝopeco delonge mankis al mi, estas ja bonŝanco, ke mi retrovis ĝin.

—Ho, ĉapelo, ŝi poste kriis. Ĉu vi kuniros butikumi aŭ ne? Se vi ne tuj aperos, estos tro malfrue!

Neniu ĉapelo aperis.

—Nu ja, ĝi kulpigu sin mem, se ĝi estas tiel stultaĉa. Sed mi

ne volas aŭdi plendojn, kiam mi revenos hejmen, ŝi severe diris.

Ne longe poste oni povis vidi ilin veni marŝante sur la vojo al la urbo. Tomi kaj Anjo kaj poste Pipi mem kun Sinjoro Nilson sur la ŝultro. La suno brilis agrable, la ĉielo estis blua kaj la infanoj gajaj. La akvo murmuris en la fosaĵo apud la vojo. Estis profunda fosaĵo kun multe da akvo.

—Mi ŝatas fosaĵojn, Pipi diris kaj paŝis senpripense en la akvon. Ĝi atingis ĝis super la genuoj kaj kiam ŝi diligente saltis, ĝi ŝprucis sur Tomin kaj Anjon.

—Mi ludas, ke mi estas boato, ŝi diris kaj plugis tra la akvo. Ĝuste kiam ŝi diris tion, ŝi falis kaj plonĝis.

—Pli ĝuste submara boato, ŝi daŭrigis tute trankvile, kiam ŝi reaperigis la nazon.

—Sed Pipi, vi estas tute malseka, Anjo diris malkviete.

—Kaj kio estas erara en tio, Pipi diris. Kiu diris, ke infanoj nepre estu sekaj? De malvarma frotado oni fariĝas sana, tion mi aŭdis iun diri. Nur en ĉi tiu lando oni opinias, ke infanoj ne iru en fosaĵoj. En Ameriko la fosaĵoj estas tiel plenplenaj je infanoj, ke ne estas loko por la akvo. Ili restas tie la tutan jaron. Vintre ili kompreneble frostfiksiĝas, kaj la kapoj elstaras el la glacio. La patrinoj devas iri tien por doni al ili sukosupon kaj viandbulojn, ĉar ili ne povas veni hejmen manĝi. Sed sanaj kiel nuksokernoj ili estas, estu certa pri tio!

La urbeto aspektis idilia en la printempa sunbrilo. La mallarĝaj stratoj rulŝtone pavimitaj serpentumis laŭplaĉe inter la domvicoj. En la ĝardenetoj, kiuj ĉirkaŭis preskaŭ ĉiujn domojn, ĝermis galantoj kaj krokusoj. Estis multaj butikoj en la urbeto. Ĉi tiun belan printempan tagon multaj homoj kuris internen eksteren tra la pordoj kaj la pordsonoriloj de la bu-



tikoj tintadis senĉese. La sinjorinoj venis kun korboj sur la brakoj por aĉeti kafon kaj sukeron kaj sapon kaj buteron. Multaj infanoj de la urbeto ankaŭ estis ekstere por aĉeti krebombonon aŭ pakaĵon da maĉgumo. Sed plej multaj ne havis monon por aĉeti ion, kaj tiuj kompatinduloj devis stari ekster la butikoj kaj nur rigardi ĉiujn bongustaĵojn, kiuj troviĝis malantaŭ la fenestrovitroj.

Ĝuste kiam la suno brilis plej bele, tri figuretoj aperis sur la Ĉefstrato. Estis Tomi kaj Anjo kaj Pipi, tre malseka Pipi, kiu lasis post si malsekan strieton, kie ŝi iris.

—Kiel feliĉaj ni estas, Anjo diris. Vidu, kiom da butikoj, kaj ni havas tutan antaŭtukan poŝon plena da oraj moneroj.

Ankaŭ Tomi tiom ekĝojis, pripensante tion, ke li faris grandan salton.

—Ĉu ni komencu do, Pipi diris. Unue kaj ĉefe mi volus aĉeti pianon.

—Sed Pipi, Tomi diris, vi ja ne scias ludi pianon, ĉu?

—Kiel mi tion sciu, kiam mi neniam provis, Pipi diris. Mi neniam havis pianon por provi. Kaj tion mi diru al vi, Tomi — ludi pianon sen piano, tio postulas amason da ekzercado, antaŭ ol oni povas.

Neniu pianobutiko estis videbla. Anstataŭe la infanoj preterpasis parfumbutikon. En la montrofenestro staris granda poto kun lentuga ŝmiriĵo, kaj apud la poto estis granda kartona ŝildo, sur kiu estis skribite: "Ĉu vi suferas pro lentugoj?"

—Kio estas skribita sur la ŝildo, Pipi demandis.

Ŝi ne kapablis legi tre multe, ĉar ŝi ne volis iri al lernejo kiel aliaj infanoj.

—Estas skribite: "Ĉu vi suferas pro lentugoj?" Anjo diris.

—Ho, ĉu vere, Pipi diris pripenseme. Nu ja, ĝentila demando postulas ĝentilan respondon. Venu kaj ni eniru!

Ŝi malfermis la pordon kaj eniris senpere sekvata de Tomi kaj Anjo. Maljuna sinjorino staris malantaŭ la vendotablo. Pipi iris rekte al ŝi.

—Ne, ŝi decide diris.

—Kion vi deziras, la sinjorino diris.

—Ne, Pipi rediris.

—Mi ne komprenas, kion vi celas, la sinjorino diris.

—Ne, mi ne suferas pro lentugoj, Pipi diris.

Tiam la sinjorino komprenis. Sed poste ŝi ĵetis rigardon al Pipi kaj ekkriis:

—Sed kara infano, vi ja havas la tutan vizaĝon plena da lentugoj!

—Jes certe, Pipi diris. Sed mi ne suferas pro ili. Mi ŝatas ilin! Bonan matenon!

Ŝi eliris. De la pordo ŝi turnis sin kaj kriis:

—Sed se vi hazarde ricevos ian ŝmiriĝon per kiu oni povas ricevi pli da lentugoj, sendu iajn sep aŭ ok potojn al mi.

Pipi plumarŝis. Ekster bombonbutiko ŝi haltis. Tie staris tuta vico da infanetoj gapantaj pro ĉiuj ravaĵoj dismetitaj malantaŭ la fenestrovitro. Grandaj potoj plenaj da ruĝaj kaj bluaj kaj verdaj bombonoj, longaj vicoj da ĉokoladaj tabuletoj, tutaj montoj da maĉgumo kaj la plej tentaj kremaj lekbombonoj, jes, ne estis strange, ke la infanetoj, kiuj staris tie rigardante, jen kaj jen eligis pezan ĝemspiron. Ĉar ili ne havis monon, eĉ ne la plej malgrandan kvin-oeran moneron.

—Pipi, ĉu ni eniru tiun butikon, Tomi fervore diris kaj tiris la robon de Pipi.

—Tiu butikon ni eniru, Pipi diris emfaze. Longe internen! Kaj tion ili faris.

—Mi deziras dek ok kilogramojn da bombonoj, Pipi diris kaj svingomontris oran moneron. La komizino en la butiko nur gapis. Ŝi ne kutimis al tio, ke iu aĉetu tiom da bombonoj po unu fojo.

—Vi volas diri, ke vi deziras dek ok bombonojn, ŝi diris.

—Mi volas diri, ke mi deziras dek ok kilogramojn da bombonoj, Pipi diris. Ŝi metis la ormoneron sur la vendotablon. Kaj tiam la komizino ekurĝis plenigi grandajn saketojn per bombonoj. Tomi kaj Anjo staris apude kaj montris, kiuj specoj estas plej bongustaj. Estis tie kelkaj ruĝaj, kiuj estis tiel bongustegaj. Kiam oni estis suĉanta tian bombonon dum iom da tempo, oni subite ricevis mirindan ŝmiraĵon en la buŝo. Poste estis verdaj, acidetaj, kiuj ankaŭ ne estis malŝatindaj. Gelatenaj framboj kaj glicirizaj boatoj ankaŭ gustis bone.

—Ni prenu po tri kilogramoj de ĉiu, Anjo proponis. Kaj tion ili faris.

—Se mi fine povus havi sesdek lekbombonojn kaj sepdek du pakaĵojn da krembombonoj, tiam mi kredas, ke ne estas pli ol cent tri ĉokoladaj cigaredoj, kiujn mi bezonus por hodiaŭ, Pipi diris. Tiakaze estus ĉareto, en kiu mi povus tiri la tuton.

La komizino diris, ke oni certe povas aĉeti ĉareton en la apuda ludilbutiko.

Ekster la bombonbutiko nun kolektiĝis multaj infanoj, kiuj gapis tra la fenestro kaj preskaŭ svenis pro ekscitiĝo, kiam ili vidis, kiel Pipi butikumas. Pipi rapide kuris en ludilbutikon, aĉetis ĉareton kaj ŝarĝis ĝin per ĉiuj siaj saketoj. Ŝi ĉirkaŭrigardis. Kaj ŝi kriis:

—Se estas iu infano ĉi tie, kiu ne manĝas bombonojn, tiam bonvolu antaŭenpaŝi!

Neniu antaŭenpaŝis.

—Tre strange, Pipi diris. Nu, ĉu estas iu infano, kiu manĝas bombonojn?

Tiam dudek tri infanoj antaŭeniris. Tomi kaj Anjo ankaŭ, kompreneble.

—Tomi, malfermu la saketojn, Pipi diris.

Tion Tomi faris. Poste komenciĝis manĝegado de bombonoj, kian oni neniam antaŭe vidis en la urbetoj. Ĉiuj infanoj plenŝtopis la buŝon per bombonoj, la ruĝaj kun la bongusta ŝmiraĵo kaj la verdaj acidetaĵoj kaj glicirizaj boatoj kaj getate-naj framboj unu post la alia. Ĉokoladan cigaredon oni povis ĉiam havi en la buŝangulo, ĉar la gustoj de ĉokolado kaj de gelatena frambo sentiĝis tre agrablaj kune. El ĉiuj direktoj venis novaj infanoj kurante, kaj Pipi disdonadis bombonojn per plenaj manoj.

—Mi kredas, ke mi devas aĉeti ankoraŭ dek ok kilogramojn, ŝi diris. Aliel nenio restos por morgaŭ.

Pipi aĉetis ankoraŭ dek ok kilogramojn, sed vere ne restis multo por morgaŭ.

—Nun ni iru al alia butikoj, Pipi diris kaj eniris butikon kun ludiloj. Ĉiuj infanoj akompanis. En la ludilbutikoj estis multo agrablaj, trajnoj kaj aŭtoj, kiujn oni povis tiri, ĉarmaj pupetoj en belaj roboj, pupservicoj kaj krakpistoiloj kaj stanaj soldatoj kaj ŝtofaj hundoj kaj elefantoj kaj paĝosigniloj kaj arlekenoj.

—Kion vi deziras, la komizo diris.

—Mi deziras iom da ĉio, Pipi diris kaj explore ĉirkaŭrigardis la bretojn. Ekzistas, ekzemple, granda manko je arlekenoj,

ŝi daŭrigis. Kaj je krakpistojoj. Sed tion oni povas aranĝi, mi esperas.

Pipi elprenis manplenon da ormoneroj. Poste la infanoj rajtis fingromontri, kion ili laŭ propra opinio plej bezonas. Anjo decidis pri mirinda pupo kun hela bukla hararo kaj rozkolora robo. Ĝi povis diri "mama", kiam ŝi premis ĝian ventron. Tomi volis havi aerpafilon kaj vapormaŝinon. Kaj li ricevis. Ĉiuj aliaj infanoj ankaŭ montris, kion ili volas havi, kaj kiam Pipi finbutikumis, ne restis multaj objektoj en la butikoj. Restis nur kelkaj paĝosigniloj kaj kelkaj ludkuboj. Pipi aĉetis nenion ajn por si mem, sed Sinjoro Nilson ricevis spegulon.

Ĝus antaŭ ol ili foriris, Pipi aĉetis por ĉiu infano argilan kukolon, kaj kiam la infanoj venis sur la straton, ili ludis per siaj kukoloj, kaj Pipi signis la takton. Estis tia bruo sur la Ĉefstrato, ke la policisto fine venis por vidi, kio okazas.

—Kio estas ĉi tiu bruaĉo, li kriis.

—Estas la parada marŝo de la regimento de Kronoberg, Pipi diris. Sed mi ne estas certa, ke ĉiuj infanoj komprenis tion. Kelkaj verŝajne kredas, ke ni ludas "Tondru kiel fulmo, fratoj".

—Tuj ĉesu, la policisto kriegis kaj kovris la orelojn per la manoj. Pipi konsole frapis lian dorson.

—Estu ĝoja, ke ni ne aĉetis trombonojn, ŝi diris.

Iom post iom la argilaj kukoloj eksilentis, unu post la alia. Fine nur el la kukolo de Tomi venis jen kaj jen pepeto. La policisto tre severe admonis, ke ne rajtas esti homamasigo sur la Ĉefstrato kaj ke ĉiuj infanoj iru hejmen. Ili fakte tute ne kontraŭis tion. Ili volis provi siajn ludtraĵojn kaj veturigi siajn aŭtojn kaj prepari liton por siaj novaj pupoj. Tial ili ĉiuj

iris hejmen, ĝojaj kaj kontentaj. Ili tute ne vespermanĝis tiun tagon.

Pipi kaj Tomi kaj Anjo ankaŭ survojis hejmen. Pipi tiris post si la ĉareton. Ŝi rigardis ĉiujn ŝildojn, kiujn ili preterpasis, kaj literumis tiel, kiel ŝi kapablis.

—A-p-o-t-e-k-o, sed ĉu oni ne aĉetas medukamentojn tie, ŝi diris.

—Jes tie oni aĉetas medikamentojn, Anjo diris.

—Ho, do mi devas tuj eniri por aĉeti ion, Pipi diris.

—Sed vi ja ne estas malsana, Tomi diris.

—Kio oni ne estas, oni povas fariĝi, Pipi diris. Ĉiujare homoj amase malsaniĝas kaj mortas, nur pro tio, ke ili ne aĉetis medukamenton ĝustatemepe. Kaj certe tio ne rajtos okazi al mi.

En la apoteko la apotekisto staris kaj rulis pilolojn. Sed li intencis ruli nur kelkajn pli, ĉar estis malfrue kaj li estis baldaŭ fermonta. Tiam Pipi kaj Tomi kaj Anjo aliris la vendotablon.

—Mi volas aĉeti kvar litrojn da medukamento, Pipi diris.

—Kian specon da medikamento, la apotekisto diris senpacience.

—Nu, prefere estu iu, kiu helpas kontraŭ malsano, Pipi diris.

—Kia malsano, la apotekisto diris ankoraŭ pli senpacience.

—Nu, prenu iun, kiu helpas kontraŭ kokluŝo kaj frotvundoj kaj ventrodoloro kaj rubeolo, kaj se oni hazarde metis pizon en la nazon kaj simile. Estus bone, se oni ankaŭ povus poluri meblojn per ĝi. Vere bonega medukamento ĝi devus esti.

La apotekisto diris, ke ne ekzistas medikamento, kiu estas

tiel bonega. Oni havu malsamajn medikamentojn por malsamaj malsanoj, li asertis, kaj kiam Pipi estis nominta dekon da aliaj malsanoj, kiujn ŝi volis havi kuracitaj, li metis tutan vicon da boteloj sur la vendotablon. Sur kelkajn li skribis "Por ekstera uzo", kaj tio signifis, ke tiun medikamenton oni uzu nur por ekstera frotado. Pipi pagis, prenis siajn botelojn, dankis kaj foriris. Tomi kaj Anjo sekvis ŝin. La apotekisto rigardis la horloĝon kaj rimarkis, ke estas fermotempo. Li zorge ŝlosis la pordon post la infanoj kaj pensis, ke nun estos agrable veni hejmen kaj ricevi ion por manĝi.

Pipi demetis siajn botelojn ekstere.

—Aj, aj, mi preskaŭ forgesis la plej gravan aferon, ŝi diris.

Ĉar la pordo nun estis fermita, ŝi metis la montrofingron sur la sonorilon kaj premis forte kaj longe. Tomi kaj Anjo aŭdis, kiel akre sonoris interne en la apoteko. Post momento luketo en la pordo estis malfermata — tra tiu luketo oni povis aĉeti medikamenton, se oni hazarde malsaniĝis en al nokto. La apotekisto elmetis sian kapon. Lia vizaĝo estis iom ruĝa.

—Kaj kion vi volas nun, li furioze diris al Pipi.

—Jes, pardonon, bona aputekisto, Pipi diris, sed mi ekcerbumis pri io. La aputekisto tiel bone komprenas malsanojn — kio estas plej bona, se oni havas ventrodoloron, ĉu manĝi varman sangobulkon aŭ trempi la tutan ventron en malvarman akvon?

La vizaĝo de la apotekisto ankoraŭ pli ruĝiĝis.

—Malaperu, li kriis, kaj tuj, aliel ...

Li fermis la luketon.

—Ho, kiel kolera li estas, Pipi diris. Oni povus kredi, ke mi faris ion malbonan al li.

Ŝi denove sonorigis, kaj ne pasis multaj sekundoj antaŭ ol la apotekisto refariĝis videbla en la luketo. Lia vizaĝo estis nekredeble ruĝega.

—Varma sangobulko eble estas malfacile digestebla, Pipi supozis kaj rigardis lin per afablaj okuloj. La apotekisto nenion repondis, sed brue fermis la luketon.

—Nu ja, Pipi diris kaj skuis la ŝultrojn, mi do tamen provu varman sangobulkon. Li kulpigu sin mem, se malsukcesos.

Ŝi trankvile sidiĝis sur la ŝtuparo ekster la apoteko kaj vicigis ĉiujn siajn botelojn.

—Imagu, kiel nepraktikaj plenkreskuloj povas esti, ŝi diris. Ĉi tie mi nun havas, ni vidu, ok botelojn, kaj ĉio povus bonege trovi lokon en unu. Sed feliĉe mi mem havas iom da simpla prudento.

Per tiuj vortoj ŝi eltiris la korkojn el la boteloj kaj poste verŝis ĉiujn medikamentojn en unu botelon. Ŝi forte skuis ĝin. Poste ŝi levis la botelon al la buŝo kaj trinkis per grandaj glutoj. Anjo, kiu sciis, ke kelkaj medikamentoj estis por ekstera frotado, fariĝis maltrankvila.

—Sed Pipi, kiel vi povas scii, ke tiu medikamento estas nevenena?

—Tion mi konstato, Pipi diris gaje. Mi rimarkos tion plej malfrue morgaŭ. Se mi tiam daŭre vivos, ĝi ne estas venena, kaj en tiu kazo eĉ infanetoj povas trinki ĝin.

Tomi kaj Anjo cerbumis pri tio. Post momento Tomi hezite kaj iom malĝoje diris:

—Jes, sed se ĝi tamen estas venena, kiel estu en tia kazo?

—En tia kazo vi prenu tion, kio restas en la botelo kaj poluru la manĝosalonan meblaron, Pipi diris. Venena aŭ ne, tiu medikamento ne estu vane aĉetita.



Ŝi prenis la botelon kaj metis ĝin en la ĉareton. Tie jam kuŝis la vapormaŝino kaj la aerpafilo de Tomi kaj la pupo de Anjo kaj kvin ruĝaj bombonetoj. Tio estis ĉio, kio restis de la dek ok kilogramoj. Ankaŭ sinjoro Nilson sidis tie. Ĝi estis laca kaj volis veturi.

—Cetere mi diras al vi, ke mi kredas, ke estas vere bona medukamento. Mi jam sentas min multe pli sana. Mi sentas min speciale sana kaj gaja en la vosto, Pipi diris kaj svingis tien reen sian postajeton. Kaj ŝi ektiris la ĉareton kaj svingiris hejmen al Vilao Vilaltao. Tomi kaj Anjo iris apud ŝi kaj sentis, ke ili havas iom da ventrodoloro.

## Pipi estas ŝiprompulo

Ĉiutage, tuj kiam la lernejo finiĝis, Tomi kaj Anjo kuregis transe al Vilao Vilaltao. Ili eĉ ne volis fari siajn taskojn hejme, sed kunprenis siajn lernolibrojn al Pipi.

—Estas bone, Pipi diris. Sidu ĉi tie kaj studu, tiel eble iom da instruiteco fiksiĝos ankaŭ sur mi. Mi ne nepre sentas, ke mi bezonas tion, sed povas esti, ke ne eblas fariĝi Vere Nobla Sinjorino, se oni ne scias, kiom da hotentotoj troviĝas en Aŭstralio.

Tomi kaj Anjo sidis ĉe la kuireja tablo kun siaj geografilibroj malfermitaj. Pipi sidis meze sur la tablo kun la kruroj tiritaj sub si.

—Sed nur imagu, Pipi diris kaj cerbume metis fingron sur la nazon, imagu, ke mi ĵus lernis, kiom da hotentotoj troviĝas, kaj unu el ili ekhavas pneŭmonion kaj mortas, tiam ĉio estas vana, kaj ĉi tie mi sidas kaj tute ne estas Vere Nobla Sinjorino.

Ŝi cerbumis.

—Iu devus diri al viaj hotentotoj, ke ili bone konduku, por ke ne estu eraroj en viaj lernolibroj, ŝi diris.

Kiam Tomi kaj Anjo estis pretaj kun siaj hejmtaskoj, tiam komenciĝis la amuzo. Se estis bela vetero, ili restis en la ĝardeno, iom rajdis la ĉevalon aŭ grimpis sur la tegmenton de la kalandrejo kaj sidis tie trinkante kafon, aŭ ili surgrimpis la malnovan kverkon, kiu estis tute kava interne, tiel ke ili po-

vis malsuprengrimpi en la trunkon. Pipi diris, ke ĝi estas tre stranga arbo, ĉar limonado kreskas en ĝi. En la arbo kreskis limonado. Kaj tio estis vera, ĉar ĉiufoje, kiam la infanoj grimpis al sia kaŝejo en la kverko, tie staris tri limonadboteloj kaj atendis ilin. Tomi kaj Anjo ne povis kompreni, kien la limonadboteloj poste malaperis, sed Pipi diris, ke ili forvelkas tuj kiam ili estas eltrinkitaj. Jes ja, ĝi estis rimarkinda arbo, tion opiniis kaj Tomi kaj Anjo. Kelkfoje kreskis ankaŭ ĉokoladaj platetoj, sed nur en ĵaŭdoj, Pipi diris, kaj Tomi kaj Anjo tre zorge ĉiuĵaŭde iris tien por kolekti ĉokoladajn platetojn. Pipi diris, ke oni certe povus kreskigi ankaŭ francan panon kaj eĉ bovidrostaĵon, se oni nur jen kaj jen donus al si tempon por riĉe akvumi la arbon.

Se estis pluva vetero, ili restis endome kaj ankaŭ tio ne estis teda. Ili povis aŭ trarigardi ĉiujn belajn objektojn en la tirkestoj de Pipi, aŭ ili povis sidi antaŭ la kuirforno kaj rigardi, kiel Pipi bakas vaflojn aŭ rostas pomojn, aŭ ili povis rampi en la lignaĵojn kaj sidi tie aŭskultante, kiam Pipi rakontis kelkajn strangajn aventurojn de tiu tempo, kiam ŝi veliris sur la maro.

—Ho ve, kiel ŝtormis, Pipi povis diri. Eĉ la fiŝoj estis marmalsanaj kaj volis albordiĝi. Mi mem vidis ŝarkon, kiu estis tute verda en la vizaĝo, kaj sepion, kiu sidis kovrante sian frunton per ĉiuj siaj multaj brakoj. Ho ve, kia ŝtormo estis!

—Ho, ĉu vi ne timis, Pipi, Anjo diris.

—Jes, ĉar imagu, se vi ŝiprompiĝus, Tomi diris.

—Nu, Pipi diris. Iom pli aŭ malpli ŝiprompiĝinta mi estis multajn fojojn, tial mi ne timis. Almenaŭ ne tuj. Mi ne timis, kiam la rosinoj forblovis el la fruktosupo, dum ni tagmanĝis, nek kiam la artefaritaj dentoj elblovis el la buŝo de la kuiristo. Sed kiam mi vidis, ke nur la felo restis de la ŝipkato, kaj ke

ĝi mem velis tutnuda en la aero survoje al Fora Oriento, tiam eksentiĝis iom malagrable.

—Mi havas libron, kiu temas pri ŝiprompiĝo, Tomi diris. Robinzono ĝi nomiĝas.

—Ho jes, ĝi estas tre bona, Anjo diris. Robinzono venis al neloĝata insulo.

—Pipi, ĉu vi iam travivis ŝiprompiĝon, Tomi demandis kaj pli komforte sidiĝis en la lignaĵejo. Kaj venis al senhoma insulo?

—Tion oni povus aserti, Pipi diris emfaze. Oni vere devas serĉi ion pli ŝiprompiĝintan ol mi. En tio Robinzono vere malsuperas. Mi kredas, ke estas proksimume ok aŭ dek insuloj en la Atlantiko kaj la Pacifiko, al kiuj mi ne alboridiĝis post ŝiprompiĝo. Ili estas sur aparta nigra listo en turismaj gvidlibroj.

—Estas ja agrable esti sur senhoma insulo, Tomi diris. Mi volus ankaŭ esti sur iu, mi ankaŭ.

—Tio estas facile aranĝebla, Pipi diris. Insuloj ne mankas.

—Ne, mi scias pri unu ne tre longe for de ĉi tie, Tomi diris.

—Ĉu ĝi situas en lago, Pipi demandis.

—Kompreneble, Tomi diris.

—Bone, Pipi diris. Ĉar se ĝi situus sur seka tero ĝi ne taŭgus.

Tomi fariĝis tute sovaĝa pro ekscitiĝo.

—Ni faru tion, li kriis. Ni tuj ekiru.

Post du tagoj Tomi kaj Anjo ekhavas someran ferion kaj samtempe iliaj gepatroj forvojaĝos. Pli taŭga okazo por ludi Robinzonon ne estis imagebla.

—Se ni ŝiprompiĝu, ni devas unue aranĝi, ke ni havu boaton, Pipi diris.

—Kaj ni ne havas, Anjo diris.

—Mi vidis, ke kuŝas malnova difektita remboato sur la fundo de la rivereto, Pipi diris.

—Sed ĝi jam ŝiprompiĝis, Anjo diris.

—Des pli bone, Pipi diris. Tiel ĝi jam scias, kiel devas okazi.

Estis facila tasko por Pipi levi la dronintan remboaton. Tutan tagon ŝi poste staris ĉe la bordo de la rivereto kaj kalfatris la boatselon per gudro kaj kalfatraĵo. Kaj dum pluva antaŭtagmezo ŝi restis en la lignaĵejo kaj ĉarpentris paron da remiloj.

Tomi kaj Anjo havis siajn somerajn feriojn kaj iliaj gepatroj forvojaĝis.

—Ni revenos post du tagoj, la patrino de la infanoj diris. Estu dumtempe vere bonkonduktaj kaj obeemaj kaj memoru, ke vi devas fari precize kiel Ela diras.

Ela estis la servistino de la familio, kaj ŝi devus atenti pri Tomi kaj Anjo, dum liaj gepatroj forestis. Sed kiam la infanoj restis solaj kun Ela, Tomi diris:

—Ela tute ne bezonas atenti pri ni, ĉar ni estos ĉe Pipi absolute la tutan tempon.

—Cetere ni povas ja atenti pri ni mem, Anjo diris. Pipi neniam havas iun, kiu atentis pri ŝi. Kial ni ne povu esti en paco almenaŭ du tagojn?

Ela tute ne kontraŭis, ke ŝi estu libera dum kelkaj tagoj, tial kiam Tomi kaj Anjo estis petadintaj sufiĉe longe, Ela diris ke, nu bone, ŝi povas certe veturi hejmen viziti sian patrinon por iom da tempo. Sed en tiu kazo la infanoj devas promesi, ke ili manĝos kaj dormos bonorde, ke ili ne kurados ekstere dum

la vesperoj sen varma lanjako sur si. Tomi diris, ke li volonte surmetos dekduon da lanjako, se nur Ela foriros.

Kaj tiel fariĝis. Ela malaperis kaj du horojn poste Pipi, Tomi kaj Anjo, la ĉevalo kaj Sinjoro Nilson ekekskursis al la neloĝata insulo.

Estis ĉarma frusomera vespero. Estis tute varmete en la aero, kvankam estis nube. Ili devis iri sufiĉe longe antaŭ ol ili venis al la lago, kie situis la neloĝata insulo. Pipi portis la boton renversita super la kapo. Sur la dorson de la ĉevalo ŝi estis ŝarĝinta grandegan sakon kaj tendon.

—Kio estas en la sako, Tomi demandis.

—Manĝaĵo kaj pafiloj kaj lankovriloj kaj malplena botelo, Pipi diris. Ĉar mi opinias, ke ni havu iom komfortan ŝiprompiĝon, ĉar estas la unua fojo por vi. Kiam mi ŝiprompiĝas, mi ĉiam kutimas pafi antilopon aŭ lamon kaj manĝi la viandon kruda, sed povus ja okazi, ke ekzistas nek antilopoj nek lamoj sur ĉitiu insulo, kaj estus ĉagrene, se ni devus mortmalsati pro tia bagatelaĵo.

—Por kio vi uzos la malplenan botelon, Anjo miris.

—Por kio mi uzos la malplenan botelon? Kiel vi povas demandi tiel stulte? Boato estas la ĉefa objekto, kiam oni ŝiprompiĝu, sed post tio venas malplena botelo. Tion mia patro instruis al mi, jam kiam mi kuŝis en la lulilo. "Pipi", li diris, "ne gravas, se vi forgesis lavi viajn piedojn, kiam oni prezentos vin ĉe la reĝa kortego, sed se vi forgesas la malplenan botelon, kiam vi ŝiprompiĝos, tiam vi povas adiaŭi."

—Jes, sed por kio ni uzu ĝin, Anjo obstinis.

—Ĉu vi neniam aŭdis pri botelpoŝto, Pipi diris. Vi skribas paperon kaj petas pri helpo, poste vi metas ĝin en la botelon kaj enŝtopas la korkon kaj ĵetas la botelon en la maron kaj ĝi

forflosas al iu, kiu povas veni savi vin. Kiel vi imagas, ke vi povas travivi ŝiprompiĝon? Ĉu lasante ĉion al la fato? Vere ne!

—Ho, ĉu tiel, Anjo diris.

Baldaŭ ili atingis lageton, kaj tie meze en la lago situis la neeloĝata insulo. La suno ĵus trarompis la nubojn kaj ĵetis varman rebrilon super la helan frusomeran verdon.

—Efektive, Pipi diris, tio estas unu el la plej agrablaj neeloĝataj insuloj, kiujn mi vidis.

Rapide ŝi turnis la boaton en la lagon, liberigis la ĉevalon de ĝia ŝarĝo kaj pakis ĉion sur la fundon de la remboato. Anjo kaj Tomi kaj Sinjoro Nilson ensaltis. Pipi karesis la ĉevalon.

—Jes, mia kara ĉevalo, kiel ajn mi ŝatus, mi ne povas peti vin sidi en la boato. Mi esperas, ke vi povas naĝi. Estas tute simple. Nur faru ĉi tiel.

Ŝi ensaltis la lagon vestita kaj faris kelkaj naĝmovojn.

—Estas tre amuze, kredu min. Kaj se vi volas havi eĉ pli da amuzo, vi ludu balenon. Ĉi tiel!

Pipi plenigis la buŝon per akvo, kuŝiĝis surdorse kaj ŝprucis kiel fontano. Ne ŝajnis, ke la ĉevalo opinias, ke tio estas amuza, sed kiam Pipi eniris la boaton, prenis la remilojn kaj forremis, la ĉevalo ĵetis sin en la akvon kaj ekaĝis. Sed ĝi ne ludis balenon. Kiam ili preskaŭ atingis la insulon, Pipi kriis:

—Ĉiuj al la pumpiloj!

Kaj sekundon poste:

—Vane! Ni devas forlasi la ŝipon! Savu sin, kiu povas!

Ŝi ekstaris sur la poŭpo kaj plonĝis kapantaŭe en la akvon. Baldaŭ ŝi reaperis, kaptis la ligŝnuron kaj naĝis al la bordo.

—Mi devas ĉiukaze savi la manĝoprovizon, tial la ŝipano-ro povas same bone resti surŝipe, ŝi diris. Ŝi ligis la boaton je

ŝtono kaj helpis al Tomi kaj Anjo surbordiĝi. Sinjoro Nilson helpis sin mem.

—Okazis miraklo, Pipi kriis. Ni estas savitaj. Almenaŭ ĝis plue. Se ĉi tie ne ekzistas kanibaloj kaj leonoj.

Ankaŭ la ĉevalo nun atingis la insulon. Ĝi eliris el la akvo kaj forskuis ĝin.

—Jen, tie estas ankaŭ nia ĉefmaristo, Pipi diris kontente. Ni interkonsiliĝu!

Ŝi elprenis el la sako sian pistolon, kiun ŝi iam trovis en marista kesto en la subtegmentejo de Vilao Vilaltao. Kun la pistolo alte levita ŝi kaŝiris antaŭen singarde ĉirkaŭrigardante al ĉiuj direktoj.

—Kio estas, Pipi, Anjo diris maltrankvile.

—Mi kredas, ke mi aŭdis murmuron de kanibalo, Pipi diris. Ni ne povas esti tro singardaj. Estus tute malutile savi sin de droniĝo nur por esti servota kun stufitaj legomoj kiel tag-manĝo de kanibalo!

Sed neniu kanibalo videblis.

—Ha, ili retiriĝis kaj embuskas, Pipi diris. Aŭ ili sidas kaj literumas la kuirlibron por vidi, kiel ili kuiru nin. Kaj mi diras al vi, se ili preparos min kun stufitaj karotoj, mi neniam pardonos al ili. Mi abomenas karotojn.

—Fi, Pipi, ne parolu tiel, Anjo diris kaj tremetis.

—Ho, ĉu vi ankaŭ ne ŝatas karotojn? Estu kiel ajn, nun ni starigu la tendon.

Kaj tion Pipi faris. Baldaŭ ĝi stari sur ŝirmita loko kaj Tomi kaj Anjo enrampis kaj elrampis ĝin kaj estis tute feliĉaj. Iom for de la tendo Pipi rondmetis kelkajn ŝtonojn kaj sur ili ŝi kolektis branĉetojn kaj splitojn.

—Ho, kiel agrable, ĉu ni havos fajron, Anjo diris.



—Jes, certe, Pipi diris. Ŝi prenis du lignerojn kaj ekfrotis ilin unu kontraŭ la alia. Tomi tre interesiĝis.

—Sed Pipi, li diris ravite, ĉu vi faros fajron kiel la sovaĝuloj?

—Ne, sed miaj fingroj frostas, Pipi diris, kaj ĉi tio estas same efika kiel interfrapado de brakoj. Mi vidu, kien mi metis la alumetskatolon?

Baldaŭ flamis gaja fajro kaj Tomi diris, ke li opinias tion tre hejmece.

—Jes, kaj ĝi tenas for la sovaĝajn bestojn, Pipi diris.

Anjo ekspiregis.

—Kiujn sovaĝajn bestojn, ŝi demandis per tremanta voĉo.

—La kulojn, Pipi diris kaj penseme gratis grandan kulpi-kaĵon sur la kruro.

Anjo ekspiris pli facile.

—Jes, kaj ankaŭ la leonojn, kompreneble, Pipi daŭrigis. Sed kontraŭ pitonoj kaj amerikaj bizonoj ĝi laŭdire ne helpas.

Ŝi frapis sian pistolon.

—Sed estu trankvila, Anjo, ŝi diris. Per ĉi tiu mi certe aranĝos la aferon, eĉ se venos arvikolo.

Pipi aranĝis kafon kaj buterpanojn, kaj la infanoj sidis ĉirkaŭ la fajro kaj manĝis kaj trinkis kaj tre amuziĝis. Sinjoro Nilson sidis sur la ŝultro de Pipi kaj ankaŭ manĝis, kaj la ĉevalo proksimigis sian nazon de tempo al tempo kaj ricevis pecon da pano kaj iom da sukero. kaj ĝi ankaŭ havis multe da freŝa verda herbo de kiu manĝi.

La ĉielo estis nuba kaj komencis fariĝi tute malhele inter la arbustoj. Anjo movis sin tiel proksime al Pipi kiel eblis. La fajroflamoj jĉetis tiel strangajn ombrojn. Sentiĝis, kiel se la malumo estus vivanta tie ekster ilia rondeto, kiun la fajrolumo prilumis. Anjo timtremis. Imagu, ĉu staras kanibalo malantaŭ

tiu junipero? Aŭ ĉu leono kaŝas sin malantaŭ la granda ŝtono?

Pipi demetis la kaftason.

—*Dek kvin fantomoj sur ĉerko de mortinto,  
kunkantu, hej, kaj botelo da rumo,*

ŝi kantis per sia raŭka voĉo. Anjo timtremis ankoraŭ pli.

—Tiu kanto aperas en alia libro, kiun mi havas, Tomi diris fervore. Libro pri piratoj.

—Ho, ĉu vere, Pipi diris. Tiam certe Fridolfo verkis tiun libron, ĉar li instruis ĝin al mi. Kiom da fojoj mi sidis sur la poŭpa ferdeko sur la ŝipo de mia patro dum stelklaraj noktoj kun la Suda Kruco rekte super la kapo kaj kun Fridolfo apud mi kaj aŭdis lin kanti ĉi tiel:

—*Dek kvin fantomoj sur ĉerko de mortinto,  
kunkantu, hej, kaj botelo da rumo,*

Pipi rekantis per eĉ pli raŭka voĉo.

—Pipi, sentiĝas tiel strange en mi, kiam vi kantas tiel, Tomi diris. Sentiĝas terure kaj rave samtempe.

—En mi sentiĝas preskaŭ nur terure, Anjo diris. Sed iom rave ankaŭ.

—Mi fariĝos maristo, kiam mi estos plenkreska, Tomi diris decideme. Mi fariĝos pirato same kiel vi, Pipi.

—Bone, Pipi diris. La Teroro de la Kariba Maro, tio estos vi kaj mi, Tomi. Ni alrabos oron kaj juvelojn kaj ni havos kaŝejon por niaj trezoroj profunde en groto sur neloĝata insulo en la Pacifiko kaj tri skeletojn, kiuj gardos la groton, kaj ni havos flagon kun kranio kaj du krucigitaj ostoj, kaj ni kantos "Dek kvin fantomoj" tiel, ke aŭdiĝos de unu flanko de la Atlantiko

ĝis la alia, kaj ĉiuj marveturantoj tute paliĝos, kiam ili aŭdos nin, kaj pripensos ĵeti sin en la maron por eviti nian sangan, sangan venĝon!

—Jes, sed kio pri mi, Anjo diris plende. Mi ne kuraĝas fariĝi pirato. Kion mi faru?

—Ho, vi povos tamen kuniri, Pipi diris. Kaj polvoviŝi la for-tepianon!

Iom post iom la fajro estingiĝis.

—Tempo enlitiĝi, Pipi diris. Ŝi estis metinta piceajn branĉojn sur la grundo en la tendo kaj sur la branĉojn plurajn dikajn lankovrilojn.

—Ĉu vi volas kuŝi pied-ĉe-kapo kun mi en la tendo, Pipi diris al la ĉevalo. Aŭ ĉu vi preferas stari ĉi tie ekstere sub arbo kun ĉevalkovrilo sur vi? Ĉu vi diras, ke vi ĉiam malbonfartas, kiam vi kuŝas en tendo? Nu, kiel vi volas! Pipi donis al ĝi amikan frapeton.

Baldaŭ ĉiuj tri infanoj kaj Sinjoro Nilson kuŝis envolvitaj en lankovriloj en la tendo. Ekstere la ondoj plaŭdis kontraŭ la bordon.

—Aŭdu la ondegojn de la oceano, Pipi diris sonĝe.

Estis mallume kiel en sako, kaj Anjo tenis la manon de Pipi, ĉar tiel ĉio sentiĝis malpli danĝera. Subite ekpluvis. La gutoj plaŭdetis sur la tendotolo, sed en la tendo ĉio estis varma kaj seka, kaj tiam estis nur agrable aŭdi la plaŭdadon. Pipi eliris kaj metis plian kovrilon sur la ĉevalon. Ĝi staris sub densa piceo kaj ne estis mizera.

—Kiel agrable estas, Tomi suspiris, kiam Pipi denove envenis.

—Jes, certe, Pipi diris. Kaj vidu, kion mi trovis sub ŝtono: tri ĉokoladajn platetojn!

Tri minutojn poste Anjo dormis kun la buŝo plena je ĉokolado kaj la mano de Pipi en sia.

—Ni forgesis brosi la dentojn ĉivespere, Tomi diris. Poste ankaŭ li ekdormis.

Kiam Tomi kaj Anjo vekiĝis, Pipi estis malaperinta. Ili rapide rampis el la tendo. La suno brilis. Antaŭ la tendo brulis nova fajro, kaj Pipi sidis ĉe la fajro fritanta ŝinkon kaj kuiranta kafon.

—Korajn gratulojn kaj ĝojan paskon, ŝi diris, kiam ŝi ekvidis Tomin kaj Anjon.

—Eĥ, ne estas pasko nun, Tomi diris.

—Ho, Pipi diris. Do ŝparu ĝin ĝis venonta jaro!

La bonodoro de ŝinko kaj kafo trafis la nazojn de la infanoj. Ili sidiĝis kun krucigitaj kruroj ĉirkaŭ la fajro kaj Pipi donis ŝinkon kaj ovojn kaj terpomojn al ili. Poste ili trinkis kafon kun spickukoj. Kaj neniam matenmanĝo gustis tiel mirinde.

—Mi opinias, ke ni fartas pli bone ol Robinzono, Tomi diris.

—Jes, se ni poste povus trovi freŝan fiŝon por tagmanĝo, mi timas, ke Robinzono fariĝus blua pro envio, Pipi diris.

—Hu, mi ne ŝatas fiŝon, Tomi diris.

—Mi ankaŭ ne, Anjo diris.

Sed Pipi detranĉis longan maldikan branĉon, ligis ŝnuron je unu fino, formis pinglon je hoko, metis paneron sur la hokon kaj sin mem sur grandan ŝtonon sube ĉe la bordo.

—Nun ni vidu, ŝi diris.

—Kion vi fiŝkaptos, Tomi demandis.

—Sepion, Pipi diris. Estas senkompara frandaĵo.

Ŝi sidis tie tutan horon, sed neniu sepio ekmordis. Perko al-

venis kaj flaris la paneron, sed tiam Pipi rapide eltiris la hokon.

—Ne, dankon, knabo, ŝi diris. Se mi diris sepio, mi volis diri sepio. Kaj vi ne venu parazitante!

Post momento Pipi ĵetis la fiŝkanon en la lagon.

—Nun vi havis bonŝancon, ŝi diris. Fariĝos krespo kun lardo, mi supozas. La sepio estas obstina hodiaŭ.

Tomi kaj Anjo estis tre kontentaj. La akvo trembrilis tre invite en la sunlumo.

—Ĉu ni banu nin, Tomi diris.

Pipi kaj Anjo konsentis pri tio. Estis iom malvarme en la akvo. Tomi kaj Anjo trempis la piedan dikfingron, sed rapide retiris ĝin.

—Mi konas pli bonan manieron, Pipi diris. Roko situis tute apud la rando de la bordo kaj sur la roko kreskis arbo. La branĉoj de la arbo etendis sin super la akvon. Pipi surgrimpis la arbon kaj ligis ŝnuregon ĉirkaŭ branĉo.

—Ĉitiel, vi komprenas. Ŝi kaptis la ŝnuregon, svingis sin en la aeron kaj glitis en la akvon.

—Tiel oni trempiĝas en unu fojo, ŝi kriis, kiam ŝi revenis.

Tomi kaj Anjo unue estis iom hezitemaj, sed aspektis tre amuze, ke ili decidis provi. Kaj kiam ili provis unu fojon, ili ne volis ĉesi, ĉar estis ankoraŭ pli amuze ol aspektis. Sinjoro Nilson ankaŭ volis partopreni. Li glitis suben laŭ la ŝnurego, sed la sekundon antaŭ ol li plonĝus en la akvon, li turniĝis kaj komencis en furioza rapido suprengrimpi. Tiel li faris ĉiufoje, kvankam la infanoj kriis al li, ke li estas malkuraĝa. Poste Pipi eltrovis, ke oni povas sidi sur lignopeco kaj gliti laŭ la roko en la akvon, kaj ankaŭ tio estis amuza, ĉar nekredeble plaŭdis, kiam ili plonĝis.

—Tiu Robinzono, ĉu li eble veturis sur lignopeco, Pipi demandis de tie, kie ŝi sidis plej alte sur la roko, preta ekveturi.

—Ne, almenaŭ ne estas skribite en la libro, Tomi diris.

—Tion mi povas imagi. Mi opinias, ke lia ŝiprompiĝo estis aĉa. Kion li faris la tutajn tagojn? Ĉu li faris kruckudraĵojn? Hej hop, jen venas mi!

Pipi malsuprenglitis kaj ŝiaj ruĝaj harplektaĵoj flirtis ĉirkaŭ ŝi.

Post la bano la infanoj decidis ĝisfunde esplori la neloĝatan insulon. Ĉiuj tri sidiĝis sur la ĉevalon kaj ĝi kompleze fortrotis kun ili. Supren laŭ deklivo kaj malsupren ili iris, tra densa arbetaro kaj inter densaj piceoj, tra marĉoj kaj tra belaj maldensejoj, kie herbejaj floroj abunde kreskas. Pipi sidis kun la pistolo preta kaj jen kaj jen ŝi pafis, tiel ke la ĉevalo eksaltegis pro timo.

—Jen falis leono, ŝi kontente diris.

Aŭ:

—Nun tiu kanibalo plantis sian lastan terpomon.

—Mi volas, ke ĉi tio estu ĉiam nia insulo, Tomi diris, kiam ili revenis al la tendejo kaj Pipi komencis baki krespojn kun lardo.

Tion ankaŭ Pipi kaj Anjo opiniis.

Krespoj kun lardo tre bone gustas, kiam oni ricevas ilin fume varmaj. Ne ekzistis teleroj nek forkoj nek tranĉiloj ĉe mane, kaj Anjo demandis:

—Ĉu ni rajtas manĝi per la fingroj?

—Volonte laŭ mi, Pipi diris. Sed mi mem tenos min al la malnova arto manĝi per la buŝo.

—Eĥ, vi ja komprenas, kion mi volas diri, Anjo diris. Ŝi prenis krespon per sia maneto kaj ĝue metis ĝin en la buŝon.

Kaj denove fariĝis vespero. La fajro estis estingita. Dense premitaj unu al la alia kaj grase ŝmiritaj per larda krespo sur la tuta vizaĝo la infanoj kuŝis en siaj lankovriiloj. Tra fendo en la tendotolo brilis granda stelo. La ondegoj de la oceano dormige lulis ilin.

—Hodiaŭ ni devos veturi hejmen, Tomi plende diris la postan matenon.

—Estas aĉe, Anjo diris. Mi volus resti ĉi tie la tutan someron. Sed hodiaŭ la gepatroj venos hejmen.

Post la matenmanĝo Tomi sencele promenis ĉe la bordo. Subite li ekkriegis. La boato! Ĝi estas for! Anjo fariĝis tre skuita. Kiel ili nun venos de tie? Ŝi ja volis resti sur la insulo la tutan someron, sed estas io tute alia, kiam ili scias, ke ili ne povos veni hejmen. Kaj kion kompatinda panjo diros, kiam ŝi vidos, ke Tomi kaj Anjo malaperis? Anjo ekhavis larmojn en la okuloj, kiam ŝi pensis pri tio.

—Kio okazis al vi, Anjo, Pipi diris. Kion vi fakte pensas pri ŝiprompiĝo? Kion vi kredas, ke Robinzono dirus, se venus ŝipo por kunpreni lin, kiam li estis sur nelogata insulo du tagojn? "Bonvolu, sinjoro Krusoe, iru surŝipen por esti savata kaj banata kaj razata kaj havi la ungojn de la piedfingroj tondataj!" Ne, dankon. Mi kredas, ke sinjoro Krusoe kurus kaŝi sin malantaŭ arbusto. Ĉar se oni fine sukcesis veni sur nelogatan insulon, oni ja volas resti tie almenaŭ sep jarojn.

Sep jarojn! Anjo tremis kaj Tomi aspektis tre pripensema.

—Jes, mi ne volas diri, ke ni restu ĉi tie kiom ajn longe, Pipi diris trankvilige. Kiam Tomi devos soldatservi, ni devos reaperi, mi supozas. Sed li eble povas prokrasti unu aŭ du jarojn.

Anjo fariĝis pli kaj pli senespera. Pipi penseme rigardis ŝin.

—Ne, se vi tiel reagis, ŝi diris, ni havas nenion alian por fari ol forsendi la botelpoŝton.

Ŝi iris elfosi la malplenan botelon el la sako. Paperon kaj kranjonon ŝi ankaŭ sukcesis aperigi. Ŝi metis ĉion sur ŝtonon antaŭ Tomi.

—Vi skribu, kiu pli majstras la skribarton.

—Jes, sed kio estu? Tomi demandis.

—Lasu min pripensi, Pipi diris. Vi povas skribi ĉi tiel: "Helpu nin antaŭ ol ni pereos! Sen flartabako dum du tagoj ni konsumiĝas sur ĉi tiu insulo."

—Ne, sed Pipi, tiel ni ja ne povas skribi, Tomi diris riproĉe. Ja ne estas vere.

—Kio, Pipi diris.

—Ni ne povas skribi "sen flartabako", Tomi diris.

—Ĉu ne, Pipi diris. Ĉu vi havas flartabakon?

—Ne, Tomi diris.

—Ĉu Anjo havas flartabakon?

—Ne, kompreneble ne, sed...

—Ĉu mi havas flartabakon, Pipi demandis.

—Ne, povas esti, Tomi diris. Sed ni ja ne uzas flartabakon.

—Jes, ĝuste tion mi volas, ke vi skribu: "Sen flartabako dum du tagoj..."

—Jes, sed se ni skribas tiel, homoj kredos, ke ni uzas flartabakon, mi estas certa pri tio, Tomi obstinis.

—Aŭskultu, Tomi, Pipi diris. Respondu al mi pri ĉi tio! Kiuj homoj plej ofte estas sen flartabako, ĉu tiuj, kiuj uzas ĝin, aŭ tiuj, kiuj ne uzas ĝin?

—Tiuj, kiuj ne uzas ĝin, kompreneble, Tomi diris.

—Nu, kial vi do insistas, Pipi diris. Skribu, kiel mi diras!



Kaj Tomi skribis: "Helpu nin antaŭ ol ni pereos! Sen flar-tabako dum du tagoj ni konsumiĝas sur ĉi tiu insulo."

Pipi prenis la paperon, metis ĝin en la botelon, enmetis korkon kaj ĵetis la botelon en la akvon.

—Nun ni baldaŭ devos havi niajn savantojn ĉi tie, ŝi diris.

La botelo forfluis kaj baldaŭ ĝi trankvile ekkuŝis apud kelkaj alnoradikoj ĉe la bordo.

—Ni devas ĵeti ĝin pli longen, Tomi diris.

—Tio ja estas la plej stulta ago, kiun ni povus fari, Pipi diris. Ĉar se ĝi forfloras longen for, niaj savantoj ne scios, kie ili serĉu nin, sed se ĝi kuŝas ĉi tie, ni povos krei al ili, kiam ili trovis ĝin, kaj tiam ni tuj estos savitaj.

Pipi sidiĝis ĉe la bordo.

—Ni prefere rigardu la botelon la tutan tempon, ŝi diris. Tomi kaj Anjo sidiĝis apud ŝi. Post dek minutoj Pipi diris senpacience:

—La homoj verŝajne ne kredas, ke ni havas ion alian por fari ol sidi kaj atendi, ke ni estu savitaj. Kie ili fakte estas?

—Kiuĵ, Anjo demandis.

—Tiuĵ, kiuj savos nin, Pipi diris. Tiu senzorgeco estas fakte terura, se ni pripensas, ke temas pri homaj vivoj.

Anjo komencis kredi, ke ili konsumiĝas sur la insulo. Sed subite Pipi metis montrofingron en la aeron kaj kriis:

—Je la ĉiama kruco, kiel distrita mi estas! Kiel mi povis forgesi tion?

—Kion, Tomi demandis.

—La boato, Pipi diris. Mi ja portis ĝin sur la bordon hieraŭ vespere, kiam vi ekdormis!

—Sed kial vi tion faris? Anjo demandis riproĉe.

—Mi timis, ke ĝi estos malseka, Pipi diris.


Rapide ŝi reportis la boaton, kiu kuŝis bone kaŝita sub pieceo. Ŝi ĵetis ĝin en la lagon kaj severe diris:

—Jen, nun ili povas veni! Ĉar kiam ili nun venos por savi nin, ili savos nin vane. Ĉar nun ni savos nin mem, kaj tion ili meritas. Tio instruos al ili iom rapidi venontfoje.

—Mi esperas, ke ni venos hejmen antaŭ la gepatroj, Anjo diris, kiam ili sidis en la boato kaj Pipi per fortaj batoj remis al la bordo. Ĉar, ho, kiel maltrankvila panjo estos, alimaniere!

—Tion mi ne kredas, Pipi diris.

Sed gesinjoroj Settergren atingis la hejmon duonhoron antaŭ la infanoj. Neniu Tomi kaj Anjo estis videblaj. Sed en la leterkesto kuŝis papereto, kaj sur ĝi estis skribite:

NE KREDU CERTE KE VIAJ  
 INFANOJ ~~ESTAS~~ MALA-  
 PERIS Aŭ MORTIS. NE!!!  
 ILI ESTAS NUR IOM<sup>EL</sup>  
 SKIPROMDIGINTAJ KAJ.  
 BALDAŭ ILI VEROS  
 HEJMEN. TION MI  
~~Ĝ~~ JURAS.  
 SALUTOJN  XIPPI.

## Pipi ricevas noblan viziton

**S**omeran vesperon Pipi, Tomi kaj Anjo sidis sur la verando de Pipi kaj manĝis fragojn, kiujn ili kolektis la saman tagon antaŭtagmeze. Estis milda vespero kun birda pepado kaj florodoro kaj — jes, la fragoj. Ĉio estis tre paca. La infanoj manĝis kaj preskaŭ ne parolis. Tomi kaj Anjo sidis pensante pri tio, ke estas somero, kaj kiel bone estas, ke la lernejo dumlonge ne komenciĝos. Kion Pipi pensis, oni ne facile povas scii.

—Pipi, nun vi loĝis ĉi tie en Vilao Vilaltao tutan jaron, Anjo subite diris kaj premis la brakon de Pipi.

—Jes, la tempo iras, kaj oni komencas maljuniĝi, Pipi diris. Aŭtune mi estos dekjara, kaj tiam oni jam travivis siajn plej bonajn tagojn.

—Ĉu vi kredas, ke vi ĉiam loĝos ĉi tie, Tomi demandis. Mi volas diri, ĝis vi estos tiel granda, ke vi povos fariĝi marrabisto.

—Neniu scias, Pipi diris. Ĉar mi ja pensas, ke mia patro ne restos sur tiu negra insulo por ĉiam. Tuj, kiam li havos novan ŝipon preta, li certe venos por kunpreni min.

Tomi kaj Anjo ĝemis. Subite Pipi sidante rektigis sin sur la ŝtuparo.

—Vidu, tie cetere li venas, ŝi diris kaj fingromontris al la barilpordo. Ŝi faris la ĝardenvojon per tri saltoj. Tomi kaj Anjo

hezite sekvis por vidi ŝin ĵeti sin al la kolo de tre dika viro kun ruĝaj tonditaj lipharoj kaj blua marista pantalono.

—Paĉjo Efraimo, Pipi kriis kaj svingis tre vigle per la kruroj, dum ŝi pendis de lia kolo, ke ŝiaj grandaj ŝuoj defalis. Paĉjo Efraimo, kiom vi kreskis!

—Pipilota Viktualja Rulkurtena Krispmenta Efraimidino Ŝtrumpolonga, mia amata infano! Mi estis ĝuste dironta, ke vi kreskis.

—Tion mi komprenis, Pipi diris. Tial mi ĝin diris unue, ha-ha!

—Mia ido, ĉu vi estas same forta kiel antaŭe?

—Pli forta, Pipi diris. Ĉu ni fleksu brakon?

—Mi faros tion volonte, diris paĉjo Efraimo.

Estis tablo en la ĝardeno, kaj tie Pipi kaj ŝia patro sidiĝis por fleksi brakon, dum Tomi kaj Anjo rigardis. Nur estis unu en la mondo, kiu estis same forta kiel Pipi, kaj tio estis ŝia patro. Tie ili nun sidis kaj streĉis ĉiujn fortojn, sed neniu sukcesis fleksi la alian. Fine tamen la brako de kapitano Ŝtrumpolonga iomete tremis, kaj Pipi diris:

—Kiam mi estos dekjara, mi venkos vin, paĉjo Efraimo.

Tion ankaŭ patro Efraimo kredis.

—Sed kara mia, Pipi diris, mi ja forgesas prezenti. Jen estas Tomi kaj Anjo, kaj ĉi tio estas mia patro, la kapitano kaj Lia Moŝto Efraimo Ŝtrumpolonga, jes, ĉar vi ja estas reĝo de negroj, paĉjo?

—Ekzakte tiel, diris kapitano Ŝtrumpolonga. Mi estas reĝo super la kurekuredutnegroj sur insulo nomata Kurekuredutinsulo. Mi flosis alborde tie, post kiam mi estis blovita en la maron, vi memoras.

—Jes, mi povis ĝuste kredi tion, Pipi diris. Mi sciis la tutan tempon, ke vi ne dronis.

—Dronis, ho ne! Estas same neeble por mi subiĝi kiel por kamelo meti fadenon en kudrilon. Mi flosas sur la lardo.

Tomi kaj Anjo mire rigardis kapitanon Ŝtrumpolongan.

—Kial vi ne havas vestaĵojn de negroreĝo, onklo, Tomi demandis.

—Ilin mi havas ĉi tie en la valizo, kapitano Ŝtrumpolonga diris.

—Surmetu, surmetu ilin, Pipi kriis. Mi volas vidi mian patron en reĝa vesto.

Kaj ĉiuj eniris la kuirejon. Kapitano Ŝtrumpolonga malaperis en la dormoĉambron de Pipi kaj la infanoj sidiĝis sur la lignujon atendente.

—Estas same kiel en teatro, Anjo diris revante.

Kaj jen — pam — la pordo malfermiĝis kaj tie staris la negroreĝo. Li havis bastan jupon ĉirkaŭ la talio, sur la kapo estis krono el oro, ĉirkaŭ la kolo pendis kolĉenoj en longaj vicoj, en unu mano li havis lancon kaj en la alia ŝildon. Sed tio ankaŭ estis la tuto, jes, sub la bastjupo montris sin paro da vilaj kruroj ornamitaj per oraj ringoj ĉe la maleoloj.

—Usamkursor musor filibusor, kapitano Ŝtrumpolonga diris kaj minace sulkigis la brovojn.

—Ho, li parolas negran lingvon, Tomi ravite diris. Kion tio signifas, onklo Efraimo?

—Signifas: "Tremu, miaj malamikoj!"

—Aŭskultu, paĉjo Efraimo, Pipi diris, ĉu la negroj ne estis surprizitaj, kiam vi alflosis al ilia insulo?

—Jes, terure surprizitaj, diris kapitano Ŝtrumpolonga. Unue ili intencis formanĝi min, sed kiam mi deŝiris palmon

per nuraj manoj, ili sobriĝis kaj faris min reĝo. Poste mi regis antaŭtagmeze kaj konstruis mian ŝipon posttagmeze. Daŭris longe por fari ĝin preta, kiam mi devis fari ĉion tute sola. Estis kompreneble nur malgranda velboato. Kiam ĝi estis preta, mi diris al la negroj, ke mi devas lasi ilin dum mallonga tempo, sed ke mi baldaŭ revenos kaj tiam kunportos principon nomata Pipilota. Kaj tiam ili batis siajn ŝildojn kaj kriis: "Usompluser, usompluser!"

—Kion signifas tio, Anjo diris.

—Ĝi signifas: "Brave, brave!" Poste mi tre forte regis dum dek kvar tagoj, por ke tio sufiĉu por la tuta tempo de mia foresto. Kaj poste mi hisis velojn kaj ekiris al la maro, kaj la negroj kriis: "Usamkura busamkura!" kaj tio signifas: "Bonan revenon, dika blanka ĉefo!" Poste mi fiksas la direktilon rekte al Surabajo. Kaj kion vi imagas, ke mi vidis unue, kiam mi saltis teren tie? Jes, mian malnovan honestan skunon "Hopenosa"! Kaj mian malnovan honestan Fridolfon, kiu staris ĉe la randrelo kaj mansvingis per ĉiuj fortoj. "Fridolfo", mi diris, "nun mi reprenos la regadon surŝipe". "Aj, aj, kapitano", li diris. Kaj mi faris. La tuta malnova ŝipanaro restas, kaj nun "Hopenosa" kuŝas en la haveno ĉi tie, kaj vi devas iri saluti ĉiujn viajn malnovajn amikojn, Pipi.

Kaj tiam Pipi tiel ekĝojis, ke ŝi starigis sin sur la kapo sur la kuireja tablo kaj baraktis per la piedoj. Sed Tomi kaj Anjo ne povis helpi, ke ili sentis sin iom malĝojaj. Estis, kiel se iu estus forprenanta Pipin de ili, ili pensis.

—Nun ni festu, Pipi kriis, kiam ŝi denove staris surpiede. Nun ni festu, tiel ke krakos en tuta Vilao Vilaltao. Kaj ŝi aranĝis abundan vespermanĝon sur la kuireja tablo kaj ĉiuj altablĝis kaj manĝis. Pipi enbuŝigis tri malmole kuiritajn ovojn

kun ŝeloj. Jen kaj jen ŝi mordis la orelon de sia patro, nur ĉar ŝi tre ĝojis vidi lin. Sinjoro Nilson, kiu estis dorminta, subite salte aperis kaj frotis la okulojn pro surprizo, kiam li ekvidis kapitanon Ŝtrumpolonga.

—Sed vidu, ĉu vi daŭre havas Sinjoron Nilson, diris kapitano Ŝtrumpolonga.

—Jes, kompreneble, kaj mi havas pliajn dombestojn, kreu min, Pipi diris kaj iris por alkonduki la ĉevalon, kiu ricevis malmole kuiritan ovon, kiun ĝi ankaŭ maĉu.

Kapitano Ŝtrumpolonga estis tre kontenta, ke lia filino tiel agrable aranĝis por si en Vilao Vilaltao, kaj li ĝojis, ke ŝi havas sian valizon kun oraj moneroj, tiel ke ŝi ne bezonis suferi, dum li forestis.

Kiam ĉiuj estis sataj, kapitano Ŝtrumpolonga elprenis el sia valizo sorĉan tamburon, kian la negroj kutimas havi por tamburi la takton, kiam ili havas siajn dancojn kaj oferfestojn. Kaj kapitano Ŝtrumpolonga sidiĝis sur la plankon kaj tamburis. Sonis obtuze kaj strange kaj malsimile al ĉio, kion Tomi kaj Anjo aŭdis.

—Negre, Tomi diris klarige al Anjo.

Kaj Pipi deprenis siajn grandajn ŝuojn kaj dancis en la ŝtrumpoj dancon, kiu ankaŭ estis stranga. Fine reĝo Efraimo dancis sovaĝan militdancon, kiun li lernis sur la Kurekureduta insulo. Li svingis sian lancon kaj sovaĝe gestis per la ŝildo, kaj liaj nudaj piedoj tretis tiel forte, ke Pipi kriis:

—Atentu, ke la kuireja planko ne rompiĝu!

—Ne gravas, diris kapitano Ŝtrumpolonga kaj plue cirkulis. Ĉar nun vi iĝos negra princino, filino de mia koro!

Kaj tiam Pipi eksaltis kaj dancis kun sia patro. Ili figuris unu kontraŭ la alia kaj blekis kaj kriis, kaj jen kaj jen faris

altajn saltojn, tiel ke Tomi kaj Anjo konfuziĝis en la kapo pro la rigardado. Sinjoro Nilsson ankaŭ fariĝis tia, ĉar li sidis kovrante la okulojn la tutan tempon.

Iom post iom la danco transiris al luktado inter Pipi kaj ŝia patro. Kapitano Ŝtrumpolonga ĵetis sian filinon, tiel ke ŝi venis sur la ĉapelobregon. Sed tie ŝi ne estis sidanta longe. Blekante ŝi faris saltegon trans la kuirejo rekte sur paĉjon Efraimon, kaj la sekundon poste ŝi estis ĵetinta lin, tiel ke li flugis kiel meteoro kun la kapo antaŭe rekte en la lignujon. Li ne povis leviĝi mem, parte ĉar li estis tro dika kaj parte ĉar li ridegis. Tondris kiel fulmotondro en la lignujo. Pipi ekprenis liajn piedojn por eltiri lin, sed tiam li tiel ridis, ke li preskaŭ sufokiĝis. Li estis nome tre tikliĝema.

—Ne ti-ti-ti-tiklu min, li ĝemis. Ĵetu min en la lagon aŭ tra la fenestro, sed ne ti-ti-tiklu min sub la piedoj.

Li tiel ridis, ke Tomi kaj Anjo kredis, ke la lignujo krevos. Fine li sukcesis artifiĉi sin el la ujo, kaj tuj kiam li staris sur la piedoj, li kuris al Pipi kaj ĵetis ŝin sengarde trans la kuirejon. Ŝi alvenis kun la vizaĝo antaŭe sur la fornon, kiu estis plena je fulgo.

—Haha, jen ekzakte negroprincino. Pipi kriis ravite kaj turnis sian karbonigran vizaĝon al Tomi kaj Anjo. Poste ŝi eligis novan krion kaj sin ĵetis sur sian paĉjon. Kaj ŝi batis lin, tiel ke krakis la bastojupo kaj la basto disflugis tra la tuta kuirejo. La ora krono defalis kaj falis sub la tablon. Fine Pipi sukcesis renversi sian paĉjon sur la plankon, ŝi eksidis sur li kaj diris:

—Ĉu vi deklaras vin venkita?

—Jes, mi estas venkita, diris kapitano Ŝtrumpolonga. Kaj



ambaŭ ridis, tiel ke larmoj fluis, kaj Pipi mordetis la nazon de sia patro, kaj li diris:

—Tiel amuze ne estis, depost kiam ni balais la maristan trinkejon en Singaporo!

Li rampis sub la tablon kaj prenis sian kronon.

—Jes, ĉi tion la kurekuredutoj vidu, li diris. Ke la reĝaj insignoj kuŝas sub la kuireja tablo en Vilao Vilaltao.

Li surmetis la kronon kaj kombis la bastjupon, kiu aspektis iom maldensa.

—Ĝin vi certe devos sendi al arta flikado, Pipi diris.

—Jes, sed indas fari tion, diris kapitano Ŝtrumpolonga.

Li eksidis sur la planko kaj viŝis la ŝviton de sia frunto.

—Nu, Pipi, mia infano, li diris, ĉu vi iom mensogas nuntempe?

—Ho jes, kiam mi havas tempon, sed mi ne ofte havas, Pipi diris senpretende. Kiel estas cetere pri vi? Ankaŭ vi ne estis malspertulo pri mensogado.

—Nu, mi kutimas mensogi iom al la negroj sabatvespere, se ili kondukis bone dum la semajno. Ni kutimas havi malgrandan mensog- kaj kantvesperon, akompanatan de tamburado kaj torĉodanco. Ju pli terure mi mensogas, des pli ili batas la tamburon.

—Ĉu vere, Pipi diris. Por mi ja neniu tamburadas. Mi iras ĉi tie en mia soleco kaj mensogas al mi mem tiel penege, ke oni ĝojas aŭdi, sed neniu eĉ blovas kombilon pro tia afero. Iun vesperon, kiam mi estis irinta en liton, mi mensoge verkis longan rakonton pri bovido, kiu povis plekti punktojn kaj surgrimpi arbon, kaj imagu, mi kredis ĉiun vorton! Tion mi nomas mensogo! Sed tamburi, ho ne, tion neniu faras!

—Nu, do mi faros, diris kapitano Ŝtrumpolonga. Kaj li batis

grandan ruladon sur tamburo por sia filino, kaj Pipi sidis sur liaj genuoj kaj metis sian fulgan vizaĝon kontraŭ lian vangon, tiel ke li fariĝis same nigra kiel ŝi.

Anjo staris pensanta pri unu afero. Ŝi ne sciis, ĉu estas konvene diri tion, sed ŝi ne povis ne fari.

—Estas malbone mensogi, ŝi diris. Tion diras panjo.

—Ho, kiel stulta vi estas, Anjo, Tomi diris. Pipi ne vere mensogas, ŝi nur ŝajnigas mensogi, ŝi inventas, ĉu vi ne komprenas tion, stultulino!

Pipi pripense rigardis Tomin.

—Foje vi parolas tiel saĝe, ke mi trovas, ke estos io granda el vi.

Estis vespero. Tomi kaj Anjo devis iri hejmen. Estis okazo plena tago, kaj estis amuze vidi veran vivantan negroreĝon. Kaj certe estis agrable por Pipi, ke ŝi ricevis hejmen sian patron. Sed tamen! Tamen!

Kiam Tomi kaj Anjo estis irintaj en la liton, ili ne kuŝis parolante kiel kutime. Estis tute silente en la infanĉambro. Subite oni aŭdis ekĝemon. Estis Tomi, kiu ekĝemis. Post momento oni aŭdis ankoraŭ ĝemon. Tiun fojon estis Anjo.

—Kial vi kuŝas ĝemante, Tomi diris incitiĝeme.

Sed li ne ricevis respondon. Ĉar Anjo kuŝis en la lito kaj ploris.

## Pipi donas adiaŭan festenon

**K**iam Tomi kaj Anjo la postan matenon eniris tra la kuireja pordo de Vilao Vilaltao, la tuta domo resonis de plej teruraj ronkadoj. Kapitano Ŝtrumpolonga ankoraŭ ne vekigis. Sed Pipi staris sur la kuireja planko kaj faris matenan gimnastikon. Ŝi ĵus faris la dekkvinan saltomortalon, kiam Tomi kaj Anjo venis kaj interrompis ŝin.

—Jes ja, nun oni havas sian estontecon sekura, Pipi diris. Duonan jaron mi estos negroprincino, kaj duonan jaron mi veliros ĉirkaŭ la mondo sur "Hopetosa". Paĉjo kredas, ke se li efike regas super la kurekuredutoj dum duona jaro, ili povas vivi sen reĝo dum duona jaro. Ĉar, vi komprenas, maljuna "marurso" devas senti ferdekon sub siaj piedoj jen kaj jen. Kaj li ankaŭ devas pensi pri mia edukado. Se mi iam fariĝu vere bona marrabisto, ne taŭgas ke mi nur vivu kortegan vivon. El tio oni nur malhardiĝas, diras paĉjo.

—Ĉu vi neniam estos en Vilao Vilaltao, Tomi demandis per hezitema voĉo.

—Jes, kiam mi pensiiĝis, diris Pipi. Post ĉirkaŭ kvindek sesdek jaroj. Tiam ni ludos kaj amuziĝos, ĉu ne?

Nek Tomi nek Ajno povis trovi multan konsolon el tio.

—Nur imagu — negroprincino, Pipi diris reve. Ne multaj infanoj fariĝas tio. Ho, mi estos tre bela! Mi havos ringojn en ĉiuj oreloj kaj pli grandan ringon en la nazo.

—Kion vi cetere surhavas, Anjo demandis.

—Nenion plian, Pipi diris. Neniam ion ajn plian! Sed mi havos propran negron, kiu poluros min per ŝuŝmiraĵo tra la tuta korpo ĉiun matenon. Por ke mi estu same nigra kiel la aliaj kurekuredutoj. Mi nur elmetos min por brozado vespre samtempe kun la ŝuoj.

Tomi kaj Anjo povis imagi, kiel Pipi aspektos.

—Ĉu vi kredas, ke nigro belos apud viaj ruĝaj haroj, Anjo hezite demandis.

—Ni vidos, Pipi diris. Aliel estos simpla tasko farbi la harojn verdaj. Ŝi reve suspiris. La princino Pipilota! Kia vivo! Kia gloro! Kaj kiom mi dancos. Pipilota dancas en la brilo de la tendara fajro kaj je la tondro de la tamburoj. Imagu, kiel la nazringo tintos tiam sur mi!

—Ki-kiam vi vojaĝos, Tomi demandis. La voĉo estis iom rusta.

—”Hopetosa” levos la ankrojn morgaŭ, Pipi diris.

Ĉiuj tri infanoj staris silentaj longan tempon. Ŝajnis, ke nenio pli estas dirinda. Fine Pipi tamen faris novan saltomortalon kaj diris:

—Sed ĉivespere ni faros ĉi tie en Vilao Vilaltao adiaŭan festenon. Adiaŭan festenon, mi ne diros pli! Ĉiuj, kiuj volas veni por diri adiaŭ al mi, estas bonvenaj.

Tio disvastiĝis kiel fulmofajro tra la eteta urbo.

—Pipi Ŝtrumpolonga forvojaĝos el la urbo. Ŝi donos adiaŭan festenon ĉivespere en Vilao Vilaltao. Kiu volas, rajtas iri tien!

Multaj volis. Pli precize tridek kvar infanoj. Tomi kaj Anjo havigis permeson de sia patrino, ke ili rajtos esti vekaj, kiom

longe ili volos tiun vespere. Kaj ilia patrino komprenis, ke tio estas tute necesa.

Tomi kaj Anjo neniam forgesos la vesperon, kiam Pipi havis sian adiaŭan festenon. Estis mirinde varma kaj bela somera vespero, kiam oni vere diras al si mem:

—Tiel estas, kiam estas somero!

Ĉiuj rozoj en la ĝardeno de Pipi ardis kaj odoris en la krepusko. Susuris mistere en la maljunaj arboj. Ĉio estus mirinda, se ne — se ne! Tomi kaj Anjo ne volis pensi la penson ĝis la fino.

Ĉiuj infanoj de la urbo kunhavis siajn argilajn okarinojn, kaj ili gaje blovis ilin, kiam ili marŝis laŭ la ĝardena pordo de Vilao Vilaltao. Tomi kaj Anjo iris ĉe la komenco. Ĝuste kiam ili atingis la verandan ŝtuparon, la pordo estis malfermita kaj Pipi staris sur la sojlo. La okuloj brilis en ŝia lentugoplena vizaĝo.

—Bonvenon al mia simpla loĝejo, ŝi diris kaj etendis la brakojn. Anjo zorge rigardis ŝin, por ke ŝi bone memoru, kiel Pipi aspektas. Neniam, neniam ŝi forgesos ŝin, kiel ŝi staris tie kun la ruĝaj harplektaĵoj kaj la lentugoj kaj la gaja rideto kaj la grandaj nigraj ŝuoj.

Je distanco oni aŭdis la tamtamon sur tamburo. Kapitano Ŝtrumpolonga sidis en la kuirejo kun la negra tamburo inter la genuoj. Li surhavis ankaŭ hodiaŭ siajn negroreĝajn vestojn. Pipi aparte petis lin pri tio. Ŝi ja komprenis, ke la infanoj volas vidi veran vivantan negroreĝon.

La tuta kuirejo fariĝis tute plena je infanoj, kiuj staris ĉirkaŭ reĝo Efraimo kaj rigardis lin. Kaj Anjo pensis, ke estas bonŝanco, ke ne pli multaj venis, ĉar tiam ili ne trovus lokon. Ĝuste tiam oni aŭdis tirharmonikan muzikon el la ĝardeno.

Kaj tie venis la tuta ŝipanaro de "Hopetosa" kun Fridolfo ĉe la kapo. Estis li, kiu ludis la tirharmonikon. Pipi estis estinta en la haveno la saman tagon por saluti siajn amikojn kaj petis ilin partopreni la adiaŭan festenon. Nun ŝi kuris al Fridolfo kaj premis lin, ĝis lia vizaĝo bluiĝis. Tiam ŝi lasis lin kaj kriis: —Muzikon! Muzikon!

Kaj tiam Fridolfo ludis per sia tirharmoniko, reĝo Efraimo batis sian tamburon, kaj ĉiuj infanoj blovis per siaj okarinoj.

La kovrilo de la lignujo estis fermita kaj sur ĝi staris longaj vicoj da limonadboteloj. Sur la granda kuireja tablo staris dek kvin kremtortoj kaj sur la kuirforno giganta kaserolo plena je kolbasoj.

Reĝo Efraimo komencis per tio, ke li kaptis por si ok kolbasojn. Ĉiuj aliaj sekvis lian ekzemplon kaj baldaŭ oni aŭdis nenion alian ol la maĉosonon aŭdeblan, kiam oni manĝas kolbason. Poste ĉiu rajtis preni laŭvole multe da kremtorto kaj limonado. Estis iom preme en la kuirejo, kaj la societo disvastiĝis sur la verandon kaj en la ĝardenon, tiel ke blanke brilis la kremtorto ĉie en la krepusko.

Kiam ĉiuj estis tute sataj, Tomi proponis, ke ili malsuprenskuu la kolbason kaj kremtorton per ia ludado. "Sekvu Johanon", ekzemple. Pipi ne sciis, kiel oni ludas tiun ludon, se Tomi klarigis al ŝi, ke unu estas "Johano" kaj ĉiuj aliaj devas imiti ĉion, kion Johano faras.

—Bone, Pipi diris. Ne sonas stulte. Kaj prefere mi estu "Johano".

Komence ŝi surgrimpis la tegmenton de la kalandrejo. Unue ili devis grimpi sur la ĝardenan barilon kaj poste ili povis treni sin sur la ventro sur la tegmenton. Pipi kaj Tomi kaj Anjo tion faris plurfoje antaŭe, kaj tial por ili ne estis malfa-

cile. Sed la aliaj infanoj konsideris tion malfacila. La ŝipanoj sur "Hopetosa" kutimiĝis al grimpadado sur la mastoj, kaj tiel ili facile sukcesis. Sed por kapitano Ŝtrumpolonga tio estis pli peniga, ĉar li estis tiel dika. Kaj li kaptiĝis en la basta jupo. Li peze spiregis, kiam li levis sin sur la tegmenton.

—Ĉi tiu basta jupo neniam fariĝos, kio ĝi estis, li malgaje diris.

De la kalandreja tegmento Pipi saltis sur la teron. Iuj el la plej malgrandaj infanoj kompreneble ne kuraĝis fari tion, sed Fridolfo estis tre afabla. Li malsuprenlevis ĉiujn, kiuj ne kuraĝis salti. Poste Pipi sesfoje rulfalis sur la herbejo. Ĉiuj faris same, sed kapitano Ŝtrumpolonga diris:

—Iu devas puŝi min de malantaŭe. Aliel mi neniam sukcesos.

Pipi faris tion. Ŝi puŝis tiel fervore, ke kiam li fine startis, li ne povis fini, sed rulis kiel pilko trans la herbejo kaj dekkvarfoje rulfalis anstataŭ sesfoje.

Poste Pipi enkuris Vilaon Vilaltaon, suprenrapidis la verandan ŝtuparon, grimpis tra fenestro kaj farinte sin tre vastkrura grimpis al ŝtupetaro, kiu staris ekstere. Rapide ŝi suprenkuris la ŝtupetaron, saltis sur la tegmenton de Vilao Vilaltao, kuris laŭ la tegmenta dorso, saltis sur la fumtubon, ekstaris sur unu kruro kaj kokerikis, ĵetis sin kapantaŭe sur arbon, kiu staris ĉe la gablo, glitis sur la teron, kuris en la lignejon, prenis hakilon kaj forhakis tabulon en la vando, grimpis al la mallarĝa fendo, saltis sur la ĝardenan barilon, ekvilibre iris sur la barilo kvindek metrojn, grimpis sur kverkon kaj ekisidis por ripozi sur la plej alta parto de la kverko.

Relative multaj homoj kolektiĝis sur la vojo ekster Vilao Vilaltao, kaj poste ili iris hejmen kaj rakontis, ke ili vidis neg-

roreĝon, kiu staris sur unu piedo sur la fumtubo de Vilao Vialtao kriante "kokeriko", tiel ke estis aŭdeble vaste ĉirkaŭe. Sed neniu kredis, ke tio estas vera.

Kiam kapitano Ŝtrumpolonga volis premi sin tra la malvastata truo en la ligneja vando, okazis kiel devis okazi — li fiksiĝis kaj povis veni nek antaŭen nek malantaŭen. Tial oni finis la ludon, kaj ĉiuj infanoj kolektiĝis por rigardi, kiam Fridolfo elsegis kapitanon Ŝtrumpolongan el la vando.

—Ĉi tio estis vere amuza ludo, kapitano Ŝtrumpolonga diris kontente, kiam li liberiĝis. Sed kion ni nun eltrovu?

—En pasintaj tempoj, Fridolfo diris, la kapitano kaj Pipi kutimis konkuri por vidi, kiu estas plej forta. Estis tre amuze rigardi.

—Ne stulta ideo, kapitano Ŝtrumpolonga diris. Sed plej malbone estas, ke mia filino iom post iom fariĝas pli forta ol mi.

Tomi staris tuj apud Pipi.

—Pipi, li flustris, mi tiel timis, ke vi grimpos en nian kaŝejon en la kverko, kiam ni ludis "sekvu Johanon". Ĉar mi ne volas, ke iu alia sciu pri ĝi. Eĉ se mi neniam plu iros tien.

—Ne, tio estas nia propra sekreto, Pipi diris.

Ŝia patro estis preninta feran levstangon. Li fleksis ĝin, kiel se ĝi estus el vakso. Pipi prenis alian ferstangon kaj faris same.

—Ne, vi sciu, ŝi diris. Per ĉi tiaj simplaj artifiko mi kutimis amuzi min, kiam mi kuŝis en la lulilo. Nur por pasigi la tempon. Tiam kapitano Ŝtrumpolonga delevis la kuirejan pordon. Fridolfo kaj sep aliaj maristoj stariĝis sur la pordo, kaj kapitano Ŝtrumpolonga levis ilin ĉiujn alten en la aeron kaj portis ilin ĉirkaŭ la herbejo dekfoje.

Nun jam fariĝis tute mallume kaj Pipi ekbruligis tie kaj alie



torĉojn, kiuj lumis tre bele kaj ĵetis ravan brilon sur la ĝardenon.

—Ĉu vi estas preta, ŝi diris al sia patro post la deka rondiro. Li estis. Tiam Pipi metis la ĉevalon sur la kuirejan pordon kaj sur la ĉevalan dorson ŝi metis Fridolfon kaj tri aliajn maristojn, kaj ĉiuj kvar havis po du infanojn en la brakoj. Fridolfo tenis Tomin kaj Anjon. Poste Pipi levis la kuirejan pordon kaj portis ilin ĉirkaŭ la herbejon dudek kvin foje, kaj aspektis tre elegante en la torĉa lumo.

—Certe, ido, vi estas pli forta ol mi, kapitano Ŝtrumpolonga diris.

Poste ĉiuj sidiĝis sur la herbejo. Fridolfo ludis sian tirharmonikon kaj ĉiuj aliaj maristoj kantis la plej belajn maristajn kantojn. La infanoj dancis je la muziko. Pipi prenis du torĉojn en la manoj kaj dancis pli furioze ol iu alia.

Kaj la festo finiĝis per piroteknikaĵo. Pipi bruligis raketojn kaj sunojn, tiel ke la tuta ĉielo krakis. Anjo sidis sur la verando kaj rigardis. Ĉio estis tiel bela. Tiel ĉarma. Ŝi ne povis vidi la rozojn, sed ŝi sentis, kiel ili odoras en la mallumo. Kiel bela ĉio estus, se ne ... se ne. Ŝi sentis, kiel se malvarma mano premus ŝian koron. Morgaŭ, kiel estos tiam? Kaj la tutan somerferion? Kaj por ĉiam? Tiam ne plu estos iu Pipi en Vilao Vilaltao. Tiam ne estos iu Sinjoro Nilson, kaj neniu ĉevalo staros sur la verando. Neniuj rajdveturoj plu, neniuj ekskursoj kun Pipi, neniuj agrablaj vesperaj momentoj en la kuirejo de Vilao Vilaltao, neniuj arbo, en kiu kreskas limonado, jes, la arbo ja restas, sed Anjo havis fortan senton, ke limonado ne kreskos, kiam Pipi forestos. Kion Tomi kaj ŝi faru morgaŭ? Verŝajne ludos kroketon. Anjo ĝemis.

La festeno estis finita. Ĉiuj infanoj dankis kaj adiaŭis. Ka-

pitano Ŝtrumpolonga akompanis siajn maristojn reen al "Hopetosa". Li opiniis, ke ankaŭ Pipi povus kunveni. Sed Pipi diris, ke ŝi volas dormi ankoraŭ unu nokton en Vilao Vilaltao.

—Morgaŭ je la deka ni levos la ankron, memoru tion, kapitano Ŝtrumpolonga kriis, kiam li foriris.

Jes, jen restis nur Pipi kaj Tomi kaj Anjo. Ili sidis sur la veranda ŝtuparo en la mallumo tute silente.

—Vi povas ja tamen veni ludi ĉi tien, Pipi fine diris. La ŝlosilo pendas sur najlo apud la pordo. Vi povos preni ĉion, kio estas en la komodaj skatoletoj. Kaj se mi metas ŝtupetaron en la kverkon, vi povas mem malsupren grimpi tie. Sed eble ne kreskos tiom da limonado. Ne estas tia sezono nun.

—Ne, Pipi, Tomi diris serioze, ni ne iros ĉi tien plu.

—Ne, neniam, neniam, Anjo diris. Kaj ŝi pensis, ke poste ŝi fermos la okulojn ĉiun fojon, kiam ŝi devos iri preter Vilao Vilaltao.

Vilao Vilaltao sen Pipi — Anjo denove sentis tiun malvarman manon ĉirkaŭ la koro.

## Pipi surŝipigas

Pipi zorge ŝlosis la pordon de Vilao Vilaltao. La ŝlosilon ŝi pendigis sur najlon tute apude. Poste ŝi levis la ĉevalon de la verando, por la lasta fojo ŝi levis ĝin de la verando! Sinjoro Nilson jam sidis sur ŝia ŝultro kaj aspektis grava. Li certe sciis, ke io rimarkinda okazas.

—Jes ja, nun ne estas io plia, Pipi diris.

Tomi kaj Anjo kapjesis. Ne, ne estas io plia.

—Ankoraŭ ne estas tre malfrua horo, Pipi diris. Ni iru piede, tio daŭras pli longe.

Tomi kaj Anjo denove kapjesis, sed ili diris nenion. Kaj ili komencis sian migradon al la urbo. Al la haveno. Al "Hoptosa". La ĉevalo rajtis posttroteti laŭvole.

Pipi ĵetis rigardon trans la ŝultro al Vilao Vilaltao.

—Agrabla kabano, tiu, ŝi diris. Senpula kaj bona ĉiamaniere. Kaj tio estas pli ol oni povas diri pri la negra argila kabano, kie mi loĝos estonte.

Tomi kaj Anjo diris nenion.

—Se estos terure multe da puloj en mia negra argila kabano, mi dresos ilin kaj tenos ilin en cigara skatolo kaj ludos "Lasta paro ek!" kun ili vespere. Mi nodos rubandetojn ĉirkaŭ iliaj piedoj. Kaj la du plej fidelajn kaj plej sindonajn pulojn mi nomos "Tomi" kaj "Anjo" kaj ili dormos nokte en mia lito.

Eĉ ne tio povis igi Tomin kaj Anjon pli parolemaj.

—Kio nun estas kun vi, Pipi diris ĉagrenite. Mi diru al vi, ke

estas danĝere ĉirkaŭiri kaj silenti tro longe. La lango velkas, se oni ne uzas ĝin. Iam mi konis kahelforniston en Kalkuto, kiu nur silentis kaj silentis. Sed poste ankaŭ okazis, kel okazis. Iun fojon li volis diri al mi: "Adiaŭ, kara Pipi, feliĉan vojaĝon kaj dankon por ĉi tiu tempo!" Kaj ĉu vi povas diveni, kio rezultis? Unue li faris kelkajn terurajn grimacojn, ĉar la ĉarniroj de la buŝo fiksrustiĝis, kaj ilin mi devis al li lubriki per kudromaŝina oleo. Kaj poste venis: "U buj uje muj!" Tiam mi rigardis en lian buŝon, kaj imagu. Tie la lango kuŝis kiel velkinta folieto! Kaj kiom ajn longe li vivis, tiu kahelfornisto, neniam li povis diri ion alian ol: "U buj uje muj!" Estus terure, se okazus la samo al vi. Ni aŭdu, ĉu vi povas diri tion pli bone ol la kahelfornisto: "Feliĉan vojaĝon, kara Pipi, kaj dankon por ĉi tiu tempo!" Provu kaj ni vidu!

—Feliĉan vojaĝon, kara Pipi, kaj dankon por ĉi tiu tempo! Tomi kaj Anjo diris obee.

—Do dankon al Dio pro tio, Pipi diris. Vi povas ja timigi min! Se vi estus dirinta "U buj uje muj", mi ne sciis, kion fari.

Jen estis la haveno. Tie kuŝis "Hopetosa". Kapitano Ŝtrumpolonga staris sur la ferdeko kaj elkriis siajn ordonojn. La maristoj kuris tien reen por pretigi ĉion por la ekiro. Sur la kajo ĉiuj homoj de la malgranda urbeto kolektiĝis por mansvingis adiaŭe al Pipi. Kaj jen ŝi nun venis kune kun Tomi kaj Anjo kaj la ĉevalo kaj Sinjoro Nilson.

—Jen venas Pipi Ŝtrumpolonga! Donu lokon al Pipi Ŝtrumpolonga! sonis la krio, kaj la homoj flankeniris por fari vojon al Pipi. Pipi kapklinis kaj salutis dekstren kaj maldekstren. Poste ŝi prenis la ĉevalon kaj portis ĝin trans la pasponteton. La kompatinda besto rigardis suspekteme ĉirkaŭ si, ĉar ĉevaloj ne tre ŝatas ŝipveturojn.

—Nu, tie vi estas, mia amata infano, diris kapitano Ŝtrumpolonga, kaj interrompis sin por ĉirkaŭbrakis Pipin. Li prenis ŝin al sia brusto kaj ili premis unu la alian, tiel ke la ripoj kraakis.

Anjo estis irinta ĉirkaŭe kun bulo en la gorĝo la tutan matenon. Kaj kiam ŝi vidis Pipin levi la ĉevalon surŝipen, la bulo malfiksiĝis. Ŝi komencis plori, dum ŝi staris sin premanta al la pakkesto sur la kajo, unue tute kviete, sed iom post iom pli kaj pli intense.

—Ne kriaĉu, Tomi diris kolere. Vi hontigas nin antaŭ ĉiuj ĉi homoj.

La rezulto de lia admono estis, ke Anjo eksplodis en vera torento da larmoj. Ŝi ploris tiel, ke ŝi tremis. Tomi piedbatis ŝtonon, tiel ke ĝi ruliĝis malsupren sur la kajrando kaj falis en akvon. Efektive li volus ĝin ĵeti sur "Hopetosan". Tiu aĉa ŝipo, kiu forkondukos Pipin de ili! Verdire — se neniu estus vidinta, ankaŭ Tomi havus grandan emon ploreti. Sed tio ja ne decas. Li piedfrapis ankoraŭ unu ŝtonon.

Nun Pipi venis kurante sur la pasponteto. Ŝi kuregis al Tomi kaj Anjo. Ŝi prenis iliajn manojn en siajn.

—Restas dek minutoj, ŝi diris.

Tiam Anjo ĵetis sin sur la pakkeston kaj ploris kvazaŭ la koro rompiĝis. Ne restis pli da ŝtonoj, kiujn Tomi povus piedfrapi. Li kunpremis la dentojn kaj aspektis murdema.

Ĉirkaŭ Pipi kolektiĝis ĉiuj infanoj de la eta urbeto. Ili elprenis siajn argilajn okarinojn kaj blovis adiaŭan melodieton por ŝi. Sonis tute malgaje, ĉar estis tre tre plenda melodieto. Anjo nun tiel ploris, ke ŝi apenaŭ povis stari sur la piedoj. Ĝuste tiam Tomi memoris, ke li estis skribinta adiaŭan poemon je

honoro de Pipi. Kaj li eltiris paperon kaj komencis legi. Estis nur tre terure, ke la voĉo tiel tremas.

—*Adiaŭ, kara Pipi, vi veturos for,  
sed ĉiam ni sopiros por  
amiko en la kor',  
ho bela memor'.*

—Tie vere rimis ĉio, Pipi diris kontente. Ĝin mi lernos parkere kaj legos por la kurekuredutoj, kiam mi vespere sidos ĉirkaŭ la kampara fajro.

El ĉiuj flankoj la infanoj premis sin por adiaŭi. Pipi levis la manon kaj ordonis silenton.

—Infanoj, ŝi diris, post ĉi tio mi nur havos negridetojn kun kiuj ludi. Per kio ni amuzos nin, ne estas facile scii. Eble ni ludos kaptoludon kun sovaĝaj rinoceroj, kaj starigos serpento-dresejon kaj rajdos sur elefantoj kaj havos pendbalancilon en la kokospalmo ekster la domangulo. Iel ni povos pasigi la tempon.

Pipi faris paŭzon. Kaj Tomi kaj Anjo sentis, ke ili abomenas tiujn infanojn, kun kiuj Pipi ludos estonte.

—Sed, Pipi daŭrigis, eble venos tago dum la pluva periodo, teda tago, ĉar eĉ se estas amuze ĉirkaŭkuri sen vestoj, kiam pluvos, oni tamen ne povas fari pli ol malsekigi sin. Kaj kiam ni faris tion tre zorge, eble ni enrampos nian negran argilan kabanon, se ne fariĝis kaĉo el la tuta kabano, kompreneble, ĉar tiam ni povos baki argilajn kukojn. Sed se ne fariĝis kaĉo el ĝi, ni sidiĝos tie interne, la negridoj kaj mi, kaj tiam eble la negridoj diros: "Pipi, rakontu ion!" Kaj tiam mi rakontos al ili pri eteta urbo, kiu situas longe longe for en alia mondoparto, kaj pri la infanetoj, kiuj loĝas tie. "Vi ne povas imagi, kiel ĉarmaj idoj loĝas tie", mi diros al la negridoj. "Ili estas blan-

kaj kiel anĝeletoj sur la tuta korpo, escepte de la piedoj, ili blovas argilajn okarinojn kaj — plej bone el ĉio — ili konas la plutifikon.” Sed tiam eble la malfrandaj nigraj negridoj fariĝos tute senesperaj, ĉar ili ne konas la plutifikon, kaj kion mi tiam faru pri ili? Nu, en plej malbona kazo mi detruos la argilan kabanon kaj faros kaĉon el ĝi kaj mi bakos argilajn kukojn kaj fosos min en la argilon ĝis la kolo. Ja estus strange, se mi ne povus pensigi al ili ion alian ol plutifikon. Dankon, ĉiu el vi! Kaj multan adiaŭon!

Kaj la infanoj blovis per siaj okarinoj ankoraŭ pli melankolian melodion ol antaŭe.

—Pipi, estas tempo surŝipiĝi, kapitano Ŝtrumpolonga kriis.

—Aj aj, kapitano, Pipi diris.

Ŝi turnis sin al Tomi kaj Anjo. Ŝi rigardis ilin.

—Kiel strange ŝiaj okuloj aspektas, Tomi pensis. Ekzakte tiel lia patrino aspektis iun fojon, kiam Tomi estis tre malsana. Anjo kuŝis kiel amaseto sur la pakkesto. Pipi levis ŝin en siajn brakojn.

—Adiaŭ, Anjo, adiaŭ, ŝi flustris. Ne ploru!

Anjo metis siajn brakojn ĉirkaŭ la kolon de Pipi kaj eligis plendan sonon.

—Adiaŭ, Pipi, ŝi plorĝemis.

Pipi prenis la manon de Tomi kaj premis ĝin forte. Poste ŝi kuris trans la pasponteton. Tiam granda larmo falis sur la nazon de Tomi. Li kunpremis la dentojn, sed tio ne helpis. Venis ankoraŭ unu larmo. Li prenis la manon de Anjo, kaj ili staris tie fikse rigardante post Pipi. Ili povis vidi ŝin sur la ferdeko. Sed ĉio fariĝas malklara, kiam oni rigardas tra vualo de larmoj.

—Vivu Pipi Ŝtrumpolonga, la homoj sur la kajo kriis.

—Entiru la pasponteton, Fridolfo, kapitano Ŝtrumpolonga kriis.

Kaj tion Fridolfo faris. "Hopetosa" kuŝis preta por sia veturo al fremdaj mondopartoj. Sed tiam...!

—Ne, paĉjo Efraimo, Pipi diris. Tio ne eblas. Mi ne eltenas tion!

—Kion vi ne eltenas, demandis kapitano Ŝtrumpolonga.

—Mi ne eltenas, ke iu homo sur la verda tero de Dio ploras kaj malĝojas pro mi. Precipe ne Tomi kaj Anjo. Denove eligu la pasponteton! Mi restos en Vilao Vilaltao.

Kapitano Ŝtrumpolonga staris silenta dum momento.

—Vi faru laŭvole, li fine diris. Vi ĉiam faris!

Pipi kapjesis konsente.

—Jes, mi ĉiam faris, ŝi kviete diris.

Kaj ili denove ĉirkaŭbrakis unu la alian, Pipi kaj ŝia patro, tiel ke la ripoj krakis. Kaj ili interkonsentis, ke kapitano Ŝtrumpolonga ofte ofte venos viziti Pipin en Vilao Vilaltao.

—Kiel ajn estu, paĉjo Efraimo, estas plej bone por infano havi solidan hejmon kaj ne ĉirkaŭvoji sur la maro tre multe kaj loĝi en negrokabanoj, aŭ kion vi pensas?

—Vi pravas kiel ĉiam, mia filino, diris kapitano Ŝtrumpolonga, estas evidente, ke vi havos pli ordan vivon en Vilao Vilaltao. Kaj tio estas plej bona por infanetoj.

—Ĝuste tiel, Pipi diris. Estas absolute plej bone por infanetoj havi iom da ordo. Precipe se ili rajtas fari la ordon mem!

Kaj Pipi adiaŭis la maristojn sur "Hopetosa" kaj por la lasta fojo ĉirkaŭbrakis paĉjon Efraimon. Poste ŝi levis la ĉevalon per siaj fortaj brakoj kaj portis ĝin reen trans la pasponteton. Kaj "Hopetosa" levis la ankron. Sed en la lasta momento kapitano Ŝtrumpolonga memoris pri afero.



—Pipi, li kriis, vi devas havi iom pli da oraj moneroj. Akceptu ĉi tiun!

Kaj li ĵetis novan valizon kun ormoneroj. Sed bedaŭrinde "Hopetosa" estis veninta tro longe for el la kajo. La valizo ne atingis la celon. "Plop" sonis kaj la valizo subakviĝis. Susuro de elreviĝo iris tra la popolamaso. Sed tiam oni aŭdis "Plop" denove. Estis Pipi, kiu plonĝis. Post momento ŝi revenis kun la valizo inter la dentoj. Ŝi suriris la kajon kaj fortiris iom da marherbo, kiu fiksiĝis malantaŭ la orelo.

—Ha, nun mi denove estas riĉa kiel Krezo, ŝi diris.

Tomi kaj Anjo ankoraŭ ne perceptis, kio okazis. Ili staris kun malfermitaj buŝoj kaj fikse rigardis al Pipi kaj la ĉevalo kaj Sinjoro Nilson kaj la valizo kaj "Hopetosa", kiu per plenaj veloj direktis sin el la haveno.

—Ĉu vi — ĉu vi ne estas sur la ŝipo, fine Tomi diris hezite.

—Divenu trifoje, Pipi diris kaj tordis la akvon el siaj harplektaĵoj.

Poste ŝi levis Tomin kaj Anjon kaj la valizon kaj Sinjoron Nilson sur la ĉevalon kaj svingis sin mem post ili.

—Reen al Vilao Vilalao, ŝi kriis per laŭta voĉo.

Tiam fine Tomi kaj Anjo komprenis. Tomi tiel ekĝojis, ke li tuj eligis sian ŝatkanton:

—Jen venas la svedoj kun bruo kaj muĝ'.

Anjo estis tiom plorinta, ke ŝi ne povis ĉesi tuj. Ŝi daŭre plorĝemis, sed nun estis feliĉaj ekploretoj, kiuj baldaŭ ĉesos. Ŝi havis la brakojn de Pipi je firma premo ĉirkaŭ la talio. Sentigis tiel mirinde sekure. Ho, kiel mirinda ĉio estas!

—Kion ni faru hodiaŭ, Pipi, Anjo demandis, kiam ŝi finploris.

—Ho, eble ni ludu kroketon, Pipi diris.

—Volonte, Anjo diris. Ŝi sciis, ke eĉ kroketludado estas tute malsama, kiam Pipi kunestas.

—Aŭ... Pipi diris malrapide.

Ĉiuj infanoj de la urbeto amasiĝis ĉirkaŭ la ĉevalo por aŭdi, kion Pipi diros.

—Aŭ... ŝi diris. Aŭ ni povos kuri al la rivereto por ekzerci iradon sur akvo.

—Oni ne povas iri sur akvo, Tomi diris.

—Jes, certe ne estas neeble, Pipi diris. Sur Kubo mi iam renkontis mebliston, kiu...

La ĉevalo komencis galopi, kaj la infanoj, kiuj amasiĝis ĉirkaŭ ĝi, ne povis aŭdi la daŭrigon. Sed ili staris dum longa longa tempo kaj rigardis post Pipi kaj ŝia ĉevalo, kiu galopis en la direkto de Vilao Vilaltao. Baldaŭ ĝi estis videbla nur kiel malgranda punkto longe for. Fine ĝi tute malaperis.

## Pipi trovas spunkon

**I**un matenon Tomi kaj Anjo kiel kutime venis ensaltantaj en la kuirejon de Pipi kaj kriis bonan matenon. Sed ili ne ricevis respondon. Pipi sidis meze sur la kuireja tablo kun Sinjoro Nilson en la brakoj kaj kun feliĉa rideto sur la lipoj.

—Bonan matenon, Tomi kaj Anjo rediris.

—Tamen imagu, Pipi diris reve, imagu, ke mi eltrovis spunkon. Ĝuste mi kaj neniu alia!

—Kion vi eltrovis, Tomi kaj Anjo demandis. Tute ne surprizis ilin, ke Pipi eltrovis ion, ĉar tion ŝi ĉiam faris, sed ili volis scii, kio tio estas. Kion vi fakte eltrovis, Pipi?

—Novan vorton, Pipi diris kaj rigardis Tomin kaj Anjon, kvazaŭ ŝi nur nun ekvidis ilin. Freŝege novan vorton.

—Kiun vorton, Tomi diris.

—Eksterordinare bonan vorton, Pipi diris. Unu el la plej bonaj, kiujn mi aŭdis.

—Do diru ĝin, Anjo diris.

—Spunko, Pipi diris triumfe.

—Spunko, Tomi diris. Kion ĝi signifas?

—Se mi nur scius, Pipi diris. Ĉio, kion mi scias, estas, ke ĝi ne estas polvosuĉilo. Tomi kaj Anjo cerbumis momenton. Fine Anjo diris:

—Sed se vi ne scias, kion ĝi signifas, ĝi ja ne utilas?

—Ne, ĝuste tio ĉagrenas min, Pipi diris.

—Kiu fakte inventis dekomence, kion la vortoj signifas, Tomi demandis.

—Kredeble aro da maljunaj profesoroj, Pipi diris. Kaj oni povas diri, ke homoj estas strangaj! Imagu, kiajn vortojn ili inventas! "Kuvo" kaj "lignokojno" kaj "ŝnureto" kaj tiaĵojn, kiujn neniu homo povas kompreni, de kie ili ricevis ilin. Sed "spunko", kiu vere estas bona vorto, tion ili simple evitas eltrovi. Kia bonŝanco, ke mi eltrovis ĝin! Kaj certe mi ankaŭ eltrovos, kion ĝi signifas.

Ŝi cerbumis dum momento.

—Spunko! Mi pripensas, ĉu ĝi eble povas esti la plej supra pinto de blue kolorigita flagstango, ŝi hezite diris.

—Ja ne ekzistas flagstangoj, kiuj estas blue kolorigitaj, Anjo diris.

—Ne, vi pravas. Jes, tiam mi vere ne scias. Ĉu eble povas esti la sono, kiu estiĝas, kiam oni tretas en ŝlimo kaj ŝlimo penetras tra la piedfingroj? Ni aŭdu, kiel sonas! "Anjo ĉirkaŭpaŝis en la ŝlimo, kaj tiam oni aŭdis la plej mirindan spunkon."

Ŝi skuis la kapon.

—Ne, ne taŭgas. "Tiam oni aŭdis la plej mirindan ĉipon", devus esti anstataŭe.

Ŝi gratis la harojn.

—Tio ĉi fariĝas pli kaj pli mistera. Sed estu kio ajn, mi eltrovos. Eble oni povas aĉeti en la butikoj. Venu, ni iru demandi!

Tomi kaj Anjo ne kontraŭis tion. Pipi iris serĉi sian valizon, kiu estis plena je ormoneroj.

—Spunko, ŝi diris. Sonas, kiel se ĝi estus multekosta. Eble estas plej bone kunporti ormoneron.

Tion ŝi faris. Sinjoro Nilson kiel kutime saltis sur ŝian ŝultron. Kaj Pipi levis la ĉevalon el la verando.

—Ĉi tie urĝas, ŝi diris al Tomi kaj Anjo. Ni rajdu. Aliel eble ne restas iu spunko, kiam ni venos. Ne surprizus min, se la urbestro aĉetis la lastan.

Kiam la ĉevalo venis galopante tra la stratoj de la urbeto kun Pipi kaj Tomi kaj Anjo sur la dorso, la hufoj tiel klakis kontraŭ la ŝtona pavimo, ke ĉiuj idoj de la urbo aŭdis tion, kaj ili gaje alkuris, ĉar ĉiuj tre ŝatis Pipin.

—Pipi, kien vi iros, ili kriis.

—Mi aĉetos spunkon, Pipi diris kaj haltigis la ĉevalon por momento.

La infanoj haltis kaj aspektis tre konfuzitaj.

—Ĉu estas io bongusta? demandis bubeto.

—Imagu, Pipi diris kaj lekis la buŝon. Estas mirinda. Almenaŭ sonas, kiel se ĝi estus.

Ŝi saltis de la ĉevalo ekster bombonejo kaj malsuprenlevis Tomin kaj Anjon. Kaj ili eniris.

—Mi volus aĉeti saketon da spunko, Pipi diris. Sed ĝi devas esti krispa.

—Spunko, diris la ĉarma fraŭlino malantaŭ la vendotablo penseme. Mi ne kredas, ke ni havas.

—Jes, vi devas havi. Ĝi devas troviĝi en ĉiuj bone ekipitaj butikoj.

—Jes, sed ĝi ĵus elĉerpiĝis, diris la fraŭlino, kiu neniam aŭdis pri spunko, sed ne volis konfesi, ke ŝia butiko ne estas same bone ekipita kiel iu alia.

—Ho, ĉu vi havis ĝin hieraŭ, Pipi fervore kriis. Bonvolu, bonvolu rakonti al mi, kiel ĝi aspektas. Mi neniam vidis spunkon en mia tuta vivo. Ĉu ĝi estas ruĝe stria?

Tiam la ĉarma fraŭlino tre bele ruĝiĝis kaj diris:

—Ba, mi ne scias, kio ĝi estas! Ĉiukaze, ni ne havas ĝin ĉi tie.

Pipi tre disrevigita eliris tra la pordo.

—Tiam mi devas pluĉasi, ŝi diris. Sen spunko mi ne iros hejmen.

La posta butiko estis feraĵejo. Komizo ĝentile sin klinis por la infanoj.

—Mi volas aĉeti spunkon, Pipi diris. Sed devas esti el la plej bona speco, tiu, per kiu oni mortigas leonojn.

La komizo aspektis ruzema.

—Nun ni vidu, li diris kaj gratis sin malantaŭ la orelo; nun ni vidu.

Li prenis malgrandan feran rastilon kaj etendis ĝin al Pipi.

—Ĉu ĉi tiu taŭgas, li demandis.

Pipi ĉagrenite rigardis lin.

—Tion la profesoroj nomas rastilo, ŝi diris. Sed nun mi hazarde deziras spunkon. Ne provu trompi senhelpan infaneton!

Tiam la komizo ridis kaj diris:

—Ni bedaŭrinde ne havas ion tian, kion vi deziras. Demandu en la mercerejo ĉe la angulo.

—La mercerejo, Pipi grumbletis al Tomi kaj Anjo, kiam ili venis sur la straton. Tie ĝi ne troviĝas, tiom mi scias.

Por momento ŝi aspektis melankolia, sed fine ŝi sereniĝis.

—Eble montriĝos, ke spunko estas malsano, ŝi diris. Ni iru demandi al la kuracisto.

Anjo sciis, kie la kuracisto loĝas, ĉar ŝi estis vakcinita tie.

Pipi funkciigis la pordan sonorilon. Flegistino venis kaj malfermis.

—Ĉu oni povas paroli kun la kuracisto, Pipi diris. Estas tre grava kazo. Treege grava malsano.

—Bonvolu, ĉi tiun vojon, la flegistino diris.

La kuracisto sidis ĉe sia skribotablo, kiam la infanoj envenis. Pipi iris rekte al li, fermis la okulojn kaj etendis la langon.

—Kaj kio mankas al vi, la kuracisto diris.

Pipi malfermis siajn serenajn blujajn okulojn kaj entiris la langon.

—Mi timas, ke mi ricevis spunkon, ŝi diris. Ĉar jukas sur la tuta korpo. Kaj la okuloj tute kunfalas, kiam mi dormas. Foje mi singultas. Kaj dimanĉe mi ne fartis tre bone, kiam mi manĝis teleron da ŝuŝmiraĵo kun lakto. Mi havas sufiĉe bonan apetiton, sed mi tre ofte falsenglutas, kaj tiam mi ne povas bone utiligi ĝin. Devas esti la spunko, kiu atakas min. Kaj nun diru al mi — ĉu ĝi infektas?

La kuracisto rigardis la sanaspektan vizaĝon de Pipi kaj poste diris:

—Mi estas certa, ke vi fartas pli bone ol la plejmulto. Mi estas certa, ke vi ne suferas de spunko.

Pipi fervore prenis lian brakon.

—Sed tamen ekzistas malsano kun tiu nomo, ĉu ne?

—Ne, la kuracisto diris, sed eĉ se ĝi ekzistus, mi ne kredas, ke ĝi atakus vin.

Pipi aspektis malgaja. Ŝi profunde riverencis al la kuracisto por adiaŭi, kaj tion faris ankaŭ Anjo. Tomi klinis sin. Kaj ili retiriĝis al la ĉevalo, kiu atendis ĉe la gardena barilo de la kuracisto.

Ne longe for de la kuracisto situis alta trietaĝa domo. Fe-

nestro en la plej supra etaĝo estis malfermita. Pipi fingromontris al la malfermita fenestro kaj diris:

—Ne surprizus min, se la spunko estus tie interne. Mi surpringrimpos por rigardi.

Per viglaj movoj ŝi grimpis laŭ la pluvtubo. Kiam ŝi estis je la sama nivelo kiel la fenestro, ŝi sentene ĵetis sin en la aeron kaj sukcesis preni la fenestroladon. Ŝi levis sin sur la brakoj kaj enmetis la kapon.

En al ĉambro interne de la fenestro du virinoj sidis parolante. Divenu, ĉu ili surpriziĝis, kiam ruĝa kapo subite aperis en la fenestrokadro kaj ili aŭdis voĉon, kiu diris:

—Mi scivolas, ĉu estas spunko ĉi-interne?

La du sinjorinoj ekkriis pro timego.

—Je la kruco, kion vi diras, infano? Ĉu iu eskapis?

—Ĝuste tion mi volus scii, Pipi ĝentile diris.

—Ho, ĝi eble estas sub la lito, unu el la sinjorinoj kriis. Ĉu ĝi mordas?

—Mi preskaŭ kredas tion, Pipi diris. Sonas kvazaŭ li havas solidajn ŝirdentojn.

La du sinjorinoj alkroĉiĝis unu al la alia. Pipi interesite ĉirkaŭrigardis, fine ŝi melankolie diris:

—Ne, ĉi tie ne troviĝas eĉ lipharo de spunko. Pardonu, ke mi ĝenis! Mi nur pensis, ke mi informiĝu, kiam mi hazarde preterpasis.

Ŝi lasis sin regliti malsupren laŭ la pluvtubo.

—Bedaŭrinde, ŝi diris al Tomi kaj Anjo. Ne ekzistas spunko en ĉi tiu urbo. Ni rajdu hejmen.

Kaj tion ili faris. Kiam ili saltis de la ĉevalo ekster la verando, Tomi preskaŭ tretis sur skarabeton, kiu rampis sur la sablovoĵeto.



—Ho, gardu la skarabon, Pipi kriis.

Ili ĉiuj kaŭre klinis sin por rigardi ĝin. Ĝi estis tre malgranda. La flugiloj estis verdaj kaj brilis kiel metalo.

—Kia bela etulo, Anjo diris. Mi ŝatus scii, kiu speco estas.

—Ne estas majskarabo, Tomi diris.

—Nek sterkoskarabo, Anjo diris. Kaj ne lukano. Mi vere ŝatus scii, kiu speco estas.

Sur la vizaĝo de Pipi etendiĝis beata rideto.

—Mi scias, ŝi diris. Estas spunko.

—Ĉu vi estas certa pri tio, Tomi diris dubeme.

—Ĉu vi ne kredas, ke mi rekonas spunkon, kiam mi vidas ĝin, Pipi diris. Ĉu vi iam vidis ion same spunkan en via vivo?

Ŝi singarde movis la skarabon al pli sekura loko, kie neniu tretus sur ĝin.

—Mia ĉarma spunketo, ŝi tenere diris. Mi ja sciis, ke mi fine trovos iun. Sed estas vere strange. Ĉi tie ni ĉasis spunkon tra la tuta urbo, kaj ĝi troviĝis la tutan tempon ĝuste antaŭ Vilao Vilaltao.

## Pipi aranĝas demandoludon

**I**un tagon la longa rava libertempo finiĝis, kaj Tomi kaj Anjo denove komencis la lernejon. Pipi daŭre opiniis, ke ŝi estas sufiĉe instruita sen lernejo kaj decide avertis, ke ŝi ne intencas meti sian piedon en la lernejon, antaŭ ol venos la tago, kiam ŝi ne povos trankviliĝi, se ŝi ne ekscios, kiel la ŝ-sono en "ŝipmalsano" estas skribata.

—Sed ĉar mi neniam estas ŝipmalsana, mi ne bezonas unu-avice maltrankvili pri la skribo, ŝi diris. Kaj se mi vere hazarde fariĝos ŝipmalsana iun fojon, mi havos alion por fari ol skribi tion.

—Cetere vi neniam fariĝos ŝipmalsana, Tomi diris.

Kaj en tio li pravis. Pipi estis velirinta vaste sur la oceanoj kun sia patro antaŭ ol li fariĝis negra reĝo, kaj Pipi alvenis al Vilao Vilaltao. Sed ŝipmalsana ŝi neniam estis.

Foje Pipi amuzis sin per tio, ke ŝi rajdis akcepti Tomin kaj Anjon post la lerneja fino. Tiam Tomi kaj Anjo tre ekĝojis. Ili tre ŝatis rajdi, kaj vere ne multaj infanoj rajtis rajdi hejmen post la lernejo.

—Jen aŭdu, Pipi, venu akcepti nin posttagmeze, Tomi diris iun tagon, kiam li kaj Anjo ĝuste estis kurontaj reen al la lernejo post la tagmanĝa paŭzo.

—Jes, faru, Anjo diris. Ĉar hodiaŭ fraŭlino Rozoflora disdonos siajn donacojn al la bonaj kaj diligentaj infanoj.

Fraŭlino Rozoflora estis riĉa maljuna sinjorino, kiu loĝis en

la urbeto. Ŝi ja atentis pri sia mono, sed unufoje en ĉiu semestro ŝi venis al la lernejo kaj disdonis donacojn al la lernejoj. Ne al ĉiuj lernejoj, ho ne! Nur la tre bonaj kaj diligentaj infanoj ricevis. Por ke fraŭlino Rozoflora povu scii, kiuj infanoj vere estas bonaj kaj diligentaj, ŝi havis longan pridemandadon, antaŭ ol la donacoj estis disdonitaj. Kaj tial ĉiuj infanoj en la urbeto vivis en konstanta timego pro ŝi. Ĉar ĉiun tagon, kiam ili estis ekstudiantaj siajn hejmtaskojn kaj ĝuste pensis, ĉu ili unue povas eltrovi ion alian kaj pli agrablan, ilia patro aŭ patrino diris:

—Pensu pri fraŭlino Rozoflora!

Kaj vere estis terura honto veni hejmen al la gepatroj tiun tagon, kiam fraŭlino Rozoflora estis en la lernejo, kaj ne kunhavi la plej etan moneron aŭ saketon da bombonoj aŭ almenaŭ kamizolon. Jes, ĝuste kamizolon! Ĉar fraŭlino Rozoflora ankaŭ disdonis vestojn al la plej malriĉaj infanoj. Sed ne helpis, ke ido estu kiom ajn malriĉa, se li ne povis respondi, kiam fraŭlino Rozoflora demandis, kiom da centimetroj estas en unu kilometro. Ne, ne estis strange, ke la infanoj en la urbeto vivis en timego je fraŭlino Rozoflora. Ili ankaŭ timis ŝian supon! Ĉar estis tiel, ke fraŭlino Rozoflora pesigis kaj mezurigis ĉiujn infanojn por vidi, ĉu estas iu, kiu estas aparte malgrasa kaj mizera, kaj kiu videble ne ricevas sufiĉe da manĝaĵo hejme. Ĉiuj tiaj etaj malgrasaj kaj malriĉaj infanoj devis iri hejmen al fraŭlino Rozoflora ĉiun tagmanĝan paŭzon kaj manĝi grandan teleron da supo. Tio estus ĉiukaze mirinda, se nur ne estus amaso da abomenindaj grioj en la supo. Ili sentiĝis tute mukecaj en la buŝo.

Sed nun estis la granda tago, kiam fraŭlino Rozoflora venos al la lernejo. La lecionoj finiĝis pli frue ol kutime, kaj ĉiuj

infanoj kolektiĝis sur la lerneja korto. Meze sur la korto estis metita granda tablo, kaj ĉe la tablo sidis fraŭlino Rozoflora. Je sia helpo ŝi havis du skribistojn, kiuj notis ĉion pri la infanoj, kiom ili pezas, ĉu ili povas respondi la demandojn, ĉu ili estas malriĉaj kaj bezonas vestojn, ĉu ili havas ateston pri bona konduto, ĉu ili havas gefratetojn hejme, kiuj ankaŭ bezonas vestojn, jes, ne estis fino al tio, kion fraŭlino Rozoflora volis scii. Sur la tablo antaŭ ŝi staris kesteto kun mono kaj multaj saketoj da bombonoj kaj tutaj stakoj da kamizoloj kaj ŝtrumpoj kaj lanaj kalsonoj.

—Ĉiuj infanoj stariĝu en vicoj, fraŭlino Rozoflora kriis. En la unua vico infanoj sen gefratetoj hejme, en dua vico infanoj, kiuj havas unu aŭ du gefratojn, en tria vico tiuj infanoj, kiuj havas pli ol du gefratojn.

Ĉar fraŭlino Rozoflora volis havi ordon en ĉio, kaj estis ja ankaŭ juste, ke tiuj infanoj, kiuj havas multajn gefratojn hejme, ricevu pli grandajn saketojn da bombonoj ol tiuj, kiuj neniujn havas.

Kaj la ekzamenado komenciĝis. Oj, oj, kiel tremis la infanoj! Tiuj, kiuj ne povis respondi, devis unue stariĝi en angulo kaj honti, kaj poste ili devis iri hejmen eĉ sen bombono por la gefratoj.

Tomi kaj Anjo estis tre diligentaj en la lernejo. Sed malgraŭ tio la rozeto de Anjo tremis pro ekscito, dum ŝi staris en la vico apud Tomi, kaj Tomi pli kaj pli paliĝis je la vizaĝo, ju pli proksima li venis al fraŭlino Rozoflora. Ĝuste kiam estis lia vico respondi, ekestis subita maltrankvilo en la vico por "infanoj sen gefratoj". Iu premis sin antaŭen inter ĉiuj idoj. Ne estis iu alia ol Pipi. Ŝi ŝovis la infanojn flanken kaj iris rekte al fraŭlino Rozoflora.

—Pardonon, sed mi ne kunestis de la komenco. En kiu vico oni staru, kiam oni estas sen dek kvar gefratoj, el kiuj tri malvirtaj knabetoj?

Fraŭlino Rozoflora aspektis tre malapropa.

—Vi povas resti, kie vi estas, ĝis plue, ŝi diris. Sed mi supozas, ke vi baldaŭ povos esti translokita al la vico de infanoj, kiuj hontestaru.

Kaj jen la skribistoj devis noti la nomon de Pipi, kaj ŝi estis pesita, por ke oni vidu, ĉu ŝi bezonas supon. Sed ŝi pezis du kilogramojn tro por tio.

—Supon vi ne ricevos, diris fraŭlino Rozoflora severe.

—Kelkfoje oni estas bonŝanca, Pipi diris. Nun temas pri evito ankaŭ de vestoj kaj kamizoloj, kaj poste oni povas elspiri.

Fraŭlino Rozoflora ne aŭskultis ŝin. Ŝi serĉis en la ortografia libro por trovi malfacilan vorton, kiun Pipi literumu.

—Aŭskultu, mia knabino, ŝi fine diris, bonvolu diri al mi, kiel vi literumas ”ŝiprompiĝo”.

—Tre volonte, Pipi diris. S k i p p r o m p i g g i o.

Fraŭlino Rozoflora faris dolĉacidan rideton.

—Ĉu vere, ŝi diris. La ortografia libro literumas ĝin tute alie.

—Jen estas bonŝanco, ke vi volis scii, kiel ĝuste mi literumas ĝin, Pipi diris. S k i p p r o m p i g g i o, jen la maniero, laŭ kiu mi ĉiam literumis ĝin, kaj mi nur fartis bone je tio.

—Notu tion, fraŭlino Rozoflora diris al la skribistoj kaj severe kunpremis la buŝon.

—Jes faru, Pipi diris. Notu tiun delikatan literumon kaj aranĝu, ke estu ŝanĝo en la ortografia libro kiom eble plej rapide.

—Nu, mia knabino, fraŭlino Rozoflora diris. Respondu al mi pri ĉi tio. Kiam Karlo la Dekdua mortis?

—Ho, ĉu ankaŭ li nun mortis, Pipi kriis. Tamen estas tro malĝojige, kiom da homoj pereas nuntempe. Kaj mi estas certa, ke tio ne estus bezoninta okazi, se li estus teninta sin seka je la piedoj.

—Notu tion, fraŭlino Rozoflora diris kun glaciiga voĉo al la skribistoj.

—Jes, faru ĉiukaze, Pipi diris. Kaj notu, ke estas ankaŭ bone kun hirudoj plej proksime al la korpo. Kaj ke oni trinku iom da varma petrolo je enlitiĝo, tio stimulas!

Fraŭlino Rozoflora skuis la kapon.

—Kial la ĉevalo havas strekitajn vangodentojn, ŝi serioze demandis.

—Sed, ĉu vi estas certa, ke ĝi havas, Pipi diris dubeme. Cetero vi povas demandi ĝin mem. Ĝi staras tie, ŝi daŭrigis kaj fingromontris al sia ĉevalo, kiun ŝi ligis al arbo.

Ŝi ridis kontente.

—Kia bonŝanco, ke mi kunprenis ĝin ĉi tien, ŝi diris. Aliel vi ja neniam ekscius, kial ĝi havas strekitajn vangodentojn. Ĉar sincere dirite mi ne havas ideon pri tio. Nek mi demandas pri tio.

La buŝo de fraŭlino Rozoflora nun estis nur maldika streko.

—Tio estas eksterordinara, ŝi murmuris, tute eksterordinara.

—Jes, tion ankaŭ mi opinias, Pipi diris. Se mi daŭre estos ĉi tiel kapabla, mi certe ne povos eviti ricevi rozkoloran lankalsonon.

—Notu tion, fraŭlino Rozoflora diris al la skribistoj.

—Ne, ne zorgu pri tio, Pipi diris. Mi fakte ne vere deziras rozkoloran lankalsonon. Tio ne estis mia intenco. Sed vi ja povas noti, ke mi havu grandan saketon da bombonoj.

—Vi ricevos lastan demandon, fraŭlino Rozoflora diris, kaj ŝia voĉo sonis tre strange kunpremita.

—Jes, nur procedu, Pipi diris. Mi ŝatas ĉi tian demandoludon.

—Ĉu vi povas respondi ĉi tion, fraŭlino Rozoflora diris. Petro kaj Paŭlo dividos torton. Se Petro ricevas kvaronon, kion Paŭlo ricevos?

—Ventrodoloron, Pipi diris. Ŝi turnis sin al la skribistoj. Notu tion, ŝi diris serioze. Notu, ke Paŭlo havos ventrodoloron.

Sed nun fraŭlino Rozoflora estis preta kun Pipi.

—Vi estas la plej nescianta kaj malagrabra infano, kiun mi iam vidis, ŝi diris. Tuj iru ekstari en tiu vico kaj hontu!

Pipi obeeme marŝis for, sed ŝi furioze murmuris al si mem:

—Nejuste! Mi, kiu povis respondi ĉiun demandon.

Kiam ŝi estis irinta kelkajn paŝojn, ŝi ekpensis pri io, kaj ŝi rapide per kubutoj premis sin reen al fraŭlino Rozoflora.

—Pardonu, ŝi diris, sed mi forgesis informiĝi pri mia brustolarĝo kaj alteco super la maro. Notu tion, ŝi diris al la skribistoj. Mi ja ne volas havi supon — tute ne — sed tamen devas esti ordo en la librotenado.

—Se vi ne tuj ekstaros tie kaj hontos, fraŭlino Rozoflora diris, mi konas knabineton, kiu baldaŭ ricevos bonan porcion da bastonado.

—Bedaŭrinda ido, Pipi diris. Kie ŝi estas? Sendu ŝin al mi, kaj mi defendos ŝin. Notu tion!

Kaj Pipi ekstaris inter la infanoj, kiuj hontu. Tie la humoro

estis mizera. Multaj infanoj singultis kaj ploris, kiam ili pensis pri tio, kion iliaj gepatroj kaj gefratoj diros, kiam ili venos hejmen sen mono kaj sen bombonoj. Pipi ĉirkaŭrigardis inter la plorantaj infanoj kaj kelkfoje glutis. Poste ŝi diris:

—Ni aranĝu tute propran demandoludon!

La infanetoj aspektis iom vigligitaj, sed ili ne plene komprenis, kion Pipi volas diri.

—Stariĝu en du vicoj, Pipi diris. Ĉiuj, kiuj scias, ke Karlo la Dekdua mortis, stariĝu en unu vico, kaj tiuj, kiuj ankoraŭ ne scias, ke li mortis, ekstaru en la alia.

Sed ĉar ĉiuj infanoj sciis, ke Karlo la Dekdua mortis, fariĝis nur unu vico.

—Ĉi tio ne taŭgas, Pipi diris. Devas esti almenaŭ du vicoj, aliel ne estas ĝuste. Demandu al fraŭlino Rozoflora, kaj vi aŭdos.

Ŝi cerbumis.

—Nun mi scias, ŝi fine diris. Ĉiuj plene edukitaj friponetoj stariĝu en unu vico.

—Kaj kiuj staru en la alia vico, vigle demandis knabineto, kiu ne volis konsenti, ke ŝi estas friponeto.

—En la alia vico ni metu ĉiujn ne plene edukitajn friponetojn, Pipi diris.

Ĉe la tablo de fraŭlino Rozoflora la ekzamenado plene daŭris, kaj jen kaj jen plorema ideto venis marŝanta al la aro de Pipi.

—Kaj nun venos la malfacila afero, Pipi diris. Nun ni vidu, ĉu vi zorge legis viajn lernolibrojn.

Ŝi turnis sin al malgrasa knabeto kun blua ĉemizo.

—Vi, ŝi diris, nomu iun, kiu mortis.

La knabo aspektis iom surprizita, sed poste diris:



—Maljuna sinjorino Pettersson en la 57-a.

—Ĉu vere, Pipi diris. Ĉu vi scias iun alian?

Ne, tion la knabo ne sciis. Tiam Pipi formis la manojn kiel funelon antaŭ la buŝo kaj laŭte flustris:

—Karlo la Dekdua, ja!

Poste Pipi demandis ĉiujn infanojn laŭvice, ĉu ili scias pri iu, kiu mortis, kaj ili ĉiuj respondis:

—Maljuna sinjorino Pettersson en la 57-a kaj Karlo la Dekdua.

—Ĉi tiu ekzameno iras super ĉiu atendo, Pipi diris. Nun mi demandos nur unu plian aferon. Se Petro kaj Paŭlo dividos torton kaj Petro absolute ne volas havi ion pli, sed sidiĝas en angulo kaj mordetas sekan kvaronon, kiu devas oferi sin kaj gluti la tutan torton?

—Paŭlo, ĉiuj infanoj kriis.

—Ĉu ekzistas tiel kapablaj infanoj kiel vi ie alie, Pipi demandis. Sed vi ankaŭ ricevos rekompencan.

Kaj el la poŝo ŝi elprenis amason da ormoneroj, kaj ĉiu infano ricevis ormoneron. Ĉiu infano ankaŭ ricevis grandan saketon da bombonoj, kiujn Pipi elprenis el sia dorsosako.

Kaj tiel okazis, ke fariĝis granda ĝojo inter ĉiuj infanoj, kiuj efektive devus honti. Kaj kiam la demandado de fraŭlino Rozoflora estis finita kaj ĉiuj iris hejmen, nenioj forkuris pli rapide ol tiuj, kiuj estis starintaj en la honta angulo. Sed unue ili ĉiuj amasiĝis ĉirkaŭ Pipi.

—Dankon, dankon, bona Pipi, ili diris. Dankon por la mono kaj la bombonoj.

—Nedankinde, Pipi diris. Vi ne bezonas danki por tio. Sed ke mi savis vin de rozkoloraj lankalsonoj, tion vi neniam forgesu.

## Pipi ricevas leteron

**L**a tagoj pasis kaj la aŭtuno venis. Unue fariĝis aŭtuno, kaj poste fariĝis vintro, longa kaj malvarma vintro, kiu ŝajnis neniam voli ĉesi. Tomi kaj Anjo havis multon por fari en la lernejo, kaj por ĉiu pasanta tago ili sentis sin ĉiam pli lacaj kaj por ili estis ĉiam pli malfacile havi forton ellitiĝi en la mateoj. Sinjorino Settergren komencis vere maltrankvili pri iliaj palaj vangoj kaj malbona apetito. Por kompletigi ĉion ili ambaŭ restis subite kuŝantaj pro morbilo kaj devis resti en la lito kelkajn semajnojn. Estus tre malgajaj semajnoj, se Pipi ne venus ĉiutage kaj farus artifikojn ekster ilia fenestro. La kuracisto malpermesis al ŝi eniri la malsanulan ĉambrojn pro la risko de infekto, kaj Pipi obeis, eĉ se ŝi diris, ke unu aŭ eĉ du milionojn da morbilaj baciloj ŝi kapablus frakasi inter siaj ungoj dum posttagmezo. Sed artifikojn ekster la fenestro neniu malpermesis al ŝi fari. La infana ĉambro situis en la dua etaĝo, kaj tial Pipi estis stariginta ŝtupetaron kontraŭ la fenestron. Kaj estis tre ekscite por Tomi kaj Anjo kuŝi en la litoj kaj diveni, kiel Pipi aspektos, kiam ŝi aperos sur la ŝtupetaro. Ĉar ŝi ne aspektis sama du tagojn sinsekve. Foje ŝi estis vestita kiel kamentubisto, foje kiel fantomo en blanka kapoto, foje ŝi prezentis sin kiel sorĉistino. Foje ŝi ludis amuzajn teatraĵojn ekster la fenestro kaj ludis mem ĉiujn rolojn. Jen kaj jen ŝi havis gimnastikajn ekzercojn sur la ŝtupetaro — kaj kiajn ekzercojn! Ŝi staris sur unu el la plej supraj ŝtupetoj kaj lasis la stu-

petaron svingiĝi tien kaj reen, tiel ke Tomi kaj Anjo kriis pro timego kaj kredis, ke ŝi krake falos iun ajn momenton. Sed ŝi ne falis. Kiam ŝi volis grimpi malsupren al la grundo, ŝi ĉiam grimpis kun kapo antaŭe, nur ĉar estu iom pli amuze por Tomi kaj Anjo rigardi tion. Kaj ĉiun tagon ŝi iris al la urbo kaj aĉetis pomojn kaj oranĝojn kaj bonbonojn. Ŝi metis ĉion en korbon kaj legis al ĝi longan ŝnureton. Poste Sinjoro Nilson devis grimpi kun la ŝnureto al Tomi, kiu malfermis la fenestron kaj hisis la korbon. Foje Sinjoro Nilson ankaŭ venis kun letero de Pipi, kiam Pipi estis okupita kaj ne povis veni mem. Sed ne okazis ofte, ĉar Pipi troviĝis sur la ŝtupetaro preskaŭ la tutajn tagojn. Foje ŝi premis sian nazon kontraŭ la fenestrovitron kaj inversigis la palbebrojn kaj faris la plej terurajn grimacojn, kaj ŝi diris al Tomi kaj Anjo, ke ili ricevos por unu ormoneron, se ili povos ne ridi al ŝi. Sed tio ja estis tute nebla. Tomi kaj Anjo tiel ridis, ke ili preskaŭ falis el la litoj.

Iom post iom ili resaniĝis kaj rajtis ellitiĝi. Sed kiel palaj kaj maldikaj ili estis! Pipi sidis ĉe ili en ilia kuirejo la unuan tagon, kiam ili estis sur piedoj, kaj rigardis, kiam ili manĝis kaĉon. Tio signifas, ke ili devus manĝi kaĉon, sed tio terure malbone funkciis. Ilia patrino tute nervoziĝis, kiam ŝi vidis, kiel ili sidas kaj prenetas.

—Nun manĝu vian bongustan kaĉon, ŝi diris.

Anjo movis iom per la kulero en la telero, sed ŝi sentis, se ŝi absolute ne povas gluti iom da kaĉo.

—Kial mi fakte devas manĝi ĝin, ŝi plende diris.

—Kiel vi povas demandi tiel stulte, Pipi diris. Evidente vi devas manĝi vian bongustan kaĉon. Ĉar se vi ne manĝas vian bongustan kaĉon, vi ne povos kreski kaj fariĝi granda kaj forta. Kaj se vi ne fariĝas granda kaj forta, vi ne kapablos devigi

viajn infanojn, kiam vi ricevos ilin, manĝi sian bongustan kaĉon. Ne, Anjo, tio ne taŭgas. Ne povas fariĝi io alia ol plej terura malordo en la kaĉomanĝado en ĉi tiu lando, se ĉiuj rezonus kiel vi.

Tomi kaj Anjo manĝis po du kulerojn da kaĉo. Pipi rigardis ilin kun granda kompatato.

—Vi devus esti sur la maro dum iom da tempo, ŝi diris kaj balanciĝis tien reen sur la seĝo, sur kiu ŝi sidis. Tie vi baldaŭ lernus manĝi. Mi memoras unu fojon, kiam mi estis sur la ŝipo de mia patro, kaj Fridolfo iun matenon tute subite ne manĝis pli ol sep telerojn da kaĉo. Paĉjo tute freneziĝis pro maltrankvilo pri lia malbona apetito. "Fridolfo", li diris kun ploro en la voĉo, "mi timas, ke vi ekhavis konsumantan malsanon. Estas plej bone, ke vi restu en la lito hodiaŭ, ĝis vi sentos vin pli vigla kaj kapablos manĝi kiel homo. Mi venos envolvi vin kaj doni al vi iom da fortiga medukamento!"

—Medikamento estas la vorto, Anjo diris.

—Kaj Fridolfo ŝanceliĝis en liton, Pipi daŭrigis, ĉar li mem timis kaj cerbumis, kiu epidemio povus esti atakinta lin, kiam li kapablis manĝi nur sep telerojn da kaĉo. Li kuŝis kaj pripensis, ĉu li povos vivi ĝis la vespero, kiam paĉjo venis kun la medukamento. Estis nigra abomena medukamento, sed diru kion ajn pri ĝi — fortiga ĝi estis. Ĉar kiam li estis englutinta la unuan kuleron, elflugis kiel fajroflamo el lia buŝo. Li eligis kriegon, kiu skuis "Hopetosan" de pruo ĝis poŭpo, kaj kiu estis aŭdebla sur ŝipoj kvindek marmejlojn for de tie. La kuiristo ankoraŭ ne havis tempon forpreni la matenmanĝon, kiam Fridolfo venis per plena vapore al la kajuto kun ripetaj kriegoj. Li ĵetis sin al la manĝotablo kaj komencis manĝi kaĉon kaj kriis pro malsato eĉ post la dek kvina telero. Sed tiam

la kaĉo elĉerpiĝis kaj la kuiristo povis fari nenion alian ol ĵeti malvarmajn boligatajn terpomojn en la malfermitan faŭkon de Fridolfo. Tuj, kiam ŝajnis, ke li volas fini, Fridolfo eligis furiozan murmuron, tiel ke la kuiristo komprenis, ke li devas daŭrigi, se li ne volas esti manĝota mem. Sed li havis bedaŭrinde nur cent dek sep aĉajn terpomojn, kaj kiam li ĵetis en Fridolfon la lastan, li faris rapidan salton tra la pordo kaj ŝlasis. Kaj ni ĉiuj staris tie ekstere kaj rigardis Fridolfon tra la fenestro. Li pepe plendis kiel malsata infano kaj en rapida sekvo manĝis la panpladon kaj la kruĉon kaj dek kvin telerojn. Poste li atakis la tablon. Li forrompis ĉiujn kvar piedojn kaj manĝis, tiel ke splitoj kirliĝis ĉirkaŭ lia buŝo, sed li diris, ke por esti asparago, ĝi estis de la plej ligneca speco. Li verŝajne opiniis, ke la tablotabulo estas pli bongusta, ĉar li ŝmacis, dum li manĝis ĝin, kaj diris, ke ĝi estas la plej bongusta buterpano, kiun li ricevis, de post kiam li estis malgranda. Sed tiam paĉjo konsideris, ke li estas resanigita de sia konsumanta malsano, kaj li eniris al li kaj diris, ke li nun devos provi teni sin ĝis la tagmanĝo post du horoj, kaj ke li tiam ricevos napan kaĉon kun lardo. "Aj, aj, kapitano", Fridolfo diris kaj viŝis sian buŝon. Sed ankoraŭ unu afero, li daŭrigis kaj la okuloj brilis pro fervoro. "Kiam ni havos vespermanĝon, kaj kial ni ne povu havi ĝin iom pli frue?"

Pipi metis la kapon oblikve kaj rigardis Tomin kaj Anjon kaj iliajn kaĉotelerojn.

—Kiel dirite: vi devus esti sur la maro dum kelka tempo, tio sanigus vian nesufiĉan apetiton.

Ĝuste tiam la leterportisto preteriris la domon de familio Settergren survoje al Vilao Vilaltao. Li hazarde ekvidis Pipin tra la fenestro, kaj li kriis:

—Pipi Ŝtrumpolonga, jen letero por vi!

Pipi tiel surpriziĝis, ke ŝi preskaŭ falis de la seĝo.

—Ĉu letero!? Por mi? Lera vetero, mi volas diri vera letero!? Tion mi volas vidi unue, antaŭ ol mi kredas.

Sed estis vera letero, letero kun multaj kaj strangaj poŝtmarkoj sur ĝi.

—Vi legu, Tomi, kiu konas la arton, Pipi diris.

Kaj Tomi legis:

”Mia kara Pipilota”, li legis. ”Kiam vi ricevos ĉi tion, vi povas kiam ajn iri al la haveno kaj esplorigardi pri ”Hopetosa”. Ĉar nun mi tamen intencas veni por venigi vin portempe ĉi tien al Kurekuredutinsulo. Vi ja devas almenaŭ vidi la landon, kie via patro fariĝis tre potenca reĝo. Ĉi tie estas vere hejmece, kaj mi kredas, ke vi bonfartas. Miaj fidelaj civitanoj ankaŭ tre sopiras vidi la multe preparolatan principon Pipilota. Do ne estas diskuto pri la afero. Vi venu — estas mia reĝa kaj patra volo. Veran ŝmackison kaj multajn salutojn sendas al vi via maljuna patro

Reĝo Efraimo la Unua Ŝtrumpolonga

Ĉionreganto super Kurekuredutinsulo”.

Kiam Tomi finis la legadon, fariĝis silentege en la kuirejo.

## Pipi denove surŝipiĝas

**I**un belan matenon "Hopetosa" eniris la havenon ornamita per flagoj kaj vimploj de pruo ĝis poŭpo. La blovmuzikantaro de la urbeto estis starigita sur la kajo kaj per ĉiuj fortoj blovis belan konvenan melodion. Kaj tiom da homoj, kiom estis en la urbo, kolektiĝis por vidi Pipin akcepti sian patron, reĝon Efraimon la Unuan Ŝtrumpolongan. Fotisto ankaŭ starris preta por fari bildon pri ilia unua renkonto.

Pipi estis tiel senpacienca, ke ŝi saltadis, kaj apenaŭ la pasponteto estis elmetita, jam kapitano Ŝtrumpolonga kaj Pipi kun laŭtaj jubilkrioj kuregis unu al la alia. Kapitano Ŝtrumpolonga tiel ĝojis vidi sian filinon, ke li ĵetis ŝin multfoje alten en la aeron. Kaj Pipi estis same kore ĝoja, kaj tial ŝi ĵetis sian patron alten en la aeron ankoraŭ pli multfoje. La sola, kiu ne ĝojis, estis la fotisto, ĉar estis neeble por li ricevi bonan bildon, kiam aŭ Pipi aŭ ŝia patro la tutan tempon estis alte en la aero.

Tomi kaj Anjo ankaŭ venis kaj salutis kapitanon Ŝtrumpolongan, sed ho ve, kiel papaj kaj mizeraj ili aspektis! Estis ja la unua fojo, ke ili estis eksterdome post sia malsano.

Pipi devis kompreneble iri surŝipen kaj saluti Fridolfon kaj ĉiujn siajn amikojn inter la maristoj. Tomi kaj Anjo rajtis akompani. Sentiĝis tre solene ĉirkaŭpromeni sur tia longvojaĝa ŝipo, kaj Tomi kaj Anjo vaste malfermis la okulojn por vere vidi ĉion.

Pipi ĉirkaŭbrakis ĉiujn maristojn tiel fervore, ke ili malfacile spiris la sekvajn kvin minutojn. Kaj poste ŝi levis kapitanon Ŝtrumpolongan sur siajn ŝultrojn kaj portis lin tra la tuta popolaro kaj ĝis la hejmo Vilao Vilaltao. Tomi kaj Anjo promene sekvis man-en-mane.

—Vivu reĝo Efraimo, kriis la homamaso, kiu opiniis, ke tio estas granda tago en la historio de la urbo.

Kelkajn horojn poste kapitano Ŝtrumpolonga kuŝis en lito en Vilao Vilaltao kaj dormis kaj ronkis, tiel ke la tuta domo skuis. En al kuirejo sidis Pipi, Tomi kaj Anjo ĉirkaŭ la tablo, kie la restaĵoj de solida vespermanĝo ankoraŭ restis. Tomi kaj Anjo estis iom silentaj kaj cerbumantaj. Pri kio ili cerbumis? Jes, Anjo ĝuste cerbumis pri tio, ĉu ne, post ĉio, estus pli bone esti mortinta. Kaj Tomi sidis kaj provis memori, ĉu ekzistas io ajn ĉi tie en la mondo, kio estas vere amuza, sed li ne povis eltrovi ion. La tuta vivo estas iaspeca dezerto, li pensis.

Sed Pipi estis je brila humoro. Ŝi karesis Sinjoron Nilson, kiu singarde tretis tien reen inter la pladoj sur la tablo, ŝi karesis Tomin kaj Anjon, ŝi alterne fajfis kaj kantis, ŝi faris gajajn dancopaŝojn jen kaj jen, kaj ŝajnis ne rimarki, ke Tomi kaj Anjo estas tre malfeliĉaj.

—Estos mirinde reiri sur la maron, ŝi diris. Imagu, esti sur la maro, kie regas libereco!

Tomi kaj Anjo suspiris.

—Kaj mi fakte ankaŭ estas iom ekscitita vidi la Kurekuredutinsulon. Imagu, kuŝi tie elstreĉita sur la strando kaj tremi la dikpiedfingrojn en vere Suda Maro, kaj nur bezoni malfermi la buŝon, kaj matura banano falas rekte en ĝin.

Tomi kaj Anjo suspiris.



—Kial vi suspiras, Pipi diris. Ĉu vi ne ŝatas ĉarmajn nigrajn infanetojn?

—Jes, certe, Tomi diris. Sed ni nur sidas pensante pri tio, ke daŭros longe ĝis vi revenos al Vilao Vilaltao.

—Jes, kompreneble, Pipi diris gaje. Sed mi tute ne malĝojas pro tio. Mi kredas, ke oni povas amuziĝi pli multe sur la Kurekuredutinsulo.

Anjo turnis la palan, senesperan vizaĝon al Pipi.

—Ho, Pipi, ŝi diris, kiom longe vi kredas, ke vi forestos?

—Ja ne estas facile diri. Proksimume ĝis kristnasko, mi supozas.

Anjo eligis ĝemon.

—Kiu scias, Pipi diris. Eble estas tiel agrable sur Kurekuredutinsulo, ke oni ekemas resti tie por ĉiam. Hopsan-sa, Pipi diris kaj faris novan danĉpaŝon. Negroprincino, tio ne estas malbona profesio por iu, kiu tiel malmulte iris al lernejo kiel mi.

La okuloj de Tomi kaj Anjo komencis aspekti strange malsekaj en iliaj palaj vizaĝoj. Kaj subite Anjo klinis sin sur la tablon kaj ekploris.

—Sed kiam mi pensas pri la afero, mi ne kredas, ke mi volas resti tie por ĉiam, Pipi diris. Oni povas ankaŭ ricevi tro da kortega vivo kaj enui pri ĉio. Kaj iun belan tagon mi certe diros tiel: "Tomi kaj Anjo, kiel vi ŝatus denove veturi hejmen al Vilao Vilaltao por kelka tempo?"

—Ho, kiel ĝoje estos, kiam vi skribos tion al ni, Tomi diris.

—Skribos, Pipi diris. Vi ja havas orelojn sur la kapo. Mi ne intencas skribi. Mi simple nur diros: "Tomi kaj Anjo, nun ni veturu hejmen al Vilao Vilaltao."

Anjo levis la kapon de la tablo, kaj Tomi diris:

—Kion vi volas diri per tio?

—Kion mi volas diri, Pipi diris. Ĉu vi ne komprenas parolatan lingvon? Aŭ ĉu mi eble forgesis informi, ke vi akompanos min al Kurekuredutinsulo? Mi vere imagis, ke mi menĉis tion.

Tomi kaj Anjo rapide leviĝis kaj ekstaris sur la planko. Ili forte spiris. Sed Tomi diris:

—Ho, kiel vi babilas. Panjo kaj paĉjo neniam permesos.

—Ho jes, Pipi diris. Pri tio mi jam parolis kun via patrino.

Estis silente en la kuirejo de Vilao Vilaltao dum ekzakte kvin sekundoj. Sed poste oni aŭdis du kriegojn. Estis Tomi kaj Anjo, kiuj kriis pro ĝojo. Sinjoro Nilson, kiu sidis sur la tablo kaj provis ŝmiri buteron sur sian ĉapelon, rigardis surprizite. Eĉ pli li surpriziĝis, kiam li ekvidis, ke Pipi kaj Tomi kaj Anjo prenas la manojn unu de la alia kaj komencas ĉirkaŭdanci sen ia ordo. Ili tiel dancis kaj kriis, ke la plafona lampo malfiksiĝis kaj falis sur la plankon. Sed tiam Sinjoro Nilson ĵetis la buterŝmirilon tra la fenestro kaj ankaŭ mem komencis danci.

—Ĉu estas vere vere vere, Tomi diris, kiam ili trankviliĝis kaj rampis en la lignujon por paroli pri la afero. Pipi kapjesis.

Jes, vere estis vere. Tomi kaj Anjo kuniros al la Kurekuredutinsulo. Certe ĉiuj sinjorinoj, kiuj troviĝas en la urbeto, venis al sinjorino Settergren kaj diris:

—Vi ja ne intencas forsendi viajn infanojn longen for al la Suda Maro kune kun Pipi Ŝtrumpolonga? Vi ne povas esti serioza pri tio?

Sed tiam sinjorino Settergren diris:

—Kial mi ne faru? La infanoj estis malsanaj kaj bezonas aerŝanĝon, la kuracisto diras. Kaj tiom longe kiom mi konis

Pipin, ŝi ankoraŭ neniam faris ion, kio povus malutili al Tomi kaj Anjo. Neniu povus esti pli amema al ili ol ŝi.

—Jes, sed tamen — Pipi Ŝtrumpolonga! la sinjorinoj diris kaj sulkgigis la nazon.

—Ĝuste, sinjorino Settergren diris. Pipi eble ne ĉiam kondukas tre bone. Sed ŝi havas bonan koron.

Kaj malvarmetan fruprintempan vesperon Tomi kaj Anjo por la unua fojo en sia vivo forlasis la etetan urbon por elveturi en la grandan, strangan mondon ĉe la flanko de Pipi. Tie ili staris ĉiuj tri ĉe la randreto, dum la freŝa vespera vento plenigis la velojn de "Hopetosa". Ĉiuj tri — eble estus pli ĝuste diri ĉiuj kvin, ĉar ankaŭ la ĉevalo kaj Sinjoro Nilson kunestis.

Ĉiuj lernejoj kamaradoj de la infanoj staris sur la kajo kaj ploris pro sopiro kaj envio. Morgaŭ ili iros en lernejon kiel kutime. Ili havis la Sudmarajn insulojn kiel hejmtaskon en geografio. Tomi kaj Anjo ne bezonis fari hejmtaskojn nun por ioma tempo. "La sano venu antaŭ la lerneja laboro", la kuraĉisto diris. "Kaj la Sudmarajn insulojn ili povos serĉi surloke", Pipi diris.

La gepatroj de Tomi kaj Anjo ankaŭ staris sur la kajo. Kaj la koroj de Tomi kaj Anjo iom premiĝis, kiam ili vidis ilin sekigi siajn okulojn per la poŝtuko. Sed Tomi kaj Anjo ne povis ne esti feliĉaj, tiel feliĉaj, ke preskaŭ doloris.

Malrapide "Hopetosa" glitis de la kajo.

—Tomi kaj Anjo, kriis sinjorino Settergren, kiam vi venos sur la Nordan maron, vi devos surhavi du kamizolojn kaj ...

La resto de tio, kion ŝi intencis diri dronis en la adiaŭaj krioj de la homoj sur la kajo, en la sovaĝa henado de la ĉevalo,

la gaja hurlado de Pipi kaj la forta trumpetado de kapitano Ŝtrumpolonga, kiam li purigis la nazon.

La veturo komenciĝis. For sub la steloj velis "Hopetosa". La glacieroj dancis ĉirkaŭ la pruo, la vento kantis en la veloj.

—Ho, Pipi, Anjo diris. Sentiĝas tre strange interne. Mi komencas kredi, ke ankaŭ mi volos fariĝi marrabisto, kiam mi estos granda.

## Pipi albordiĝas

**L**a Kurekuredutinsulo rekte antaŭe, Pipi kriis iun sunkla-  
ran matenon, kiam ŝi staris ĉe la observejo vestita nur per  
tukpeco ĉirkaŭ la talio.

Ili estis velintaj dum tagoj kaj noktoj, semajnoj kaj mona-  
toj, sur ŝtormvipitaj maroj kaj trankvilaj, afablaj akvoj, en stel-  
lumo kaj lumbrilo, sub malklaraj, minacaj nuboj kaj en ar-  
danta sunlumo, jes, ili veladis tiel longan tempon, ke Tomi kaj  
Anjo preskaŭ forgesis, kiel sentiĝas loĝi hejme en la urbeto.

Ilia patrino certe surpriziĝus, se ŝi povus vidi ilin nun. Ne  
plu palaj vangoj! Sanaj kaj brunigitaj kaj viglokulaj ili grim-  
pis en la vantoj same kiel Pipi. La vestojn ili iom post iom lasis  
fali, laŭ la plivarmiĝo de la klimato, kaj el la dike envolvitaj  
infanoj kun du kamizoloj, kiuj krozis la Nordan Maron, fari-  
ĝis du nudaj, brunaj idetoj, ĉiu kun sia tukpeco ĉirkaŭ la ta-  
lio.

—Ho, kiel mirinde estas, Tomi kaj Anjo diris ĉiun matenon,  
kiam ili vekiĝis en la kajuto, kiun ili dividis kun Pipi. Plej ofte  
Pipi tiam estis el la lito kaj staris ĉe la direktilo.

—Pli bona maristo ol mia filino neniam veliris sur la sep  
oceanoj, kapitano Ŝtrumpolonga kutimis diri. Kaj li pravis pri  
tio. Tra la plej teruraj marrompaĵoj kaj preter la plej danĝeraj  
submaraj rifoj Pipi kondukis "Hopetosan" per firma mano.

Sed nun la vojaĝo baldaŭ atingis sian finon.

—La Kurekuredutinsulo rekte antaŭe, Pipi kriis.

Jes, tie ĝi situis sub verdaj palmoj ĉirkaŭata de la plej blua akvo.

Du horojn poste "Hopetosa" direktiĝis en golfejon sur la okcidenta flanko de la insulo. Kaj sur la strando staris ĉiuj kurekuredutoj, viroj, virinoj kaj infanoj, por akcepti sian reĝon kaj lian ruĝharan filinon. Impona susuro leviĝis el la popolamaso, kiam oni elmetis la pasponteton.

—Usamkura, kusomkara, ili kriis, kaj tio signifas:

—Bonan revenon, dika blanka estro!

Reĝo Efraimo majeste iris sur la pasponteto, vestita en sia blua korduroja kostumo, dum Fridolfo per tirharmoniko sur la ferdeko ludis la novan nacian himnon de la kurekuredutoj: "Jen venas la svedoj kun bruoj kaj muĝoj"

Reĝo Efraimo levis la manon por saluto kaj kriis:

—Muoni manana! kaj tio signifas:

—Saluton denove!

Post li venis Pipi. Ŝi portis la ĉevalon. Tiam susuro iris tra ĉiuj kurekuredutoj. Ili certe aŭdis pri Pipi kaj ŝia kolosa forto, sed estis io tute alia vidi tion en la realo. Ankaŭ Tomi kaj Anjo afable promenis surteren, kaj tion faris ankaŭ la tuta ŝipanaro, sed ĝuste tiam la kurekuredutoj ne havis la okulojn por iu alia ol Pipi. Kapitano Ŝtrumpolonga levis ŝin kaj starigis ŝin sur siajn ŝultrojn, por ke ili vere povu vidi ŝin, kaj tiam denove susuro iris tra la homamaso. Sed tuj poste Pipi levis kapitanon Ŝtrumpolongan sur unu sian ŝultron kaj la ĉevalon sur la alian, kaj tiam la susuro preskaŭ kreskis ĝis uragano.

La tuta loĝantaro de la Kurekuredutinsulo ne atingas pli ol cent dudek ses homoj.

—Proksimume konvene multajn regatojn mi havas, reĝo Efraimo diris. Pli multajn oni ne povas kontroli.

Ĉiuj loĝis en hejmecaj kabanetoj inter la palmoj. La plej granda kaj bela kabano apartenis al reĝo Efraimo. La ŝipanoj de "Hopetosa" ankaŭ havis siajn kabanojn, kie ili loĝis dum "Hopetosa" estis ankrita en la golfeto. Ĝi cetere preskaŭ ĉiam estis tie nuntempe. Nur kelkfoje ekspedicio estis necesa al insulo kvindek mejlojn norden. Ĉar tie estis butikoj, en kiu oni povis aĉeti flartabakon por kapitano Ŝtrumpolonga.

Tre bela novkonstruita kabaneto estis destinita por Pipi. Ankaŭ Tomi kaj Anjo trovis sufiĉan lokon tie. Sed antaŭ ol ili rajtis eniri la kabanon kaj forlavi la vojaĝpolvon de si, kapitano Ŝtrumpolonga volis montri al ili unu aferon. Li prenis la brakon de Pipi kaj kondukis ŝin reen al la bordo.

—Ĉi tie, li diris kaj montris per dika montrofingro. Ĉi tie mi flosis borden tiun fojon, kiam mi estis blovita en la maron.

La kurekuredutoj starigis memorŝtonon pri la rimarkinda evento. Sur la ŝtono estis enĉizita en la kurekureduta lingvo:

"Trans la granda vasta maro nia dika, blanka ĉefo venis. Ĉi tie estas la loko, kie li flosis borden, kiam la panarboj floris. Ke li ĉiam restu same dika kaj grandioza, kia li estis, kiam li venis."

Kapitano Ŝtrumpolonga laŭtlegis la enskribaĵon por Pipi kaj Tomi kaj Anjo per voĉo tremanta pro emocio. Poste li forte purigis la nazon.

Kiam la suno komencis malleviĝi kaj preparis sin por malaperi en la senlima sino de la Suda Maro, la tamburoj de la kurekuredutoj vokis ĉiujn homojn al la festa kaj regada placo, kiu situis meze de la vilaĝo. Tie staris la bela trono de Reĝo Efraimo el bambua kano, ornamita per ruĝaj hibiskofloroj. Sur ĝi li sidis, kiam li regis. Por Pipi la kurekuredutoj faris iom pli malgrandan tronon, kiu staris flanke de tiu de ŝia

patro. Jes, en tuta rapideco ili ankaŭ ĉarpentis du malgrandajn bambuseĝojn por Tomi kaj Anjo.

La tondro de la tamburoj sonis ĉiam pli laŭte, kiam reĝo Efraimo kun granda digno prenis lokon sur sia trono. Li estis demetinta sian kordurojan kostumon kaj estis vestita en ruĝa vesto kun krono sur la kapo, basta jupo ĉirkaŭ la talio, kolĉeno el ŝarkodentoj ĉirkaŭ la kolo kaj dikaj ringoj ĉirkaŭ la maleoloj. Pipi senĝene eksidis sur sia trono. Ŝi daŭre havis la saman ŝtoftuketon ĉirkaŭ la talio, sed en la hararon ŝi estis metinta kelkajn ruĝajn kaj blankajn florojn, por estiĝi iom pli bela. Ankaŭ Anjo faris tion. Sed ne Tomi. Nenio povus igi lin meti florojn en la hararon.

Reĝo Efraimo estis for de la regadaj taskoj dum sufiĉe longa tempo, kaj nun li komencis regi per ĉiuj fortoj. Dume la malgrandaj kurekuredutinfanoj proksimiĝis al la trono de Pipi. Pro iu nekomprenebla kaŭzo ili ekhavis la ideon, ke blanka haŭto estas multe pli bela ol nigra, kaj tial ili sentis sin plenaj je respekto, ju pli ili proksimiĝis al Pipi kaj Tomi kaj Anjo. Pipi krome estis princino. Kiam ili venis tute proksime al Pipi, ili ĉiuj samtempe ekgenuis antaŭ ŝi kaj klinis la fruntojn al la tero.

Pipi rapide saltis de la trono.

—Kion mi vidas, ŝi diris. Ĉu vi ludas objektoserĉantojn ankaŭ ĉi tie? Atendu, ke mi povu kunesti!

Ŝi genuis kaj ĉirkaŭflaris sur la tero.

—Ŝajnas, ke aliaj objektoserĉantoj estis ĉi tie antaŭ ni, ŝi diris post momento. Ĉi tie ne troviĝas eĉ pinglo, tion mi asertas.

Ŝi sidiĝis denove sur la trono. Tuj kiam ŝi faris tion, ĉiuj infanoj reklinis siajn kapojn al la tero antaŭ ŝi.



—Ĉu vi perdis ion, Pipi diris. Ĉiukaze tio ne troviĝas tie, do vi povas same bone ekstari.

Bonŝance kapitano Ŝtrumpolonga vivis tiom longe sur la insulo, ke kelkaj el la kurekuredutoj lernis iom el lia lingvo. Ili kompreneble ne sciis, kion tiaj malfacilaj vortoj kiaj "poŝtrepaĝo" kaj "generalmajoro" signifas, sed parton ili tamen kaptis. La infanoj konis eĉ la plej kutimajn esprimojn, kiel "ne faru tion" kaj simile. Knabeto, nomata Momo, povis tre bone paroli la blankulan lingvon, ĉar li kutimis ofte sidi ĉe la kabanoj de la ŝipanoj kaj aŭskulti la babiladon de la viroj. Ĉarma nigra knabineto, nomata Moana, ankaŭ ne estis mallerta.

Nun Momo povis klarigi al Pipi, kial ili genukuŝas antaŭ ŝi.

—Vi esti tre bela blanka princino, li diris.

—Mi tute ne esti tre bela blanka princino, Pipi diris en kripligita kurekureduta lingvo. Mi estas entute nur Pipi Ŝtrumpolonga, kaj nun mi absolute ĉesos ĉi tiun tronadon.

Ŝi saltis de la trono. Kaj tion faris ankaŭ reĝo Efraimo, ĉar li jam finis la regadajn taskojn.

La suno malleviĝis kiel ruĝa globo en la Sudan Maron, kaj baldaŭ la ĉielo lumis de steloj. La kurekuredutoj ekbruligis grandegan kampofajron sur la regada placo, kaj reĝo Efraimo kaj Pipi kaj Tomi kaj Anjo kaj la ŝipanoj de "Hopetosa" sidiĝis sur la verda herbejo kaj rigardis, kiam la kurekuredutoj dancis ĉirkaŭ la fajro. La obtuza tondro de la tamburoj, la stranga danco, mirindaj odoroj el miloj da nekonataj floroj en la ĝangalo, la brilanta stela ĉielo super iliaj kapoj, ĉio sentiĝis stranga al Tomi kaj Anjo. La eternaj ondoj de la maro estis aŭdeblaj la tutan tempon kiel potenca akompanado.

—Mi kredas, ke ĉi tio estas tre bona insulo, Tomi diris pos-

te, kiam Pipi kaj Anjo kaj li estis enlitiĝintaj en sia hejmeca kabano sub la kokospalmo.

—Tion ankaŭ mi kredas, Anjo diris. Ĉu ne ankaŭ vi kredas tion, Pipi?

Sed Pipi kuŝis tie silente kun la piedoj sur la kuseno, laŭ sia kutimo.

—Aŭdu la ondegojn de la oceano, ŝi reve diris.

## Pipi edukas ŝarkon

**T**re frue la postan matenon Pipi kaj Tomi kaj Anjo rampis el la kabano. Sed ankoraŭ pli frue la kurekuredutinfanoj vekiĝis. Ili jam sidis tute ekscititaj sub la kokospalmo kaj atendis, ke la blankaj infanoj elvenu por ludi. Ili tre lerte parolis la kurekuredutan lingvon kaj ridis, tiel ke la dentoj brilis en iliaj nigraj vizaĝoj.

La tuta infanaro ekiris al la strando kun Pipi je la pinto. Tomi kaj Anjo saltis alte pro raviteco, kiam ili vidis la delikatan blankan sablon, en kiu oni povis fosi sin, kaj la bluan maron, kiu aspektis tre invita. Korala rifo iom ekster la insulo servis kiel ondorompilo. Tie interne la maro kuŝis kvietaj kaj spegule brila. Ĉiuj infanoj, kaj la blankaj kaj la nigraj, forĵetis siajn tukpecojn kaj kuris kriante kaj ridetante en la akvon.

Poste ili rulis sin sur la blanka sablo, kaj Pipi kaj Tomi kaj Anjo interkonsentis, ke estas pli bone havi nigran haŭton, ĉar aspektas tre amuze kun blanka sablo sur nigra fono. Sed kiam Pipi estis fosinta sin en la sablon ĝis la kolo, tiel ke nur la lentuga vizaĝo kaj la du ruĝaj harplektaĵoj elstaris, ankaŭ tio aspektis sufiĉe amuza. Ĉiuj infanoj sidiĝis apude por paroli kun ŝi.

—Rakontu pri blankaj infanoj en la lando de blankaj infanoj, Momo diris al la lentuga vizaĝo.

—Blankaj infanoj amas plutifikon, Pipi diris.

—Multipliko estas la vorto, Anjo diris. Kaj cetere, ŝi daŭrigis per vundita voĉo, oni ne povas ĝuste aserti, ke ni amas ĝin.

—Blankaj infanoj amas plutifikon, asertis Pipi obstine. Blankaj infanoj vere freneziĝas, se blankaj infanoj ne ĉiun tagon ricevas grandan porcion da plutifiko.

Ŝi ne kapablis daŭrigi en kripla kurekureduta lingvo, sed transiris al sia propra lingvo.

—Se vi aŭdas blankan infanon plori, vi povas esti certa, ke la lernejo forbrulis aŭ ke puriga ferio eksplodis aŭ ke la instruistino forĝesis doni al la infanoj hejmtaskon pri plutifiko. Kaj ni ne parolu pri tio, kiel estas, kiam ili ricevas someran ferion. Estas plorado kaj plendado, tiel ke vi dezirus esti mortinta, kiam vi aŭdas tion. Neniu okulo estas seka, kiam la lerneja pordego fermiĝas por la somero. Ĉiuj infanoj marŝas hejmen kantante obtuzajn funebrajn kantojn, kaj ili vere singultas pro ploro, kiam ili pensas pri tio, ke daŭros multajn monatojn, antaŭ ol ili denove ricevos iun plutifikon. Jes, certe senkompara mizero, Pipi diris kaj profunde ĝemspiris.

—Baf, Tomi kaj Anjo diris.

Momo ne tute komprenis, kio plutifiko estas kaj deziris pli detalan klarigon. Tomi ĝuste intencis klarigi tion, sed Pipi anticipis lin.

—Jes, aŭskultu, ŝi diris. Jen:  $7 \times 7 = 102$ . Amuze, ĉu ne?

—Certe ne estas 102, Anjo diris.

—Ne, ĉar  $7 \times 7$  estas 49, Tomi diris.

—Memoru, ke ni estas sur la kurekuredutinsulo nun, Pipi diris. Ĉi tie estas tute alia kaj multe pli fekunda klimato, do  $7 \times 7$  estas multe pli ĉi tie.

—Baf, Tomi kaj Anjo diris.

La kalkuleciono estis interrompita de kapitano Ŝtrumpo-

longa, kiu venis rakonti, ke li kaj ĉiuj ŝipanoj kaj ĉiuj kurekuredutoj intencas foriri al alia insulo por kelkaj tagoj por ĉasi aprojn. Kapitano Ŝtrumpolonga ĝuste sentis emon pri freŝa apraĵo. La kurekuredutinoj ankaŭ akompanos por timigi la aprojn per sovaĝaj krioj. Tio signifas, ke la infanoj restos solaj sur la Kurekuredutinsulo.

—Vi ja ne malĝojos pro tio, kapitano Ŝtrumpolonga diris.

—Divenu trifoje, Pipi diris. Tiun tagon, kiam mi aŭdos, ke iuj infanoj malĝojas, ĉar ili devas zorgi pri si mem sen plenkreskuloj, tiun tagon mi lernos la tutan plutifikan tabelon inverse, tion mi ĵuras.

—Tiel sonu la parolo, kapitano Ŝtrumpolonga diris.

Kaj li kaj ĉiuj liaj subuloj, armitaj per ŝildoj kaj lancoj, eniris siajn kanotegojn kaj pagajis for de la Kurekuredutinsulo.

Pipi formis la manojn je funelo kaj kriis post ili:

—Veturu en paco! Sed se vi ne revenos ĝis mia 50-jara jubileo, mi anoncserĉos vin per radio.

Kiam ili fariĝis solaj, Pipi kaj Tomi kaj Anjo kaj Momo kaj Moana kaj ĉiuj aliaj infanoj rigardis unu la alian kaj aspektis tre kontentaj. Jen ili havis tutan mirindan sudmaran insulon tute por si mem dum pluraj tagoj.

—Kion ni faru, Tomi kaj Anjo diris.

—Unue ni prenu la matenmanĝon de la arboj, Pipi diris.

Ŝi rapide surgrimpis palmon por kokosnuksoj. Momo kaj la aliaj kurekuredutinfanoj kolektis panfruktojn kaj bananojn. Pipi faris fajron sur la strando kaj super ĝi rostis la ravajn panfruktojn. Ĉiuj infanoj sidiĝis en rondo ĉirkaŭ ŝi, kaj ĉiuj ricevis solidan matenmanĝon, konsistanta el rostita panfrukto, kokosa lakto kaj bananoj.

Ne estis ĉevaloj sur la Kurekuredutinsulo, tial ĉiuj nigraj in-

fanoj estis tre interesitaj pri la ĉevalo de Pipi. Tiuj, kiuj kuraĝis, rajtis rajdi sur ĝi dum mallonga tempo. Moana diris, ke ŝi volonte iam veturos al la lando de la blankuloj, kie ekzistas tiaj strangaj bestoj.

Sinjoro Nilson nenie estis videbla. Li faris ekskurson en la ĝangalon, kie li trovis kelkajn parencojn.

—Kion ni faru nun, Tomi kaj Anjo diris, kiam ne plu estis amuze rajdi sur la ĉevalo.

—Blankaj infanoj volas vidi belajn grotojn, jes, ne, Momo demandis.

—Blankaj infanoj certege volas vidi belajn grotojn, jes, ja, Pipi diris.

La Kurekuredutinsulo estis koralinsulo. Ĉe la suda flanko altaj koralvandoj krutis en la maron, kaj tie estis la plej belaj grotoj, kiujn la maraj ondoj elfosis. Kelkaj situis tute ĉe la akvorando kaj estis plenaj je akvo, sed kelkaj situis pli supre en la klifaj vandoj kaj tie la kurekuredutinfanoj kutimis restadi kaj ludi. Ili estis aranĝintaj grandan provizon da kokosoj kaj aliaj frandaĵoj en la plej granda groto. Veni tien estis tuta entrepreno. Ili devis treti tre singarde laŭ la kruta monta vando kaj teni sin firme je ŝtonoj kaj rokaĵoj, kiuj elstaris. Aliel ili povus facile fali en la akvon. Kutime tio ne gravis. Nun estis tiel, ke ĝuste ĉi tie abundis ŝarkoj, kiuj tre ŝatas manĝi infanetojn. Malgraŭ tio la kurekuredutinfanoj kutimis amuzi sin per plonĝado por perlokonkoj, sed tiam iu devis ĉiam gardostari kaj kribi "ŝarko, ŝarko", tuj kiam la naĝilo de ŝarko estis videbla. Interne en la granda groto la kurekuredutinfanoj havis provizon da brilaj perloj, kiujn ili trovis en la perlokonkoj. Ili kutimis uzi ilin por globoludoj, kaj ili ne imagis, ke tiuj perloj valorus kiom ajn en la landoj de la blankuloj. Kapitano

Ŝtrumpolonga kutimis kunporti kelkajn perlojn jen kaj jen, kiam li veturis por aĉeti flartabakon. Por la perloj li ricevis amason da aĵoj, kiujn laŭ lia opinio liaj subuloj bezonas, sed entute li opiniis, ke liaj fidelaj subuloj bonfartas laŭ la nuna stato. Kaj la infanoj volonte povis daŭrigi globludi per la perloj.

Anjo proteste montris per ambaŭ manoj, kiam Tomi admonis ŝin grimpi laŭ la rokvando ĝis la granda groto. La unua peco ne estis malfacila. Tie estis sufiĉe larĝa teraso, sur kiu eblis iri, sed ĝi iom post iom mallarĝiĝis, kaj la lastajn metrojn ili devis grimpi kaj treti kie ajn eblis.

—Neniam, Anjo diris. Neniam!

Rampi laŭ rokovando, kie apenaŭ estas io, je kio teni sin, kaj dek metrojn sube havi maron plena je ŝarkoj, kiuj atendas, ke iu falu, tio ne estis io, kion Anjo konsideris vera amuzado.

Tomi estis ĉagrenita.

—Ho, oni neniam havu fratinojn en la Suda Maro, li diris, dum li rampis sur la rokvando. Rigardu min! Vi nur faru ĉi tiel...

Plop, sonis, kiam Tomi falis en la akvon. Anjo eligis altan krimon. Ankaŭ la kurekuredutinfanoj estis terurigitaj. "Ŝarko, ŝarko", ili kriis kaj fingromontris al la maro. Tie aperis naĝilo, kiu rapide direktis sin al Tomi

Plop, aŭdiĝis denove. Estis Pipi, kiu plongis. Ŝi atingis Tomin proksimume samtempe kun la ŝarko. Tomi kriegis pro timo. Li sentis la akrajn dentojn de la ŝarko skrapri kontraŭ sia kruro. Sed ĝuste tiam Pipi kaptis la sangavidan bestaĉon per ambaŭ manoj kaj levis ĝin super la akvosurfaco.

—Ĉu vi ne scias konduki dece, ŝi diris. La ŝarko ĉirkaŭrigar-

dis surprizita kaj kun malbona humoro. Ĝi ja ne povas spiri tre bone supre en la aero.

—Promesu neniam fari ion tian, kaj mi lasos vin, Pipi diris serioze. Kaj ŝi ĵetis per plena forto la ŝarkon longen for en la maron. Kaj ĝi rapide fornaĝis de tie kaj decidis kiel eble plej rapide foriri anstataŭe al la Atlantiko.

Dumtempe Tomi estis grimpinta sur rokŝtupeton kaj sidis tie tremanta en la tuta korpo. Lia kruro sangis. Tiam Pipi venis. Ŝi tre strange kondukis. Unue ŝi levis Tomin en la aeron kaj poste ĉirkaŭbrakis lin tiel forte, ke preskaŭ ĉiu aero eliris el li. Poste ŝi subite lasis lin kaj sidiĝis sur la roko. Ŝi kline kovris la vizaĝon per la manoj. Ŝi ploris. Pipi ploris. Tomi kaj Anjo kaj ĉiuj kurekuredutinfanoj rigardis ŝin kun surprizo kaj timego.

—Vi plori, ĉar Tomi preskaŭ esti manĝita, Momo proponis.

—Ne, Pipi diris kolerhumore kaj viŝis siajn okulojn. Mi plori, ĉar kompatinda ŝarketo ne ricevi matenmanĝon hodiaŭ.



## Pipi edukas Jimon kaj Bukon

**L**a dentoj de la ŝarko nur sukcesis grateti la haŭton de la kruro de Tomi, kaj kiam Tomi trankviliĝis, li daŭre volis grimpi al la granda groto. Tiam Pipi tordis ŝnuregon el hibiska basto kaj fikse ligis ĝin al ŝtono. Poste ŝi facile kiel ĉamo grimpis ĝis la groto kaj fiksitis tie la alian finaĵon de la ŝnurego. Kaj nun eĉ Anjo kuraĝis grimpi al la groto. Kiam oni havas fortan ŝnuregon, je kiu teni sin, tiam ne estas malfacile.

Estis mirinda groto. Ĝi estis tiel granda, ke ĉiuj infanoj facile trovis lokon.

—Ĉi tiu groto estas preskaŭ pli bona ol nia kava kverko hejme ĉe Vilao Vilaltao, Tomi diris.

—Ne, ne pli bona, sed same bona, diris Anjo, kiu sentis piketon en la koro je la penso pri la kverko tie hejme, kaj ne volis konsenti, ke io estus pli bona ol ĝi.

Momo montris al la blankaj infanoj, kiom da kokosoj kaj panfrukta kaĉo estis stokitaj en la groto. Ili povus loĝi tie tri plenajn semajnojn sen morti pro malsato. Moana venis al ili kaj montris kavan bambutubon, kiu estis tute plena je la plej mirindaj perloj. Ŝi donis al Pipi kaj Tomi kaj Anjo po manplendon da perloj.

—Belajn objektojn vi havas, kiam vi globludas en ĉi tiu lando, Pipi diris.

Estis agrable sidi en la malfermiĝo de la groto kaj rigardi la sunbrilan maron. Kaj estis tre agrable kuŝi sur la ventro kaj

kraĉi en la akvon. Tomi proklamis konkurson pri distancokraĉado. Momo estis vera spertulo pri kraĉado. Sed li tamen ne povis bati Pipin. Ŝi havis metodon elĵeti la kraĉaĵon inter la tranĉodontoj, kiun neniu povis imiti.

—Se pluvetas sur Novzelando hodiaŭ, Pipi diris, tio estas mia kulpo.

Tomi kaj Anjo malbone sukcesis.

—Blankaj infanoj ne povi kraĉi, Momo diris fiere. Li ne tute kalkulis Pipin al la blankaj infanoj.

—Ĉu ne la blankaj infanoj povas kraĉi, Pipi diris. Vi ne scias, pri kio vi parolas. Tion ili lernas en la lernejo de la unua klaso! Distancokraĉado, altokraĉado kaj kraĉado dumkura. Vi devus vidi la instruistaron de Tomi kaj Anjo, kiel ŝi povas kraĉi. Ŝi gajnis la unuan premion pri kraĉado dumkura. Kiam ŝi ĉirkaŭkuras kaj kraĉas, la tuta urbo ĝojkrias.

—Baf, Tomi kaj Anjo diris.

Pipi ŝirmis la okulojn per la mano kaj rigardis al la marsurfaco.

—Tie venas ŝipo, ŝi diris. Malgranda vaporŝipeto. Mi scivolas, kion ĝi volas fari ĉi tie.

Kaj ŝi vere rajtis esti scivolema. La vaporŝipo proksimiĝis per bona rapido al la Kurekuredutinsulo. Surŝipe estis, krom kelkaj nigraj maristoj, ankaŭ du blankuloj. Ili nomiĝis Jimo kaj Buko. Ili estis krudaj viroj kun malhelaj trajtoj kaj aspektis kiel veraj banditoj. Tion ili ankaŭ estis.

Iun fojon, kiam kapitano Ŝtrumpolonga estis en tiu butiko kaj aĉetis flartabakon, Jimo kaj Buko estis tie samtempe. Ili vidis kapitanon Ŝtrumpolongan meti kelkajn neordinare grandajn kaj belajn perlojn sur la mendotablon kaj ili aŭdis lin diri, ke sur la Kurekuredutinsulo la infanoj uzas tiujn per-

lojn, kiam ili globludas. Post tio ili havis nur unu celon, kaj tio estis veturi al la Kurekuredutinsulo kaj provi rabi amason da perloj. Ili sciis, ke kapitano Ŝtrumpolonga estas terure forta, kaj ili ankaŭ havis respekton por la ŝipanaro de "Hopetosa", tial ili intencis kapti la okazon, kiam ĉiuj viroj foriris por ĉasi. Nun la okazo venis. Kaŝitaj malantaŭ insulo en la proksimeco ili per lorno vidis kapitanon Ŝtrumpolongan kaj ĉiujn maristojn kaj ĉiujn kurekuredutojn pagaji for de la Kurekuredutinsulo. Ili nur atendis, ĝis la kanotoj venis kontentige ekster vido.

—Mallevu la ankron, Buko kriis, kiam la ŝipo venis tute proksime al la insulo. Pipi kaj ĉiuj infanoj silente rigardis ilin desupre el la groto. Ili mallevis la ankron. Jimo kaj Buko saltis en al barkon kaj remis al la bordo. Al la nigraj maristoj estis ordonite, ke ili restu surŝipe.

—Nun ni kaŝiru al la vilaĝo kaj surprizataku ilin, Jimo diris. Certe nur virinoj kaj infanoj estas hejme.

—Jes, Buko diris. Estis cetere tiom da virinoj en la kanotoj, ke mi supozas, ke nur la infanoj restas sur la insulo. Mi esperas, ke ili okupiĝas pri globludado, hahaha.

—Kial, Pipi kriis el la groto. Ĉu vi estas speciale amuzitaj de globludado? Mi tamen opinias, ke estas eĉ pli amuze kaprosalti.

Jimo kaj Buko surprizite turnis sin kaj ekvidis Pipin kaj ĉiujn infanojn elmeti la kapojn supre en la groto. Kontenta ridaĉo etendiĝis sur iliaj vizaĝoj.

—Tie ni havas la gebubojn, Jimo diris.

—Bonege, Buko diris. Ĉi tio estos simpla ludo por ni. Sed ili tamen decidis ruze procedi. Neniu povis scii, kie la infanoj havas siajn perlojn, tial ili tute ne venis al la Kurekuredutin-

sulo por kapti perlojn, sed nur por fari agrablan ekskurseton. Ili sentis sin varmaj kaj ŝvitaj, kaj Buko proponis, ke ili, por komenci, banu sin.

—Mi nur reremos al la ŝipo por preni niajn bankalsonojn, li diris.

Li faris tion. Dumtempe Jimo staris sola sur la strando.

—Ĉu estas bona banloko ĉi tie, li glate kriis al la infanoj.

—Tute perfekta, Pipi diris. Tute perfekta por ŝarkoj. Ili banas sin ĉi tie ĉiutage.

—Vi babilaĉas, Jimo diris, ĉi tie ni vidas neniujn ŝarkojn.

Sed li tamen iom maltrankviliĝis, kaj kiam Buko revenis kun la bankalsonoj, li rakontis al li, kion Pipi diris.

—Babilaĉo, Buko diris. Kaj li kriis al Pipi:

—Ĉu vi asertas, ke estas danĝere bani sin ĉi tie?

—Ne, Pipi diris. Tion mi neniam diris.

—Estas ja strange, Jimo diris. Ĉu vi ne diris, ke ekzistas ŝarkoj ĉi tie, ĉu?

—Jes, tion mi diris. Sed danĝere — ne, tion mi ne volas aserti, ke estas. Mia onklo banis sin ĉi tie lastjare.

—Jen vidu, Buko diris.

—Kaj onklo venis hejmen el la malsanulejo jam vendrede, Pipi daŭrigis. Kun la plej belaspektaj lignaj kruroj, kiuj iam troviĝis sur maljunulo.

Ŝi penseme kraĉis en la akvon.

—Mi do ne povas aserti, ke estas danĝere. Sed kelkaj braĵoj kaj kruroj kompreneble konsumiĝas, se oni banas sin ĉi tie. Sed tiel longe kiel la lignaj kruroj ne kostas pli ol unu kronon po paro, mi ne opinias, ke vi pro simpla avareco cedu pri fortiga bano.

Ŝi denove kraĉis.

—Cetere mia onklo estas infanece ravita pri siaj lignaj kru-  
roj. Li diras, ke ili estas netakseblaj, kiam li volas eliri por ba-  
tali.

—Ĉu vi scias, kion mi kredas, Buko diris. Mi kredas, ke vi  
mensogas. Via onklo ja devas esti maljuna viro. Li certe ne  
volas partopreni iujn batalojn.

—Ĉu li volas, Pipi akre kriis. Li estas la plej kolerema malju-  
nulo, kiu iam frapis sian kontraŭulon sur la kapo per ligna  
kruro. Li ne bonfartas, se li ne rajtas batali de mateno ĝis ves-  
pero. Alie li mordas sian propran nazon pro pura kolero.

—Vi babilaĉas, Buko diris. Oni ne povas mordi sian pro-  
pran nazon.

—Jes, certe, Pipi asertis. Li grimpis sur seĝon.

Buko cerbumis dum momento pri tio, sed poste li ekblas-  
femis kaj diris:

—Mi ne plu kapablas aŭskulti viajn sensencaĵojn. Venu,  
jimo, ni demetu niajn vestojn.

—Cetere mi diru al vi, Pipi diris, ke la onklo havas la plej  
longan nazon en la mondo. Li havas kvin papagojn, kaj ĉiuj  
kvin povas sidi unu apud la alia sur lia nazo.

Sed nun Buko vere koleriĝis.

—Ĉu vi scias, vi ruĝhara malfeliĉo, vi estas vere la plej men-  
sogema bubaĉo, kiun mi renkontis. Ĉu vi ne hontas? Ĉu vi  
vere volas kredigi al mi, ke kvin papagoj povas sidi en vico sur  
la nazo de via onklo. Konfesu, ke estas mensogo!

—Jes, Pipi diris malgaje. Jes, estas mensogo.

—Jen vi vidas, Buko diris. Ĉu mi ne diris tion?

—Estas abomena, terura mensogo, Pipi diris eĉ pli malgaje.

—Jes, tion mi tuj komprenis, Buko diris.

—Ĉar la kvina papago, Pipi kriis kaj amare ekploris, la kvina papago devas stari sur unu piedo.

—Iru arbaren, Buko diris. Kaj li kaj Jimo iris malantaŭ arbuston por alivesti sin.

—Pipi, vi ja ne havas onklon, Anjo diris per riproĉa voĉo al Pipi.

—Ne, Pipi diris gaje. Ĉu oni devas havi?

Buko unua surhavis la bankalsonon. Li elegante plonĝis el roko en la maron kaj naĝis eksteren. La infanoj en la groto rigardis kun streĉa intereso. Tiam ili vidis naĝilon de ŝarko, kiu post momento fulmis super la akvosurfaco.

—Ŝarko, ŝarko, Momo kriis.

Buko, kiu kun granda plezuro movis sin en la akvo, turnis la kapon kaj ekvidis la teruran rabobeston veni kontraŭ sin.

Certe neniam ekzistis iu, kiu naĝis tiel rapide, kiel Buko faris nun. En du ruĝaj sekundoj li atingis la bordon kaj kuregis el la akvo. Furioza kaj timigita li estis, kaj ŝajnis, ke li opinias, ke estas la kulpo de Pipi, ke estas ŝarkoj en la akvo.

—Ĉu vi ne hontas, bubinaĉo, li kriis. La maro ja estas plena je ŝarkoj.

—Ĉu mi asertis ion alian, Pipi diris kaj dolĉe oblikvigis sian kapon. Mi ja ne ĉiam mensogas, vi sciu.

Jimo kaj Buko iris malantaŭ la arbedon kaj denove surpronis la vestojn. Ili pensis, ke nun estas tempo komenci pensi pri la perloj. Neniu povus scii, kiom longe kapitano Ŝtrumpolonga kaj la aliaj intencas foresti.

—Aŭskultu, infanetoj, Buko diris. Mi aŭdis iun diri, ke estas bona perloserĉado en ĉi tiu regiono. Ĉu vi scias, ĉu estas vere?

—Ĉu estas, Pipi diris. Perlokonkoj tintas ĉirkaŭ la piedoj,

kie ajn oni promenas tie sur la marfundo. Iru tien rigardi kaj vi vidos.

Sed Buko ne volis.

—Estas grandaj perloj en ĉiu konko, Pipi diris. Proksimume kiel ĉi tiu.

Ŝi montre etendis grandegan brilantan perlon.

Jimo kaj Buko estis tiel ekscititaj, ke ili apenaŭ povis stari senmovaj.

—Ĉu vi havas pli da tiaj, Jimo diris. Ni volus aĉeti ilin de vi.

Tio estis mensogo. Jimo kaj Buko ne havis monon por aĉeti iujn perlojn. Ili volis nur trompe akiri ilin.

—Jes, ni havas certe almenaŭ kvin, ses litrojn ĉi tie en la groto, Pipi diris.

Jimo kaj Buko ne povis kaŝi sian ravitecon.

—Bonege, Buko diris. Venu ĉi tien kun ili, ni aĉetos ĉiujn.

—Tute ne, Pipi diris. Kion la kompatindaj infanoj poste uzu por globludado, ĉu vi pensis pri tio?

Longdaŭra rezonado estis necesa, antaŭ ol Jimo kaj Buko komprenis, ke ne estas eble altrompi la perlojn. Sed tion, kion ili ne povas ricevi per ruzo, ili decidis ricevi perforte. Nun ili ja sciis, kie la perloj estas. Nur restis la tasko grimpi al la groto kaj preni ilin.

Grimpi al la groto, jes, restis nur tio! Dum la rezonado Pipi estis singarde dehokiginta la hibiskan ŝnuregon. Ĝi estis nun sub bona gardo en la groto.

Jimo kaj Buko ne opiniis, ke estas alloge provi grimpi al la groto. Sed evidente ne estis alia maniero.

—Vi faru, Jimo, Buko diris.

—Ne, vi faru, Buko, Jimo diris.

—Vi faru, Jimo, Buko diris. Li estis pli forta ol Jimo. Jimo do

komencis grimpi. Li malespere kaptis ĉiujn elstarajn partojn, kiujn li povis atingi. Malvarma ŝvito fluis laŭ lia dorso.

—Antaŭ ĉio vi firme tenu vin, por ke vi ne defalu, Pipi diris kuraĝige.

Tiam Jimo defalis. Buko kriis kaj blasfemis sur la strando. Ankaŭ Jimo kriis, ĉar li vidis du ŝarkojn, kiuj direktis sin al li. Kiam ili ne estis pli ol unu metron for de li, Pipi ĵetis kokoson ĝuste antaŭ la nazon de ili. Tio timigis ilin por tiel longa tempo, ke Jimo havis tempon naĝi al la strando kaj rampi sur la ŝtupeton. La akvo fluis de liaj vestoj, kaj li aspektis kompatinda. Buko insultis lin.

—Faru mem, kaj vi vidos, kiel facile estas, Jimo diris.

—Jes, mi vere montros al vi, kiel oni procedu, Buko diris kaj komencis grimpi.

Ĉiuj infanoj rigardis lin. Anjo preskaŭ ektimis, kiam li pli kaj pli proksimiĝis.

—Aj, aj, ne paŝu tie, ĉar tiam vi defalos, Pipi diris.

—Kie, Buko demandis.

—Tie, Pipi diris kaj fingromontris. Buko rigardis malsupren al siaj piedoj.

—Multaj kokosoj konsumiĝos en ĉi tiu maniero, Pipi diris momenton pli poste, kiam ŝi estis enĵetinta unu por malhelpi al la ŝarkoj formanĝi Bukon, kiu mizera baraktis en la akvo. Sed el la akvo li venis, furioza kiel vespo, kaj li ne estis time-ma. Li tuj komencis novan grimpadon, ĉar li decidis, ke li atingos la groton kaj kaptos la perlojn.

Ĉi tiun fojon li pli bone sukcesis. Kiam li atingis la malfermiĝon de la groto, li triumfe kriis:

—Nun, gebuboj, mi repagos al vi!



Tiam Pipi etendis sian montrofringron kaj puŝetis lian ventron.

Plop, sonis.

—Vi povus ja esti kunpreninta la kokoson mem, kiam vi veturis, Pipi kriis post li, dum ŝi trafis la nazon de impertinenta ŝarko. Sed venis pli da ŝarkoj kaj ŝi estis devigata ĵeti pli da kokosoj. Unu el ili trafis la kapon de Buko.

—Pro ĉielo, ĉu estis vi, Pipi diris, kiam Buko ekkriis. De ĉi-supre vi fakte similas grandan abomenan ŝarkon.

Jimo kaj Buko nun decidis elatendi la infanojn.

—Kiam ili estos malsataj, ili devos retiriĝi de tie, Buko diris malafable. Kaj tiam ili spertos ion alian.

Li kriis al la infanoj:

—Mi kompatas vin, se vi devos sidi tie en la groto, ĝis vi malsatmortos.

—Vi havas bonan koron, Pipi diris. Sed vi ne bezonas maltrankvili pri la plej proksimaj dek kvar tagoj. Poste ni eble devos iom porciigi la kokosojn.

Ŝi frakasis grandan kokoson, eltrinkis la lakton kaj manĝis la bongustan internaĵon.

Jimo kaj Buko blasfemis. La suno estis subironta kaj ili komencis prepari sin por tranokti sur la strando. Ili ne kuraĝis remi al la vaporŝipo por dormi tie, ĉar tiam la infanoj estus povintaj forgrimpi kun ĉiuj perloj. Ili kuŝiĝis sur la malmola rokogrundo en siaj malsekaj vestoj. Estis tre malagrabla.

Supre en la groto ĉiuj infanoj sidis kun brilantaj okuloj kaj manĝis kokosojn kaj dispremitajn panfruktojn. Gustis tre bone kaj ĉio estis streĉa kaj agrabla. Jen kaj jen ili elmetis la kapon kaj rigardis al Jimo kaj Buko. Nun estis tiel mallume, ke

ili nur malklare povis vidi ilin sur la rokoŝtupo. Sed ili povis aŭdi ilin blasfemi tie malsupre.

Subite venis pluvego de la intensa speco, kiu okazas en la tropikoj. Lago da pluvo torentis el la ĉielo. Pipi elmetis la ekstreman pinton de la nazo el la groto.

—Ne ekzistas iuj, kiuj havas tian bonŝancon kiel vi, ŝi kriis al Jimo kaj Buko.

—Kion vi volas diri per tio, Buko esperplene diris. Li pensis, ke la infanoj nun pentis sin kaj volas doni al ili la perlojn. Kion vi volas diri per tio, ke ni havas bonŝancon?

—Jes, imagu nur, kia eterna bonŝanco, ke vi jam estas malsekegaj, jam antaŭ ol ĉi tiu pluvego venis. Alie vi certe fariĝus malsekegaj en ĉi tiu vetero.

Ili aŭdis iun blasfemi malsupre sur la rokoŝtupo, sed ne estis eble decidi, ĉu estas Jimo aŭ Buko.

—Bonan nokton, bonan nokton kaj dormu bone, Pipi diris. Ĉar tion ni intencas fari nun.

Ĉiuj infanoj ekkuŝis sur la planko de la groto. Tomi kaj Anjo kuŝis plej proksime al Pipi kaj tenis ŝian manon. Ili kuŝis tre agrable. Estis tute konvene varme kaj agrable en la groto. Ekstere la pluvo susuris.

## Pipi laciĝas je Jimo kaj Buko

**L**a infanoj dormis bone la tutan nokton. Tion ne fari Jimo kaj Buko. Ili nur blasfemis pri la pluvo, kaj kiam ĉesis pluvi, ili transiris al kverelado, kies kulpo estas, ke ili ne povis kapti la perlojn kaj kiu efektive eltrovis la stultan ideon, ke ili veturu al la Kurekuredutinsulo. Sed kiam la suno leviĝis kaj sekigis iliajn malsekajn vestojn kaj la gaja vizaĝo de Pipi estis elmetata el la groto kaj salutis bonan matenon, ili decidis pli ol iam provi kapti la perlojn kaj forveturi de tie kiel riĉaj viroj. Ili nur ne povis elkalkuli, kiel ili procedu.

Dumtempe la ĉevalo de Pipi komencis demandi sin, kien Pipi kaj Tomi kaj Anjo estis irintaj. Sinjoro Nilson estis reveninta de sia parencokunveno en la ĝangalo kaj li demandis la samon. Li ankaŭ pripensis, kion Pipi diros, kiam ŝi ekvidos, ke li perdis sian pajlan ĉapelon.

Sinjoro Nilson saltis kaj eksidis sur la vosto de la ĉevalo kaj la ĉevalo fortrotis por serĉi Pipin. Iom post iom ĝi trovis la vojon al la suda flanko de la insulo. Kaj tie ĝi vidis Pipin elmeti la kapon el groto. Ĝi gaje henis.

—Vidu, Pipi, tie via ĉevalo venas, Tomi kriis.

—Kaj Sinjoro Nilson estas sur la vosto, Anjo kriis.

Jimo kaj Buko aŭdis tion. Ili aŭdis, ke la ĉevalo, kiu venis tie laŭ la strando, apartenas al Pipi, tiu ruĝhara malfeliĉo supre en la groto.

Buko aliris kaj kaptis la ĉevalon je la kolharoj.

—Aŭdu, vi monstreto, li kriis al Pipi, nun mi mortbatos vian ĉevalon.

—Ĉu vi mortbatos mian ĉevalon, kiun mi tre forte amas, Pipi diris. Mian bonan afablan ĉevaleton. Tion vi ne povas celi.

—Jes, mi ja estas devigata al tio, Buko diris. Se vi ne volas veni ĉi tien kaj doni al ni ĉiujn perlojn. Ĉiujn, notu tion! Alkaze mi mortbatos la ĉevalon nun en ĉi tiu momento.

Pipi serioze rigardis lin.

—Bonvolu, ŝi diris. Mi petas vin tiel bele kiel mi iam ajn povas — ne mortbatu mian ĉevalon kaj lasu al la infanoj iliajn perlojn.

—Vi aŭdis, kion mi diris, Buko diris. Ĉi tien la perlojn tuj! Alimaniere ...

Kaj li diris per mallaŭta voĉo al Jimo:

—Nur atendu, ĝis ŝi venis kun la perloj. Tiam mi batos ŝin flava kaj verda kiel danko por ĉi tiu pluvvetera nokto. Kaj la ĉevalon ni kunprenu surŝipen kaj vendu sur iu alia insulo.

Li kriis al Pipi.

—Nu, kiel estas? Ĉu vi venos aŭ ne?

—Jes, mi do venos, Pipi diris. Sed ne forgesu, ke vi mem petis pri tio.

Ŝi saltis tre facile sur la rokŝtupetoj, kiel se estus la plej ebena promenovojo, kaj fine saltis sur la rokŝtupon al Buko kaj Jimo kaj la ĉevalo. Ŝi haltis antaŭ Buko. Tie ŝi staris, malgranda kaj maldika, vestita per la tuketo ĉirkaŭ la talio kaj kun du ruĝaj harplektaĵoj, kiuj montris rekte eksteren. Ŝiaj okuloj brilis per danĝera flamo.

—Kie vi havas la perlojn, Buko kriis.

—Ne estos iuj perloj hodiaŭ, Pipi diris. Vi kaprosaltos anstataŭe.

Tiam Buko eligis hurlon, kiu tremigis Anjon supre en la groto.

—Nun mi vere mortbatos kaj vin kaj la ĉevalon, li kriis, kaj li alkuris al Pipi.

—Malrapide en la deklivoj, mia bonulo, Pipi diris. Ŝi prenis lin je la talio kaj ĵetis lin tri metrojn en la aeron. Li batis sin iom forte kontraŭ la roko, kiam li falbruis. Tiam Jimo ekagis. Li direktis teruran frapon kontraŭ Pipi, sed ŝi flankensaltis kun kontenta rido. Kaj la sekundon poste ankaŭ Jimo flugis en la direkton de la matena ĉielo. Kaj tie nun Jimo kaj Buko sidis sur la roko kaj ĝemegis. Pipi aliris kaj kaptis ilin per po unu mano.

—Oni ne rajtas esti tiel globludema, kiel vi ŝajnas esti, ŝi diris. Devas esti iu modesteco en la plezuravido.

Ŝi portis ilin malsupren al la barko kaj enĵetis ilin.

—Nun veturu hejmen kaj petu vian patriron, ke vi ricevu kvin monerojn por ŝtongloboj, ŝi diris. Mi certigas al vi, ke ili estas same bone uzeblaj.

Mallongan momenton poste la vaporŝipo pufis sian vojon for de la Kurekuredutinsulo. Post tio ĝi neniam estis videbla sur tiuj marvojoj.

Pipi karesis sian ĉevalon. Sinjoro Nilson saltis sur ŝian ŝultron. Kaj malantaŭ la plej ekstrema pinto de la insulo longa vico da kanotoj aperis. Estis kapitano Ŝtrumpolonga kaj lia societo, kiu revenis hejmen post sukcesa ĉaso. Pipi kriis kaj mansvingis al ili, kaj ili salutis per la pagajoj.

Poste Pipi rapide remetis la ŝnuregon, por ke Tomi kaj Anjo kaj la aliaj povu sendanĝere lasi la groton. Kaj kiam la ka-

notoj momenton poste albordiĝis en la golfeto apud "Hoptosa", la tuta infanaro staris tie akceptante.

Kapitano Ŝtrumpolonga karesis Pipin.

—Ĉu ĉio estis trankvila, li demandis.

—Ĉio trankvila, Pipi diris.

—Sed Pipi, ja ne estis, Anjo diris. En la vero preskaŭ okazis akcidentoj.

—Ho jes, tion mi forgesis, Pipi diris. Trankvile certe ne estis, paĉjo Efraimo. Tuj, kiam vi turnas al mi la dorson, aferoj okazas.

—Nu, sed infaneto, kio okazis, kapitano Ŝtrumpolonga diris maltrankvile.

—Io terura, Pipi diris. Sinjoro Nilson perdis sian pajlan ĉapelon.

## Pipi forlasas la Kurekuredutinsulon

**M**irindaj tagoj sekvis, mirindaj tagoj en varma, dolĉa mondo, plena je suno kaj brilanta blua akvo kaj odorantaj floroj.

Tomi kaj Anjo nun estis tiel brunaj, ke oni preskaŭ ne povis vidi diferencon inter ili kaj la kurekuredutinfanoj. Kaj Pipi ricevis lentugojn sur ĉiu surfaceto de la vizaĝo.

—Ĉi tiu vetureto fariĝos vere beliga kuraco por mi, ŝi diris kontente. Mi estas pli lentuga kaj bela ol iam. Se daŭros ĉi tiel, mi estos tute nerezistebla.

Momo kaj Moana kaj ĉiuj kurekuredutinfanoj fakte jam opiniis, ke Pipi jam estas nerezistebla. Ili neniam tiel amuziĝis kiel nun, kaj ili same multe ŝatis Pipin kiel Tomi kaj Anjo faris. Jes, ili kompreneble ankaŭ ŝatis Tomin kaj Anjon, kaj Tomi kaj Anjo reciprokis la senton. Ankaŭ pro tio ili ĉiuj havis tre grandan plezuron kune, kaj ili ludis kaj ludis kaj ludis la tutajn tagojn. Ofte ili estis en la groto. Pipi alportis tien lankovrilojn, kaj kiam ili deziris, ili povis tranokti tie kaj esti pli komfortaj ol tiun unuan nokton. Ŝi ankaŭ faris ŝnurŝtuparon, kiu atingis la akvosurfacon sub la groto, kaj ĉiuj infanoj grimpis supren malsupren sur la ŝnurŝtuparo kaj banis sin kaj plaŭdis el tuta koro. Jes ja, ili povis sekure bani sin tie nun. Pipi baris grandan regionon per reto, tiel ke la ŝarkoj ne povis atingi ilin. Estis tre amuze naĝi internen kaj esksteren en tiuj grotoj, kiuj estis plenaj je akvo. Kaj eĉ Tomi kaj Anjo ler-

nis plonĝi por perlokonkoj. La unua perlo, kiun Anjo trovis, estis granda, bela, rozkolora. Ŝi decidis kunpreni ĝin hejmen kaj muntigi ĝin en ringon, kiun ŝi havos kiel memoraĵon de la Kurekuredutinsulo.

Foje ili ludis, ke Pipi estas Buko, kiu provas eniri la groton por ŝteli perlojn. Tiam Tomi suprentiris la ŝnurŝtupareton kaj Pipi devis suprengrimpi sur la rokovando kiel ajn ŝi povis. Ĉiuj infanoj kriis "Buko venas, Buko venas", kiam ŝi enmetis la kapon en la groton, kaj laŭvice ili rajtis fingropuŝi ŝian ventron, tiel ke ŝi renverse falis en la maron. Kaj tie malsupre ŝi ĉirkaŭplaŭdis kun nur la piedoj aperantaj super la akvo, kaj la infanoj ridis, tiel ke ili preskaŭ falis el la groto.

Kiam la estado tie tedis ilin, ili povis esti en sia bambua domo. Pipi kaj la infanoj kunhelpe konstruis ĝin, kvankam Pipi faris la plejmulton. Ĝi estis granda kaj tute kvadrata kaj konstruita el maldikaj bambuaj kanoj, kaj oni povis ĉirkaŭgrimpi en ĝi kaj sur ĝi tute laŭplaĉe. Tuj apud la domo staris alta kokospalmo. Pipi estis hakinta ŝtupojn en la palmo, tiel ke oni povis paŝi ĝis la pinto. De tie supre ili havis belan panoramon. Inter du aliaj palmoj Pipi estis metinta balancilon el hibiska basto. Ĝi estis vere bonega. Se oni balancis tre forte, kaj en la plej alta rapido elĵetis sin, oni falis en la akvon. Pipi balancis tiel terure alten, ke ŝi flugis longe for en la akvon, kaj ŝi diris, ke "iun belan tagon mi certe falaĉos en Aŭstralion, kaj tiam ne estos amuze por tiu, kiu ricevos min sur la kapon".

La infanoj ankaŭ ekskursis en la ĝangalon. Estis alta monto tie kaj akvofalo, kiu ĵetis sin laŭ montkrutaĵo. Pipi estis decidinta, ke ŝi veturos laŭ la akvofalo en barelo, kaj ŝi ankaŭ faris tion. Ŝi kunportis unu el la bareloj de "Hopetosa", kaj en ĝin



ŝi enrampis. Momo kaj Tomi fermis la kovrilon kaj kunhelpis puŝi la barelon en la akvofalon. Ĝi saltadis laŭ la falo en granda rapideco, kaj fine ĝi frakasiĝis. Ĉiuj infanoj vidis Pipin malaperi en la akvoamasoj, kaj ili ne kredis, ke ili denove iam vidos ŝin. Sed subite ŝi ekaperis kaj suriris la bordon kaj diris:

—Ili donas relative grandan rapidecon, ĉi tiuj akvobareloj.

Jes, tiel pasis la tagoj, unu post la alia. Sed baldaŭ la pluvsezono estis venonta, sed tiam kapitano Ŝtrumpolonga kutimas enŝlosi sin en sia kabano kaj cerbumi pri la vivo, kaj li timis, ke tiam Pipi ne sentos sin hejme sur la Kurekuredutinsulo. Tomi kaj Anjo komencis ĉiam pli ofte pripensi kiel statas pri paĉjo kaj panjo tie hejme. Ili ankaŭ volonte atingus la hejmon antaŭ la kristnaska vespero. Tial ili ne tiom malĝojis, kiom oni povus kredi, kiam Pipi iun matenon diris:

—Tomi kaj Anjo, kiel estus veni hejmen al Vilao Vilaltao denove por kelka tempo?

Por Momo kaj Moana kaj la aliaj kurekuredutinfanoj ja estis malgaja tago, kiam ili vidi Pipin kaj Tomin kaj Anjon surŝipiĝi sur "Hopetosa" por veli hejmen. Sed Pipi promesis, ke ili ofte, ofte revenos al la Kurekuredutinsulo. La kurekuredutinfanoj estis portintaj florkronojn el blankaj floroj, kiujn ili pendigis adiaŭe ĉirkaŭ la koloj de Pipi kaj Tomi kaj Anjo. Kaj ilia adiaŭa kanto flugis tre plende super la akvon post la forglitanta ŝipo. Ankaŭ kapitano Ŝtrumpolonga staris sur la bordo. Li devis resti por regi. Anstataŭe Fridolfo surprenis la taskon veturigi la infanojn hejmen. Kapitano Ŝtrumpolonga purigis la nazon pripense per sia granda flartabaka naztuko kaj adiaŭis mansvinge. Pipi kaj Tomi kaj Anjo ploris, tiel ke la larmoj ŝprucis el la okuloj, kaj ili svingis kaj svingis la manojn

al kapitano Ŝtrumpolonga kaj la nigraj infanoj tiel longe, kiel ili povis vidi ilin.

Ili havis eksterordinare favoran venton dum la tuta hejmenveturo.

—Estas plej bone, ke ni elprenu la kamizolojn en bona tempo antaŭ la Norda Maro, Pipi diris.

—Uŝ, jes, Tomi kaj Anjo diris.

Baldaŭ montriĝis, ke "Hopetosa", malgraŭ la favora vento ne povos atingi la hejmon antaŭ kristnasko. Tomi kaj Anjo tre malĝojis, kiam ili ekaŭdis tion. Imagu, neniuj kristnasko kaj neniuj kristnaskaj donacoj!

—Ni povus do same bone esti sur la Kurekuredutinsulo, Tomi diris ĉagrenite.

Anjo pensi pri panjo kaj paĉjo kaj pensis, ke ŝi tamen volonte venos hejmen. Sed estis malĝoje, ke ili perdos la kristnaskon, pri tio Tomi kaj Anjo konsentis.

Malluman vesperon komence de januaro Pipi kaj Tomi kaj Anjo denove ekvidis la lumojn de la urbeto brili renkonte. Ili estis hejme.

—Ĉa, tio estis tiu Sudmara veturo, Pipi diris, kiam ŝi pasis la pasponteton kun la ĉevalo.

Neniu estis surloke por renkonti ilin, ĉar neniuj povis scii, kiam ili hejmenvenos. Pipi levis Tomin kaj Anjon kaj Sinjoron Nilson sur la ĉevalon, kaj ili forrajdis en la direkton de Vilao Vilaltao. La ĉevalo devis bone troti, ĉar la stratoj kaj vojoj estis plenaj je neĝo. Tomi kaj Anjo rigardis antaŭen tra la hirliĝanta neĝo. Baldaŭ ili estos ĉe panjo kaj paĉjo. Kaj subite ili sentis, ke ili sopiras al ili. En la domo de familio Settergren lumis tre invite, kaj tra la fenestro oni povis vidi la gepatrojn de Tomi kaj Anjo sidi ĉe la manĝotablo.

—Tie estas panjo kaj paĉjo, Tomi diris, kaj li sonis kontenta, kiam li diris tion.

Sed Vilao Vilaltao kuŝis tute malluma kaj kovrita per neĝo.

Anjo fariĝis tre senespera je la penso, ke Pipi eniros tien sola.

—Kara Pipi, ĉu vi ne povas loĝi ĉe ni la unuan nokton, ŝi diris.

—Ho ne, Pipi diris kaj plonĝis en la neĝon ekster la barilpordo. Nun mi devos unue iom ordigi en Vilao Vilaltao. Ŝi pluen tretis tra la profundaj neĝamasoj, kiuj atingis ŝin ĝis la ventro. La ĉevalo trotis post ŝi.

—Jes, sed imagu, kiel malvarme estas tie, Tomi diris, kiam oni ne hejtis dum longa tempo.

—Baf, Pipi diris. Se nur la koro estas varma kaj batas, kiel ĝi devas, oni ne frostas.

## Pipi Ŝtrumpolonga ne volas fariĝi granda

**H**o, kiel la panjo kaj paĉjo de Tomi kaj Anjo karesis siajn infanojn, kaj kiel ili kisis ilin kaj servis bongustan vespermanĝon al ili kaj aranĝis iliajn litojn, kiam ili enlitiĝis. Kaj ili sidis longe, longe sur al litorando ĉe ili kaj aŭskultis la rakontojn pri ĉio rimarkinda, kion ili travivis sur la Kurekuredutinsulo. Ili ĉiuj tre ĝojis. Nur unu afero estis malĝojiga, kaj tio estis pri la kristnasko. Tomi kaj Anjo ne volis diri al sia patrino, ke ili estas malĝojaj, ke ili malkaptis la kristnaskon kaj la kristnaskajn donacojn, sed tiel tamen estis. Sentiĝis tre nekutime reveni, kiel ĉiam, kiam oni estas vojaĝinta, kaj estus tre granda helpo, se estus kristnaska vespero, kiam ili revenis.

Iom doloris al Tomi kaj Anjo, kiam ili pensis pri Pipi. Nun ŝi kompreneble kuŝis tie en Vilao Vilaltao kun la piedoj sur la kapkuseno, kaj neniu estis ĉe ŝi por envolvi ŝin. Ili decidis iri al ŝi kiel eble plej baldaŭ la postan tagon.

Sed la postan tagon la patrino ne volis lasi ilin iri, ĉar ŝi ne vidis ilin dum tiom longa tempo, kaj cetere ilia avino venis por tagmanĝi kaj deziri bonvenon hejmen al la infanoj. Tomi kaj Anjo maltrankvile cerbumis, kion Pipi entreprenas la tutan tagon, kaj kiam mallumiĝis vespere, ili ne plu eltenis.

—Kara panjo, ni devas fari viziton al Pipi, Tomi diris.

—Jes, ekkuru do, sinjorino Settergren diris. Sed ne restu tro longe.

Kaj Tomi kaj Anjo ekkuris.

Kiam ili venis al la barilpordo de Vilao Vilaltao, ili haltis kaj nur rigardis. Aspektis ekzakte kiel kristnaska bildkarto. La tuta vilao kuŝis tie mole envolvita en neĝo kaj lumis gaje el ĉiuj fenestroj. Sur la verando brulis torĉo, kiu ĵetis sian lumon longe super la blankan neĝokovrilon ekstere. Vojo estis zorge fosita ĝis la verando, kaj tial Tomi kaj Anjo ne bezonis vadi en la neĝamasoj.

Ĝuste kiam ili piedfrape forigis la neĝon sur la verando, la pordo malfermiĝis kaj tie staris Pipi.

—Bonan kristnaskon en ĉi tiu kabano, ŝi diris. Poste ŝi pelis ilin en la kuirejon. Kaj tie, tie ja staris kristnaska arbo! La kandeloj estis lumigitaj kaj dek sep ŝprucfajraĵoj brulis, tiel ke krakis kaj disigis hejman odoron ĉirkaŭ si. Sur la tablo estis servita kristnaska kaĉo kaj ŝinko kaj kolbaso kaj ĉiuspeca kristnaska manĝaĵo; jes, eĉ spickukaj figuroj kaj benjetoj. En la forno flamis la fajro, kaj ĉe la lignujo staris la ĉevalo kaj skrapis ĝentile per la piedo. Sinjoro Nilson saltis tien reen en la piceo inter la ŝprucfajraĵoj.

—La intenco estis, ke li estu kristnaska anĝelo, Pipi serioze diris, sen estas neeble, ke li sidu senmove.

Tomi kaj Anjo staris tute mutaj.

—Ho, Pipi, Anjo diris, kiel mirinde! Kiel vi havis tempon fari ĉion ĉi?

Tomi kaj Anjo subite sentis sin ege ĝojaj kaj feliĉaj.

—Mi opinias, ke estas bone, ke ni estas hejme en Vilao Vilaltao denove, Tomi diris.

Ili sidiĝis ĉirkaŭ la tablo kaj manĝis amason da ŝinko kaj rizokaĉo kaj kolbaso kaj spickukoj, kaj ili opiniis, ke ili pli bongustas ol bananoj kaj panfrukto.

—Kiel bonege, Anjo diris. Jen ni tamen havas kristnaskon. Sed sen kristnaskaj donacoj, kompreneble.

—Ho, jen vi diris vorton, Pipi diris. Mi kaŝis viajn kristnaskajn donacojn. Ilin vi devos serĉi mem.

Tomi kaj Anjo fariĝis tute ruĝaj en la vizaĝo pro ekscito, ili leviĝis kaj komencis serĉi. En la lignujo Tomi trovis grandan pakaĵon kun la surskribo "TOMI". En ĝi estis bela farboskatolo. Sub la tablo Anjo trovis pakaĵon kun sia nomo, kaj en la pakaĵo estis bela ruĝa sunombrelo.

—Ĝin mi povos kunpreni al la Kurekuredutinsulo venontfoje, kiam ni veturos tien, diris Anjo.

Tute sub la kamenkapuĉo kuŝis du pakaĵoj. Estis malgranda aŭto por Tomi en unu kaj pupteleraro por Anjo en la alia. En la vosto de la ĉevalo pendis eteta pakaĵo, kaj ĝi enhavis horloĝon, kiun Tomi kaj Anjo havu en sia infanĉambro.

Kiam ili trovis ĉiujn siajn kristnaskajn donacojn, ili forte ĉirkaŭbrakis Pipin danke. Ŝi staris ĉe la kuireja fenestro kaj rigardis ĉiun neĝon tie en la ĝardeno.

—Morgaŭ ni konstruos grandan domon el neĝo, ŝi diris. Kaj ni havu kandelojn, kiuj brulu en ĝi vespere.

—Ho jes, ni faru tion, Anjo diris kaj sentis sin pli kaj pli kontenta, ke ŝi venis hejmen.

—Mi miras, ĉu eblus konstrui skideklivon de la tegmento al la neĝamaso tie sube, Pipi diris. Mi intencas instrui al la ĉevalo skii. Sed mi ne povas eltrovi, ĉu ĝi bezonas kvar skiojn aŭ nur du.

—Ni tre amuziĝos morgaŭ, Tomi diris. Kia bonŝanco, ke ni venis hejmen meze de la kristnaska libertempo.

—Ni ĉiam amuziĝos, Anjo diris. Ĉi tie en Vilao Vilaltao kaj sur la Kurekuredutinsulo kaj ĉie.

Pipi kapjesis. Ĉiuj tri rampis sur la kuirejan tablon. Subite malgaja ombro flugis sur la vizaĝon de Tomi.

—Mi volas neniam fariĝi granda, li diris decide.

—Ankaŭ mi ne, Anjo diris.

—Ne, estas nenio pridiskutinda, Pipi diris. Plenkreskuloj neniam amuziĝas. Ili nur havas amason da teda laboro kaj idiotajn vestojn kaj dornokalojn kaj kominuman imposton.

—Komunuma imposto estas la nomo, Anjo diris.

—Jes, sed ĝi estas tamen la sama rubaĵo, Pipi diris. Kaj ili estas plenaj da superstiĉo kaj frenezaĵoj. Ili kredas, ke okazos granda akcidento, se ili hazarde metas la tranĉilon en la buŝon, kaj tiel plu.

—Kaj ili ne kapablas ludi, Anjo diris. Hu, ke oni devas fariĝi granda!

—Kiu diris, ke oni devas fariĝi, Pipi demandis. Se mi ne erare memoras, mi ie havas kelkajn pilolojn.

—Kiajn pilolojn, Tomi diris.

—Kelkajn tre bonajn pilolojn por tiu, kiu ne volas fariĝi granda, Pipi diris kaj saltis de la tablo. Ŝi serĉis ĉie en la ŝrankoj kaj skatoloj kaj post momento ŝi venis kun io, kio similis ekzakte al tri flavaj pizoj.

—Pizoj, Tomi diris surprizita.

—Ĉu tion vi kredas, Pipi diris. Ĉi tio ne estas pizoj. Estas krumelundpiloloj. Mi ricevis ilin antaŭ longe en Rio de maljuna indianestro, kiam mi hazarde menciis, ke mi ne tre volonte fariĝus granda.

—Ĉu helpas kun nur tiaj malgrandaj piloloj, Anjo diris dube.

—Ho jes, Pipi asertis. Sed oni devas manĝi ilin en mallumo, kaj oni devas diri la jenon:

*"Bona eta krumelunda  
mi ne volas iĝi grunda."*

—"Granda" vi certe volas diri, Tomi diris.

—Se mi diris grunda, mi volas diri grunda, Pipi diris. Tio estas la artifiko, vi komprenas. La plej multaj diras grunda, kaj tio estas la plej malbona afero, kiu povas okazi. Ĉar tiam oni komencas kreski pli ol iam ajn. Estis iam knabo, kiu manĝis tiajn pilolojn. Li diris "granda" anstataŭ "grunda". Kaj li komencis kreski tiel, ke oni povis timi la mallumon. Multajn metrojn po tage. Estis mizere. Estis ĉiukaze komforte, tiom longe ke li povis paŝti sin rekte el la pomarboj, proksimume kiel ĝirafo. Sed baldaŭ tio ne funkciis, li estis tro longa. Kiam kelkaj virinoj venis hejmen al li por saluti kaj volis diri: "Ho, kiel grunda kaj kapabla vi fariĝis", ili devis krei per megafono, por ke li aŭdu. Oni vidis nenion alian ol liajn longajn maldikajn krurojn, kiuj malaperis inter la nuboj kiel du flagstangoj. Oni neniam aŭdis de li, jes, unu fojon, kaj tio estis, kiam li volis leki la sunon, tiel ke li ricevis brulvezikon sur la lango, tiam li eligis kriegon, tiel ke la floroj velkis sur la tero. Sed tio ankaŭ estis la lasta vivosigno de li. Sed la kruroj certe daŭre ĉirkaŭmigras tie en Rio kaj faras malordon en la trafiko, mi pensas.

—Mi ne kuraĝas manĝi pilolon, Anjo diris terurigita. Se mi malĝuste diros.

—Vi ne diros malĝuste, Pipi diris konsole. Se mi kredus, ke vi farus tion, mi ne donus al vi pilolon. Ĉar estus tre enue nur havi viajn krurojn kun kiuj ludi. Tomi kaj mi kaj viaj kruroj, tio estus bela societo.

—Ho, vi ne diros erare, Anjo, Tomi diris.



Ili estingis ĉiujn kristnaskajn kandelojn. Fariĝis tute mallume en la kuirejo, escepte ĉe la forno, kie la fajro ardis malantaŭ la lukoj. Ili sidiĝis silentaj en rondo meze sur la planko. Ili prenis la manojn unu de la alia. Pipi donis al Tomi kaj Anjo po unu krumelundan pilolon. Jukis pro ekscito laŭ la spino. Imagu, post momento tiu stranga pilolo estos en la stomako, kaj poste ili neniam, neniam bezonos fariĝi grandaj. Estis mirinde.

—Nun, Pipi flustris.

Ili englutis siajn pilolojn.

—Bona estas krumelunda, mi ne volas iĝi grunda, ĉiuj tri diris samtempe.

Jen farite. Pipi lumigis la plafonan lampon.

—Mirinde, ŝi diris. Nun ni ne bezonas iĝi grandaj kaj ricevi dornokalojn kaj aliajn mizeraĵojn. Sed la piloloj ja kuŝis en mia ŝranko tre longe, kaj oni ne povas esti tute certa, ke la forto ne eliris. Sed ni esperu la plejbonon.

Anjo ekpensis pri io.

—Ho, Pipi, ŝi diris terurigita, vi ja iĝus marrabisto, kiam vi fariĝus granda.

—Baf, mi povas tamen fariĝi tio, Pipi diris. Mi povas fariĝi eteta marrabisto, kiu tamen disvastigas morton kaj konfuzon ĉirkaŭ si.

Ŝi cerbumis dum momento.

—Imagu, ŝi diris. Imagu, se venos sinjorino, kiu preterpasis ĉi tie iam post multaj jaroj kaj ekvidos nin ĉirkaŭkuri ludante en la ĝardeno. Tiam ŝi eble demandos vin, Tomi: "Kiom da jaroj vi havas, amiketo?" Kaj tiam vi respondos: "Kvindek tri jarojn, se mi ne erare memoras".

Tomi kontente ridis.

—Tiam ŝi ja pensos, ke mi estas tre malgranda je kresko, li diris.

—Jes, kompreneble, Pipi konsentis. Sed tiam vi povos diri, ke vi estis pli granda, kiam vi estis pli malgranda.

Ĝuste tiam Tomi kaj Anjo memoris, ke ilia patrino admonis ilin ne resti tro longe.

—Ni ja devas iri hejmen nun, Tomi diris.

—Sed ni revenos morgaŭ, Anjo diris.

—Bone, Pipi diris. Ni komencu la neĝodomon je la oka.

Ŝi akompanis ilin al la barilpordo, kaj ŝiaj ruĝaj harplektaĵoj dancis ĉirkaŭ ŝi, kiam ŝi rekuris al Vilao Vilaltao.

—Imagu, Tomi diris momenton poste, kiam li estis brosanta siajn dentojn, imagu, se mi ne scius, ke estas krumelundpiloj, mi povus ĵuri, ke estas ordinaraj pizoj.

Anjo staris ĉe la fenestro de la infanĉambro en sia rozkolora piĵamo kaj rigardis al Vilao Vilaltao.

—Rigardu, mi vidas Pipin, ŝi kriis ravite.

Ankaŭ Tomi rapidis al la fenestro. Jes vere. Nun, kiam la arboj estis senfoliaj, oni povis vidi en la kuirejon de Pipi.

Pipi sidis ĉe la tablo kun la kapo apogita al la brakoj. Kun reva esprimo en la okuloj ŝi fikse rigardis kandelon, kiu staris antaŭ ŝi kun flirtanta flamo.

—Ŝi ... ŝi aspektas tre sola iamaniere, Anjo diris kaj ŝia voĉo tremetis. Ho, Tomi, se estus mateno kaj ni povus tuj iri al ŝi.

Ili staris tute silentaj kaj elrigardis en la vintran vesperon. La steloj lumis super la tegmento de Vilao Vialaltao. Tie interne estis Pipi. Ŝi ĉiam estos tie. Estis mirinde pensi pri tio. La jaroj pasos, sed Pipi kaj Tomi kaj Anjo ne fariĝos grandaj. Kompreneble, se la forto ne malaperis el la krumelundpilo-

loj! Venos novaj printempoj kaj someroj, kaj novaj aŭtunoj kaj vintroj, sed ilia ludado daŭros. Morgaŭ ili konstruos neĝodomon kaj faros skideklivon de la tegmento de Vilao Vilaltao, kiam estos printempo ili grimpos en la kavan kverkon, kie limonado kreskas, ili ludos objektoserĉantojn, kaj ili rajdos sur la ĉevalo de Pipi, ili sidos en la lignejo kaj rakontos historiojn, ili eble ankaŭ revojaĝos al la Kurekuredutinsulo por viziti Momon kaj Moanan kaj la aliajn, sed ili ĉiam revenos al Vilao Vilaltao. Jes, estis mirinde konsola penso — Pipi troviĝas en Vilao Vilaltao.

—Se ŝi volus rigardi ĉi tien, ni povus mansvingi al ŝi, Tomi diris. Sed Pipi nur fikse rigardis antaŭ si kun revantaj okuloj.

Poste ŝi estingis la lumon.

[www.omnibus.se/inko](http://www.omnibus.se/inko)

**ISBN 91-7303-058-9**